

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro: 203 (283)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1983

1983 — JARO POR PROGRESO

(Mesaĝo de la Prezidanto)

1983 povas esti jaro de progreso por nia Asocio.

Ĝi komenciĝis bonege per plensukcesa Somerlernejo en Armidale pri kiu aperas raporto en ĉi tiu numero de AE. Estis precipe grave, ke la Administranto de la Novanglia Universitato, Profesoro R. C. Gates, A.O., Prezidanto de la Aŭstralia Nacia Komisiono pri UNESKO vizitis la Lernejon. Li konfirmis, ke li volonte estos patrono de la Jubileo de Esperanto en 1987, kaj li parolis modele pri Esperanto al ĵurnalisto de la "Armidale Express".

En Armidale la Estraro ricevis kontentigajn raportojn de la Komisiitoj pri Korespondaj Kursoj (J. Moore), la Centjara Jubileo (T. Steele), la Historio de Esperanto en Aŭstralio (R. Ross) kaj la Aŭstralia Antologio (A. Towsey). Dum la Lernejo ni elektis la 60 aŭtorojn, kies verkoj aperu en la Antologio, kaj kompilis vortareton, kiu rekomendos tradukojn de ĉ. 500 aŭstraliaj vortoj kaj esprimoj. Kiam li estos akirinta la necesajn permesojn por eldono la Komisiito invitos kunlaborantojn por la tradukado.

La Estraro ricevis ankaŭ raporton de la Redaktoro de AE kaj dankas lin pro lia sperta kaj sindonema laborado.

La Estraro notis, ke la financa stato de ĉiuj fondusoj estas tre sana, kaj invitas proponojn, konformajn al la celoj de tiuj fondusoj, por projektoj, kiujn ĝi povus finance subteni. La Estraro ŝatus havi proponojn, super ĉio, por stipendioj, kiuj helpus aŭstralian Esperantiston fari eksterlande studojn, kiuj povus helpi al nia laborado, aŭ fremdan Esperantiston viziti Aŭstralion samcele. Pri tio estos aparta anonco.

Tre esperigan raporton ni ricevis pri la skolta ĵamboreo en Brisbano-Ipswich, kie kelkcent skoltaj kaj skoltestroj interesiĝis. La Estraro donos ĉiun eblan helpon al la sekvo de tiu afero.

La Estraro ankaŭ diskutis la estontajn paŝojn farendajn rilate la enketon de la Senato pri Nacia Lingvo-Politiko. Nia celo kaj espero estas, ke organiziĝos almenaŭ unu klaso pri Esperanto por instruistoj en ĉiu ŝtato kaj teritorio, por ke estos instruistoj por eventuala instruado en lernejoj de la ŝtataj edukadistoj.

Eble la plej grava evento en Armidale estis invito al AEA far la Prezidanto de la Aŭstralia Asocio por Unuigintaj Nacioj, D-ro K. D. Suter, B.A., Ph.D. La Konsilio de tiu Asocio, sekve de la Rezolucio de la Tutmonda Federacio de Asocioj por UN, kaj prepare al plua agado de la Federacio, rekomendis al AEA kunvoki altnivelan kunvenon de organizaĵoj por atentigi la publikon pri la neceso de internacia lingvo kaj diskuti kiel enirigi ĝin en la lernejojn. La Estraro decidis akcepti la inviton de AAUN kaj elsendos baldaŭ invitojn al la koncernaj organizaĵoj kunveni en Kanbero, eble en Februaro aŭ Marto. La provizora listo de invitotaj organizaĵoj estas:

- (a) Aŭstralia Asocio por UN
- (b) Aŭstralia Ruĝa Kruco
- (c) Rotario
- (ĉ) Societo de Amikoj (Kvakeroj)
- (d) Bahaianoj
- (e) Aŭstralia Konsilio de Eklezioj
- (f) Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj
- (g) Asocio de Ruraj Virinoj (Country Women's Association)

- (ĝ) Women's Christian Temperance Union (Virina Kristana Unio por Abstinismo)
- h) Internacia Virina Ligo por Paco kaj Libereco
- (i) Amnestio Internacia
- (j) Aŭstralia Nacia Komisiono pri UNESKO
- (k) Aŭstralia Turisma Komisiono kaj Federacia Asocio

Membroj de AEA, kiuj estas ankaŭ membroj de iu/j el la supraj organizaĵoj, bonvolu anonci sin al la Sekretario, por ke ni povu informi eblajn kunlaborantojn. La Estraro bonvenigus sugestojn pri organizaĵoj aldonendaj al la listo. Komprenible helpo de niaj Federacioj, Societoj kaj Kluboj estos ankaŭ necesa, sed oni nur **planu** ĝis vi estos ricevinta kopion de la inviteleto, kun la dato de la proponata kunveno.

Do, jen kelkaj perspektivoj por progreso en 1983.

Al ĉiu mi deziras prosperan kaj fruktodonan Novan Jaron!

—RALPH HARRY.

LA SOMERLERNEJO EN ARMIDALE

Januaron 1983, de la 2-a ĝis la 14-a, okazis la ĉiudujara somerlernejo la kvaran fojon, sed la unuan fojon en Nova Sud-Kimrujo, ĉe la "Campus Conference Centre" de la Universitato de Nov-Anglio en la pitoreska urbo Armidale (Amidejl), situanta 562 km norde de Sidnejo.

Post-komencantan kurson instruis Alan Towsey laŭ la "Studlibro por la Aŭstralia Norma Elementa Diplomo" de Ken Linton, kaj oni pligrandigis la vortstokon pri ĉiutagaj konversaciaj aferoj per la "Praktika Bildvortaro de Esperanto" de la Oxford University Press. La klaso entreprenis tri paŝojn el "Paŝoj al Plena Posedo" de W. Auld, kaj preskaŭ ĝisfunde studis la enigmojn de transitivaj kaj ne-transitivaj verboj. Sep post-komencantoj partoprenis.

Annie Spencer kaj Wre Chandler kunlaboris kiel belarta grupo; bedaŭrinde aliaj aliĝintoj ne povis ĉeesti pro diversaj neatenditaj kaŭzoj.

Ray Ross gvidis dek progresantojn laŭ "Paŝoj al Plena Posedo" kaj "Plena Gramatiko" de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Plejparte ili priatentis gramatikajn punktojn, uzon de prepozicioj kaj adverbojn kun prepozicioj, frazkonstruadon, vortfigurojn, elizion, ĝemelajn vortojn kaj gramatikajn aspektojn de la radikoj. Studentoj partoprenis diskutojn pri elektitaj temoj, gramatikaj aŭ ĉiutagaj, kaj tradukajn ekzercojn "Creation of Spencer Golf" kaj la aboriginan legendon "The First Sunrise". Ili tralegis poemon "Night of Summer" de Kalocsay, kaj romanon "Abismoj" de Jean Forge, kaj poste diskutis kaj analizis.

La saman legolibron tralegis naŭ partoprenantoj en la literatura kurso gvidata de Trevor Steele Ili studis ankaŭ antologion "Baza Literatura Krestomatia" de Benczik, kaj elektitajn jurnalojn kiel "Literatura Mondo", "Fonto" kaj "Monato". La grupo kunlaboris por kontroli kaj ampleksigi la novan vortaron de Ralph Harry. "Aŭst-

raliaj Terminoj kaj Esprimoj". Tiu estas nemalhavebla ilo por tradukontoj de verkoj enigotaj en Aŭstralian Antologion por festi la ducentjaran datrevenon dum 1988 de la blankuloj en ĉi tiu kontinento. Vigla argumentado konstatas, ke kelkaj esprimoj, kiel "public school" kaj "good sort", havas malsamajn signifojn en diversaj lokoj.

Ĉiu grupano devis prezenti al la grupo eron, kiun oni mem verkis; poste kelkaj prezentis la samajn erojn denove al la tuta kursanaro en la kadro de la ĉiuvesperaj distraj programoj. Joyce Turner intervjuis Robby Robertson kvazaŭ televide, dum Trevor Steele de-joris kiel reĝisoro, pri la utileco de la angla kiel internacia lingvo. Sylvia Burkitt intervjuis Ralph Harry kvazaŭ aerhaveno pri liaj spertoj en Esperantio; Shirley Fanos deklamis sian poemon, kaj Jean Lehane laŭlegis sian propran verkon.

Cetere, Jean de-joris du semajnojn libroserve, kaj enspezis pli ol \$200, gratulinda rezulto.

Pri distraj programoj ĉefe responsis Annie Spencer kaj Joan Green; preskaŭ ĉiuj kursanoj partoprenis. Tipa programo okazis sabatovespere. Annie kantis dolĉvoĉe, Alan Towsey kaj Joan Green kiel vendistoj en butikio strebis por konstati la bezonojn de Marjorie Ellyard, la "Forgesema Klientino". Malcolm Ross lerte mimis en "La Vagabondo kaj la Kato", verkita de Helen Stone, kaj deklamita de Robby Robertson. Kun Shirley Gradussov, kiel nepino, Malcolm Ross ludis la rolon de ludemaĉa viro. Grupo el Sidneja Wesley Centre prezentis teatraĵon "Apartamento por si mem", verkita de Margaret Liston, kiu ankaŭ de-joris reĝisorine dum multaj provprezentoj en Sidnejo. La ĉefan rolon ludis Joan Green: la aliaj aktorinoj laŭalfabete estis Sylvia Burkitt, Kitty Gassner, kaj Myrtle Straker kiel pentrista modelino kaj t.n. "virmanĉulino". Robby Robertson, la sola viro inter tiom da "solecaj virinoj", terurigite aspergis la tapiŝon per botelo da malmultekosta ĉampano.

Semajnfine okazis aferkunveno de la A.E.A. — Estraro, kiu interkonsentis pri multaj gravaj aferoj: kredeble oni aperigos anaratan raporton. Dimanĉe, kiel kutime dum somerlernejoj, ni ekskursis aŭtomobile al Hillgrove, ormineja vilaĝo kaj popolmuzeo, kaj Wollomombi, Chandler kaj Ebor akvofaloj, situantaj en pitoreska pejzaĝo.

Ni gastigis en la somerlernejo gravan eminentulon, Profesoron R. Gates, Vic-kancelieron de la Universitato de Nov-Anglio, kiu estas malnova konato de nia Prezidanto. Li vizitis klasojn dum lecionoj kaj trinkis teon dum la post-tagmeza tepaŭzo; poste li diris, ke "Esperanto devas esti uzata kune kun aliaj modernaj lingvoj en gimnazioj kaj universitatoj". Forte impresis lin la diversaj vivspertoj kaj tuta dediĉo al Esperanto de la somerlernejoj. Tiujn opiniojn li esprimis dum intervjuo al raportisto de "Armidale Express", loka influhava ĵurnalo, kiu ankaŭ presigis duonpaĝan tre favoran artikolon kun fotografajo.

Ĉiutage multaj el ni naĝis en luksa naĝbaseno de la Universitato, aŭ antaŭ matenmanĝo aŭ dum la lunĉa paŭzo. La manĝoj estis bongustaj kaj abundaj, la konstruaj estis imponaj kaj la klasĉambroj tute taŭgaj, ĉiuj helpiloj por instruistoj estis provizitaj. Ĉiu disponis pri dormĉambro por si mem, simpla kaj modesta laŭ la kutima kolegia stilo, sed sufiĉe komforta. La estraro kaj personaro de la Kolegio "Duval" estis ĉiam helpemaj kaj amikemaj. Jam ni aranĝis somerlernejon post du jaroj en la sama situo.

Ni ŝuldas multan dankon al Joan Green, Shirley Fanos, Carson Thomas kaj Ray Ross, kiuj precipe respondecis pri la organizo. Nur trompis iliajn esperojn la kutima manko, partoprenantaro el Viktorio. Por allogi tiajn, la organizantoj movis la somerlernejon 400 kilometrojn suden, sed ne sukcesis tiurilate. Tamen ni elkore bonvenigis Shirley Gradussov, kiu entreprenis la longan multekostan veturadon el Okcidenta Aŭstralio, Pam Harris el fora Norda Teritorio, kaj Mac Le Fevre el Tasmanio, kiu cetere mirigis nin kiel ruza psikologo en "La psikologo sukcesas" de Stefano MacGill. El Kvinlando partoprenis 8, el Kanbero 5, el Nova Sud-Kimrujo 15.

— ROBBY ROBERTSON.

POST-KONGRESO EN 1984

La estraro de A.E.A. konsentis, ke la Manly Grupo aranĝu post-kongreson la venontan januaron. Se vi konsentas malstreĉiĉi kelkajn tagojn en Manly post la Aŭstralia Kongreso, bonvole informu Prof-on Robertson aŭ S-inon Duncan KIEL EBLE PLEJ BALDAŭ pri via intenco. Tiutempe loĝadon en niaj gastetoj oni malfacile trovos.

FAMA HOMO EN VAGONARO

Kiam la fama kuracisto, verkisto kaj humanisto Prof. Albert SCHWEITZER ricevis en la jaro 1952 la Nobelpremio de Paco, li vojaĝis al Oslo por transpreni la premion. La ĉefurbo de Norvegio estis preparita por solene akcepti la respektindan sinjoron de Limbarene. La stacidomo estis solene dekoraciita, la ruĝa tapiŝo kuŝis ĝuste ĉe la perono kie la internacia rapidvagonaro haltas — pli precize ĉe la elirpordoj de la unuaklasa vagono, kie atendis multaj oficialaj personoj en frakoj, kaj muziko kaj floroj.

La rapidvagonaro alvenis, la pordoj de la unuaklasa vagono malfermiĝis precize ĉe la ruĝa tapiŝo, sed eliris tute aliaj homoj ol la atendata gasto.

La sinjoro profesoro simple estis nenie. La urbestro de Oslo maltrankviliĝis. Oni komencis ĉirkaŭiri sur la perono kaj serĉi la laŭreaton. Nur post kelkaj minutoj, kiam oni jam supozis, ke la fama praarbar-kuracisto tute ne alvenis, iu ekvidis lian konatan kadukfiguron, kiel li kun kofro enmane trapuŝis sin tra amaso da vojaĝantoj ie malantaŭe, ĉe la triaklasaj vagonoj.

“Pro Dio, kial vi veturis per la tria klaso?”, demandis, kaj ekkaptis lin surbrake la ĉefurbestro kaj eble dekduo da manoj atakis lian kuracistan kofron.

“Ĉar ekzistas neniu pli malkara kvara klaso”, estis la respondo. Kaj ĉio ĉi nur por ke la grandaĝa sinjoro donacu la ŝparitan monon por kuraciloj kaj alia ekipaĵo al sia malsanulejo.

(Norv. E-isto)

INTELIGENTA HOMO

Iu vilaĝano ricevis komision, elfosi novan puton por fiksita monsumo. Kiam vesperiĝis, li interrompis la laboron. La proksiman tagon li volis daŭrigi ĝin, sed je sia ĉagreno li rimarkis, ke dum la nokto la tero de la puto estis enfalinta.

Li absolute ne ŝatis, fari la tedan laboron refoje. Jen li ekhavis brilan ideon: rapide li demetis jakon kaj veston, pendigis ilin rekte apud la puto kaj . . . foriris matenmanĝi.

Post kelkaj minutoj iuj vilaĝanoj preterpasis la lokon kaj opiniis ke la putkonstruisto havis akcidenton kaj nun kuŝas sub la defalinta tero. Tuj ili komencis rapide elŝoveli la teron, por helpi al la supozita viktimo.

Ili ius trapenetris ĉis la fundo de la puto, kiam la ruza viro ekaperis supre ĉe la rando, dankis al la amikoj, surmetis siajn vestojn kaj foriris, por ricevi sian salajron.

DON ROGERS LA NOVA N.Z.-PREZIDANTO

Multaj aŭstraliaj esperantistoj bone memoras la Nov-Zelandon esperantiston Don Rogers, kiam li laboris kaj studis en Melburno kaj aktive partoprenis nian esperantistan movadon. Intertempe li fariĝis Doktoro Rogers kaj reiris al Nov-Zelando, kie li daŭrigis sian agadon por Esperanto. Kaj liaj aŭstraliaj amikoj certe aŭdos kun plezuro, ke li estis elektita landa prezidanto ĉe la ĵus pasinta Nov-Zelanda Kongreso.

La 48-a Kongreso de NZEA okazis inter la 5-a kaj 9-a de januaro, 1983, ĉe “Matthews-Kolegio por Knabinoj” en Masterton. Malfeliĉe ĉeestis nur 36 personoj, inter ili unu brita kaj unu usona gasto. Tiu malmultnombra kongresano kaŭzis diskuton ĉu oni aranĝu kongresojn nur ĉiun 2-an jaron, por ŝpari vojaĝkostojn kaj aliflanke ebligi al Nov-Zelandon partopreni aŭstralian kongreson kaj tiamaniere kontribui al pli intima kunlaboro inter la lu du landaj asocioj.

Malfermis la kongreson, S-ino Margaret Christensen, magistrato de Masterton. En la unua aferkunveno anoj stari honore al la esperantistoj, kiuj mortis en 1982, speciale al S-ro Jim Allan, dum multaj jaroj prezidanto de la asocio. Dum la 2-a aferkunveno oni elektis la novan estraron: Prez. D-ro Don Rogers; Vic-Prez: Ralph Dearnley; Ĝenerala Sekretario: S-ro F. Adams, 2-a Sekretario: S-ino Gwenda Sutton; Kasisto: S-ino M. Richardson.

Sajne ne okazis Drama Konkurso, kvankam esperantistoj el Masterton, Wellington kaj Auckland prezentis kelkajn skeĉojn dum la drama vespero. Prof. C. J. Adcock kaj s-ro J. Major prelegis en 2 lingvo-sesioj. Ankaŭ okazis sesio de mallongaj prelegoj, inter kiuj D-ro Don Rogers prelegis pri “Energio”.

La 49-a kongreso okazos en januaro, 1984 en Auckland.

INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO

En la pitoreska RODOPI-montaro en BULGARIO, ekde 1982 malfermis sian nordon kaj komencis funkcii “INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO” (IEK).

IEK ne estas sezona domo. En ĝi okazas kursoj dum la tuta jaro. Sub la gvido de specialistoj, per la helpo de moderna ekipaĵo por lernado kaj prakti-

kado de la lingvo, la kursanoj havos la eblon en mallonga tempo akumuli riĉaĵojn. IEK ne estas nur kursejo — ĝi estas ankaŭ feriejo troviĝanta alte en la montaro — je pli ol 1000 metroj super la marnivelo, alloga dum ĉiuj sezonoj de la jaro.

Fakte IEK estas moderna hotelo kun 210 litoj en du-; tri-, kvar- kaj ses-litaj ĉambroj kun banejoj, moderne ekipita lingvolaboratorio kaj biblioteko. La restoracio kaj la diskoteko proponas komforton kaj agrablan restadon.

En la kursejo oni studas kvar horojn matene la internacian lingvon, posttagmeze estas organizitaj vizitoj al diversaj belaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo, projekciado de filmoj, gajaj vesperoj kaj prelegoj.

Se vi iam intencos viziti Bulgarijon, nepre skribu antaŭe al: **INTERNACIA ESPERANTO-KURSEJO**, P.K. 791, 1090 SOFIA, BULGARIO.

Misio de Esperanto: Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz (Caixa Postal 3133, 20001 Rio de Janeiro, Brazilo) sendis al spiritismaĵojn specimenojn de mesaĝo de Emmanuel, kun la titolo: "Missao do Esperanto", portugallingva. Ĝi proponas al la spiritismaĵoj la efektivigon de kursoj de Esperanto je la lernolibro "Esperanto Sem Mestre", eldonita de Brazila Spiritisma Federacio. En unu semajno ĝi dissendis pli ol mil cirkuler-ojn.

LA FORGESEMA PROFESORO THE ABSENT MINDED PROFESSOR

Cast (Roluloj) — MARY: PROFESSOR
MOSSIE : STELLA.

MARY: (Telephone rings-La telefono sonoras) Saluton!

PROF: Is that you, Mary?

MARY: Jes, paĉjo!

PROF: Mary, my dear, I find myself at Epping Station. Can you tell me what I am doing here?

MARY: Mi ne scias kial vi estas ĉe Epping Stacidomo.

PROF: Tell me, dear, where should I be today?

MARY: Vi devus esti ĉe Chatswood Urbodomo.

PROF: I should be at Chatswood Town Hall? For what purpose, my love?

MARY: Vi promesis paroladi al la sinjorinoj de la Instituto por virinoj.

PROF. Address the ladies of the Women's Institute? What was the theme of my address, dear?

MARY: La temo de via Parolado estis 'Memorado-instruo'.

PROF: 'Memory Training' I don't appear to have my notes with me.

MARY: Ho, jes, paĉjo! Vi portis viajn notojn.

PROF: No, my dear, I can't find them.

MARY: Sed paĉjo, mi metis ilin en vian poŝon kune kun via bileto —

PROF: You put them in my pocket with my wallet?

MARY: Jes, paĉjo! Mi klare memoras, ke mi faris tion.

PROF: You clearly remember doing that? But my wallet is also missing.

MARY: Vi ne havas vian biletojn?

Paĉjo, lasu min konsiliĝi kun Stella.

STELLA: (Pause) I have been listening on the kitchen extension. One of us must go and bring papa home.

MARY: (ekscitiĝas) Paĉjo. Kio okazis nun?

PROF: A policeman has asked me to accompany him to the Police Station.

MARY: Policano postulis, ke paĉjo iru kun li al la policejo! (al sia paĉjo) Ne timu, paĉjo!

PROF: But Mary, they have my valise and it appears it is full of money — stolen from a bank.

MARY: Ĉu vi certas, ke tiu valizo estas via?

PROF: Yes, it is my valise. I left it outside the telephone box.

MARY: Paĉjo, vi devas iri kun la policano, kaj ni venos por veturigi vin hejmen. Ne timu kara!

STELLA: Oh, Mary, I'm so afraid for papa - - -

MARY: Ne ĝenu vin, Stella. Kvankam paĉjo suferas pro manko de memoro li estas senofenda kaj naiva.

STELLA: Don't worry? Although he suffers from loss of memory he is innocent and inoffensive? But his lapses are becoming too — too frequent.

MARY: Ĝis nun ni ĉiam pruvis, ke li suferas nur pro manko de memoro.

STELLA: Poor papa! He must have quite a record in the police files . . . Do you remember last month, the day he forgot about his University lectures and found himself carrying the banner in the Guru procession?

MARY: Ĉu mi memoras? (ridas) Mi neniam forgesos lian vizaĝon, kiam li trovis sian eraron.

STELLA: And what about his escapade before that?

MARY: Kiam paĉjo promesis paroladi

en la nomo de la Medio-Konservado —
Societo - - -

STELLA: When papa was to speak on behalf of the Environmental Conservation Society, but instead, found himself actually leading the 'Women Libbers' storming Parliament House? (both laugh)

MARY: Ni ne devus ridi!

STELLA: No, we shouldn't laugh! It terrifies me that perhaps one day papa will become mixed up in a murder case.

MARY: Paĉjo intermiksiĝos en murdofero? Ne menciuj tian aferon! Ĉu vi estas preta?

STELLA: Yes, I'm ready! We must hurry to help poor papa, although we will probably find him happily lecturing the whole police force, on — (Both together) the 'Importance of Memory Training'

(Verkita de Margaret Liston — Manly

AŬSTRALIA- =KRONIKO

● **PERTO:** La jara ĉef-kunveno de la Ligo okazis je 8-a de decembro, 1982. Dek naŭ membroj ĉeestis. La kasisto raportis, ke la kaso estas sana, sed por plifirmigi la financan staton de la Ligo li proponis altigon de la kotizo al \$12 kaj al \$6 por pensiuloj aŭ studentoj, kiuj ne gajnas monon. Tiun proponon la kunveno akceptis.

Oni elektis novan estraron: Prez: S-ro R. Smeets; Vic-Prez: S-ro G. Gregson, S-ino Vera Payne; Sekretario: S-ro Chris Dean; Kasisto: S-ro O. Loneregan; Bibliotekisto: S-ino D. Dean; Publikaj rilatoj: S-ro Jack Hawks; Redaktoro S-ro C. Dean.

La Zamenhof-Festo okazis je la 15-a de decembro per bongusta "Smorgasbord"—Manĉo. D-ro Einihovici faris la festparoladon, kiun Jaqueline Walker tradukis anglen por la ne-esperantistaj vizitantoj. La "Lundo-grupo" prezentis teatraĵon kaj S-ro Gobba ludis la akordionon. Okazis loterio kaj aŭkcio, kiuj alportis pli ol \$40 al la kluba kaso. Ĉe-estis 46 personoj.

Ken kaj Vye Stevens el Anglujo estis bonvenaj gastoj en la hejmo de vic-prezidanto Gordon Gregson kaj je 23-a de decembro 14 membroj ĉeestis bonvenigan vesperon por la gastoj.

● **ADELAJDO:** Bonvena vizitanto estis F-ino Ottilie Stempel, el Perto (13-a de dec.) Si ankaŭ partoprenis nian Zamenhofan Feston, kiu okazis je 18/12. La salono estis feste ornamita per flagoj, afiŝoj kaj bildoj de D-ro Zamenhof. Dudek Personoj ĉeestis. La festparoladon faris la prezidanto (George Clarke).

Okazis 2 skeĉoj. Unu estis prezentita de 4 talentaj komencantoj kaj en la alia ludis Audrey Felby kaj Petro Ellyard (la filo de ges-roj Ellyard el Kanbero) Beryl Randles, Rex Hanney kaj Petro Ellyard deklamis poemojn, kiuj tre plaĉis al la ĉeestantoj.

— BOB FELBY.

● **LAUNCESTON, Tas.:** Nia klubo kunvenis je la 14-a de decembro, 1982, en la Eduka Centro por Plenaĝuloj (Adult Education Centre) por festi la Zamenhofan-tagon. Dudek sep personoj (inklude 6 infanojn) partoprenis bongustan festmanĝon. La festparoladon faris S-ro Mac Le Fevre, dum Clarence Strochetter tradukis la paroladon anglen por la ne-esperantistoj. S-ro Kam Lee, vizitanto el Hobarto, distris nin per gitar-muziko kaj prezentis kanton, kiun li mem komponis. —Mac LE FEVRE

● **MELBOURNE:** Tridek kvin personoj partoprenis la Zamenhof-Feston, kiu okazis je la 11-a de decembro, 1982, en la halo de la Skoltina Asocio, aranĝitan de la Esperanto-Federacio de Viktorio. La prezidanto de la Melburna E-Societo (S-ro S. Kanaĉki) estis kaptita en Sidnejo pro fervojista striko kaj niaj kutimaj muzikistoj (s-ino kaj f-ino Sanders) ne povis ĉeesti. Anstataŭis ilin F-ino I. Gale kaj s-ro D. Rockell, per du unikaj prezentadoj. F-ino Gale ludis la "Style-phone" akompanite per registrita muziko kaj David Rockell prezidis muzikon per klare aranĝitaj glasoj da akvo.

La Waverley-grupo deklamis erojn el "Fundamenta Krestomatio" kaj ravis per kantado. La E-cirklo de Frankston kantis kristnaskajn kantojn; anoj de la Malvern-grupo prezentis skeĉojn kaj f-ino Ann Hearn (Oakleigh) rakontis amuzajn anekdotojn. Ges-roj Koppel legis el la Esperanto-literaturo kaj la festparoladon faris S-ro John Coogans, novenmigrinto el Skotlando, kiu parolis pri la "Interna Ideo"

Du tagojn poste, en la Esperanto-Domo, ni havis la plezuron bonvenigi Ges-rojn Jim kaj Jennifer Dimo, kiuj montris diaĵozitivajn kaj parolis pri 21-monata vagado tra Eŭropo. Tio estis la Jarfina Festo, kiu finiĝis per festmanĝeto.

● **KANBERO:** Eble la plej bona Zamenhof-Festo iam aranĝita en la ĉefurbo okazis je la 13-a de decembro, 1982, en la ejo de la Instituto por Internaciaj Aferoj. Dudek naŭ personoj ĉeestis, el kiuj 22 estis esperantistoj. El la vivo de Zamenhof parolis angle Katherine Lewis.

La festparoladon faris gastoj Alan Towsey, kiu parolis en Esperanto kaj anglalingve pri "Esperanto, la lingvo komponita de L. L. Zamenhof".

Patti Anson legis raporton pri la 1-a Universala E-Kongreso en 1905, Sam Ellyard parolis pri "Atingo de Esperanto en 1982" kaj Brenda Burkett deklamis poemon.

S-ro Ralph Harry prezentis "Saluton al la Pioniroj de la Kanbera E-Klubo". Li transdonis librojn al Harry kaj Joyce Torr, al Sando Fulop kaj Noel Gamble, kaj al Colin Johns, kiu dum 32 jaroj estis la kaskontrolisto de la klubo Ĉiuj menciitaj fariĝis honoraj dumvivaj membroj de la klubo.

Sekvis ekspozicio pri ludoj en Esperanto, far la komencantoj, Ian Pollard montris la taŭgecon de Esperanto por komputiloj kaj Katherine Lewis klarigis pri la Nacia Esperanto Biblioteko en Kanbero. Robert Fong ludis la gitaron kaj la sukcesplena vespero finiĝis per luksa vespermanĝeto. Pri la vespermanĝo respondecis Dorothy Harry, la edzino de la prezidanto. Ĝi inkludis la jam tradiciajn verdstelajn biskvitojn.

● **SIDNEJO:** La 11-an de decembro, 1982, en la Esperanto-Domo en Redfern, membroj de la Manly-Klubo partoprenis la Zamenhof-Feston. Aranĝis kaj gvidis la prezentadon Marjorie Duncan.

La unua temo estis pensoj de Zamenhof, pri frateco, espero kaj persistado, kiujn laŭvice Judith Hanna, Les Scott, Betty Cleminson, Harry Peddie kaj la kursanoj de la Wesley Centro ilustris per Legado de paroladoj kaj poemoj de Zamenhof.

Sekvis niaj britaj vizitantoj Ges-roy Hamilton, kiuj parolis pri atingoj en Britujo. Poste, la Manly-horo, gvidate de Arthur Cocking kaj akompanate de Phyllis Cocking, prezentis du kantojn. Sekvis seriozaj verkoj: Margaret McLennan kaj Malcolm Ross prezentis historieton, verkitan de Helen Stone kaj Eunice Graham, kaj Arthur Cocking legis epizodojn el libroj de Raymond Schwartz kaj Bertram Potts.

Denove la horo distris nin kaj sekvis amuzaj skeĉoj, la unua de Raymond Schwartz en kiu rolis James Harwood, Margaret Chaldecott kaj Joan Green de

la Sidneja Klubo, kaj la aliaj verkitaj de Helen Stone kun kursanoj de la Eduka Centro kaj la Manly Merkreda Klubo kiel rolantoj. —EUNICE GRAHAM

● **MANLY:** La 19-an de decembro, 1982, ĉ. 45 membroj kaj amikoj ĝuis Kristnaskan Feston en la hejmo de Marjorie Duncan. Poste okazis aferkunveno por diskuti, i.a., aranĝojn por klasoj en la venonta jaro.

—EUNICE GRAHAM

● **ST. LUCIA:** Oficistoj elektigis ĉe jarkunveno, kiu okazis en la domo de la prezidanto.

Prez: S-ro Allan Mason; Vic-Prez: S-ino Ruth Morrison; Sekretario: S-ino Beryl Hildson (23 Lawnes Street, Wynnum, 4178); Kasisto: S-ino June Cullen; Libroperanto: S-ino Winsome Greenhalgh; Bibliotekisto: S-ino Ruth Philp. Komitatanoj: S-inoj Heather Jones, Bernice Patterson, Ruth Mason, Annie Spencer, Decia Shonhan, Mary Stevenson

La membroj renkontiĝas ĉe la domo de S-ino Winsome Greenhalgh, 39 Ryan's Road, St. Lucia, ĉiumerkrede dum la jaro.

—DECIA SHONHAN
(Gratulo al S-ro Allan Mason, kiu kuraĝas esti estraron de dek unu virinoj. Aŭ ĉu ni diru, ke dek unu virinoj mal-kuraĝis elekti virinon? Ed.)

LETERO AL LA REDAKTORO

... nur du numerojn de via revuo mi vidis, sed ili estas grafike tre belaspektaj, kaj enhave tre interesaj por movadano kiel mi: gratulojn al la tuta stabo... (Norberto Saletti, Bologna, ĉefredaktoro de "Koncize")

"The Worker Esperantist", organo de S.A.T. en Britujo, reprenis el nia eldono aprilo/majo 1982, la artikolon de Prof. R. Robertson pri sugestitoj novaj esprimoj por virinoj.

El la sama eldono reprenis "ELNA NEWSLETTER" (organo de la E-Ligo por Nord-Ameriko) la artikolon de Ralph Harry pri "Rotary Conference on World Understanding."

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$613
S-ino Kaethe Schwerin, Sydney ..	5
Anonima	10
S-ro J. Campbell, Dorrigo	5
F-ino H. Mueller, Sydney	30
S-ino V. Payne, Perth	5

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

23. — WINSOME GREENHALGH

Aptly named.

Winsome first saw the light of the Esperanto day in 1967. "The manner of" her Esperanto "birth was in this wise". Marjorie Duncan, pregnant with new ideas, had written an article "The Language which Opens Doors" in the "Australian Women's Weekly". Marjorie was contacted. She kindly arranged for a contact in Brisbane, and in due course Winsome linked up with the Brisbane Esperanto Club. The following year, encouraged by Nellie Callaghan, she and Violet Yowie, both teacherless beginners who had worked through "A Practical Course in Esperanto", attended the Manly Congress. "Tiny" Goldsmith, Marjorie and all the "Manlyites" helped her and encouraged her to such an extent that she fell in love with Esperanto and Esperantists.

Winsome was a trained teacher, B.A., and had done postgraduate work in Russian, the History of S.E. Asia, and especially the History of China and Japan, but had not previously heard of the Brisbane Club, even though (as she learned later) it was most vigorous under the leadership of Maurice Hyde and Bessie Carrick.

She was also the wife of Jack Greenhalgh (married 1939 in the shadow of war) and the mother of 3 daughters, all of whom have since married and moved away — one to U.S.A., one to England, and one to New Zealand. Winsome, then, has very good reasons for world travel, 6 good reasons in the shape of 6 grandchildren.

Travel has always been Winsome's delight, for her earliest yearning was for "far-away places and far-away peoples". Back in 1935, in a family group, she travelled by ship and train round the world. What a pity she was not an Esperantist then! In 1971 she and Jack enjoyed a "post retirement", year-long, holiday abroad. She attended the U.E.A. Congress in London which not only proved a delight, but also provided a meeting with many who became firm penfriends.

In 1974 she enjoyed her part in organising the Brisbane Congress, but was

denied the chance to see the fruit of her labour, for she lacked transport to and fro, and couldn't attend. However, in due course, she was made a Life Member of the Brisbane Association — an honour, no doubt, conferred partly in recognition of her "behind the scenes" endeavour.

1976 proved more propitious, for she was able to attend the first Pacific Congress after which the Greenhalgh duo hosted, in their home, one Taki Hamada who, in turn, invited them to Tokio the following year, showed them round, and took them along to the Japanese Institute. Esperanto really does open doors, for their sojourn in Japan was an Esperanto treat.

Cataracts on her eyes have precluded her completing the "Klereco" examination, but she still manages to do a good deal of translating, into Esperanto, of various works of literary merit and to make a contribution to Esperanto literature.

Nowadays, in fully occupied yet leisurely retirement, Winsome looks back with contentment on the joys of a very full life — and on some sorrows, such as the death of her father when she was 10, the resultant 7-year movement and separation of brothers and sisters, and the loss of her younger brother over Tobruk in 1942. But the sorrows have highlighted the satisfactions — the reuniting of her family in Brisbane, a good education, a happy marriage to a fellow academic, a successful bevy of daughters, the agreeable company of (mainly Esperanto) friends and her immediate circle in the St. Lucia Club.

— ARTHUR COCKING.

UNIVERSALA KONGRESO EN BUDAPEST

Membroj kiuj intencas partopreni la nunjaran kongreson, povas ricevi flugfoliojn kaj broŝurojn pri Hungarujo kaj Budapeŝto, sendante 50 cendojn por la poŝtkostoj al S-ro K. G. Linton, 4/2 Lyons Street, Glenhuntly, 3163.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ro M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro: 204 (284)

MELBOURNE

Marto, 1983

LA JUBILEA JARO 1987

En 1987 Esperanto estos centjara, nura bebo inter la lingvoj kaj ankoraŭ ne tre forta, sed ne plu mortigebla kaj kun senkompara kreskopotencialo.

Kompreneble UEA planas multnivelan celebren (legu pri ĝi en **Esperanto** de oktobro 1981). Same kompreneble la aŭstralia movado volas laŭeble kontribui al tiu celebrego. Kion fari? Jen kelkaj ideoj:

- (1) Starigo de Jubilea Patrona Komitato, kies membroj estu laŭeble ĉefaj politikistoj, universitatuloj kaj aliaj eminentuloj de la lando. (Profesoro Gates, la estro de la Universitato de Nov-Anglio jam konsentis membriĝi).

Ni devas pripensi, kiel igi la partoprenon en tia komitato pleje interesa kaj signifoplena por la partoprenantoj. Proponoj? Ĉu vi havas kontakton kun tia(j) homo(j)?

- (2) Propagando en la amaskomunikiloj pri nia lingvo kaj ĝia historio, kaj specialaj kursoj (perinstruantaj, perkasedaj kaj korespondaj) por ekspluati tiun propagandon. (En 1982 la BBC aŭdigis elstaran radioprogramon pri la IL, kiu povus servi kiel adaptenda modelo). Kiu el vi povus kontribui interesajn fotojn, sonbendojn ktp.?

- (3) Speciala anglalingva broŝuro sendota al kelkaj miloj da influhavaj neesperantistoj en nia lando. Ĝi enhavu la plej lastajn informojn, estu alloge verkita kaj presita, kaj ne veku krude propagandan impreson.
- (4) Prelegoj en neesperantistaj medioj (ekz. rotarianoj, skoltoj, UNO-organizaĵoj, poloj . . .) pri la signifoj de 1987. Tiujn okazojn ni ekspluatu por kolekti subskribojn de tiuj homoj, kiuj ja "simpatias", eĉ se ial ili ne intencas tuj lerni la lingvon. Ĉu ni havu tiucelan antaŭpreparitan atestilon, aŭ ĉu ni lasu la vortigon al la simpatiantoj?
- (5) Se la 1988-a UK okazos en Aŭstralio, ni kiel eble plej vaste diskonigu tion. Se ne, ni klopodu organizi por 1987 aŭ 1988 vere internacian kongreson ĉi tie, kiun partoprenu kiom eble plej da neanglalingvuloj.
- (6) Ĝis 1987 okazo ĝemeligo de aŭstralijaj E-societoj kun societoj en ĉiuj aliaj kontinentoj.
- (7) Eldono de aŭstralia(j) poŝtmarko(j) aŭ almenaŭ stampo por marki la Jubileon. Kiu povas prunti E-poŝtmarkojn eldonitajn de aliaj landoj por kvinvi nian registaron pri la graveco de nia lingvo? Sendu ilin al nia prezidanto Ralph Harry.

(8) Eldono de aŭstralia antologio en Esperanto (Alan Towsey jam aktivas pri tio).

(9) Eldono de historio de Esperanto en Aŭstralio (Ray Ross prizorgas tion).

La listigo de tiuj ideoj estas samtempe invito ilin modifi, plibonigi, anstataŭigi kaj proponi rimedojn por ilia realigo.

Unuope ni povas malmulton atingi, sed unueco kaj kunordigo donos al ni forton; fakte la ĉefa rolo de komisiito estas kunordigi. Do mi proponas jene:

ĈIU STATO SEKVU LA EKZEMPLON DE LA MELBURNANOJ, KIUJ JAM ELEKTIS KOMISIITON POR TRANSDONI AL MI IDEOJN KAJ MATERIALOJN RILATE LA JUBILEON. TIA KOMISIITO ANKAŬ RICEVOS DE MI KONSTANTAJN INFORMOJN PRI LA PROGRESO DE NIAJ TUTLANDAJ PLANOJ.

Tia aranĝo permesus al ni plej bone utiligi niajn kolektivajn fortojn.

Poste ni devos diskuti financajn aranĝojn. Mia adreso estas 7 O'Callaghan Street / HOLLAND PARK 4121. QLD.

TREVOR STEELE

(komisiito pri la Jubilea Jaro).

AŬSTRALIA ANTOLOGIO

En la 23a Australia Esperanto-Kongreso en Adelajdo (Jan. 1982), oni decidis eldoni antologion de la aŭstralia literaturo en Esperanta traduko por la Centjara Jubileo de Esperanto en 1987 kaj la Ducentjara Jubileo de Aŭstralio en 1988.

La listo de verkistoj kaj pecoj inkludotaj jam estas fine decidita, kaj sekvas ĉi tiujn notojn.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio nun invitas Esperantistojn ĉie provi traduki la pecojn elektitajn, kiel eble plej baldaŭ. Oni sendu tri (3) kopiojn de ĉiu tradukaĵo, kun tri (3) (foto)kopioj de la originalo, al la komisiito por la antologio: Alan Towsey, 19 Market Street, TAHMOOR, N.S.W. 2573.

Bonvolu noti:

(1) Nia Prezidanto, Ralph Harry kun helpo de aliaj interesatoj nun jam preparas vortareton de tipaj aŭstraliaj vortoj kaj esprimoj kun Esperantaj tradukoj, kiun ni esperas publikigi tre baldaŭ — estas nepre necese, ke la sama aŭst-

ralia vorto aŭ esprimo estu konsekvence tradukita tra la tuta libro per la sama(j) Esperanta(j) vorto(j).

(2) Ni lasas la elekton de taŭga eltiraĵo el la romanoj kaj dramoj elektitaj al la tradukontoj. Ĉiu eltiraĵo estu ne pli longa ol 7 paĝojn, **malpli se eble**, sed sufiĉe komplementa en si mem. (Trafoliumado de "The Australia Book", red. T. Inglis Moore, eld. Currey O'Neil (South Yarra, 1982), donos sufiĉe klaran ideon pri tio, kion ni celas.) Oni ankaŭ sugestis, pri la dramoj, ke oni mallonge resumu la intrigon, kaj traduku nur la finan, aŭ plej trafan, scenon.

(3) Pri la poezio: apenaŭ necesas diri, ke bona traduko de poemo konservas la saman rimskemon, la saman nombron da silaboj en ĉiu verso, kaj la saman ritmon, kiel en la originalo, samtempe ĝuste redonante la validiron de la poeto.

(4) Ni intencas starigi Lingvo-Komitaton por kontroli kaj poluri la tradukaĵojn — pro tio la postulo pri la tri kopioj **Tiu ĉi libro nepre devas esti altkvalita!**

—ALAN TOWSEY,

(Komisiito por la Antologio.)

La Listo

- Charles Harpur: poemo "A Midsummer Noon in the Australian Forest".
 Rolf Bodrewood: romano "Robbery Under Arms".
 Adam Lindsay Gordon: poemo "The Sick Stockrider".
 Henry Kendall: poemo "The Last of his Tribe".
 Tom Collins: romano "Such Is Life". (Ni sugestas la epizodon pri la devojigintaj infanoj el chap. V.)
 Marcus Clarke: romano "For the Term of his Natural Life".
 A. B. Paterson: balado "Waltzing Matilda"; poemo "The Man from Snowy River".
 Dame Mary Gilmore: poemo "Old Botany Bay".
 Bernard O'Dowd: poemo "Australia".
 Henry Lawson: rakontoj "The Drover's Wife" kaj "The Loaded Dog" (au alia pri hundo); poemo "The Lights of Cobb and Co.".
 Steele Rudd: "On Our Selection" ("Kate's Wedding"? au "The Night We Watched for Wallabies"?).
 Christopher Brennan: poemo "The Epilogue".
 Mrs. Aeneas Gunn: "We of the Never-Never".
 Henry Handel Richardson: romano "The Fortunes of Richard Mahoney".
 Shaw Neilson: poemo "The Sundowner".
 Walter Murdoch: eseo "My Bushfire".
 C. J. Dennis: "Songs of a Sentimental Bloke" ("The Intro?").
 Hugh McCrae: poemo "Fantasy".
 C. E. W. Bean: eseo "The Red Country" (el "On the Wool Track"), au peco el lia Historio de la Unua Mondmilito.
 Louis Esson: dramo "The Sacred Place", au "Dead Timber and Other Plays".
 Miles Franklin: romano "My Brilliant Career".
 Norman Lindsay: infanlibro "The Magic Pudding" (unu "tranchaĵo").

Katherine Susannah Pritchard: romano "Coonardoo".
 Martin Boyd: romano "Lucinda Brayford".
 Vance Palmer: rakonto "Tobacco".
 Frank Dalby Davison: romano "Manshy".
 Eleanor Dark: romano "The Timeless Land".
 Kenneth Slessor: poemo "Country Towns".
 R. D. Fitzgerald: poemo "Quayside Meditation".
 Alan Marshall: autobiografio "I Can Jump Puddles".
 Christina Stead: romano "Seven Poor Men of Sydney".
 Dorothea Mackellar: poemo "My Country".
 Henrietta Drake-Brockman: rakonto el "Sydney or the Bush".
 Alan Seymour: dramo "The One Day of the Year".
 A. D. Hope: poemo "Australia".
 Xavier Herbert: romano "Capricornia" au "Poor Fellow My Country".
 Hal Porter: "The Followers", el autobiografio "The Watcher on the Cast-Iron Balcony".
 Dal Stevens: rakonto "The Pepper-Tree".
 Kylie Tennant: romano "Ride On Stranger".
 Patrick White: romano "The Tree of Man".
 Kenneth ("Seaforth") Mackenzie: poemo "The Wagtail's Nest".
 Douglas Stewart: dramo "The Fire on the Snow".
 David Campbell: poemo "Droving".
 Judith Wright: poemo "Bullocky" kaj "Black Cockatoos".
 Morris West: romano "The Shoes of the Fisherman".
 Frank Hardy: romano "Power Without Glory".
 James McAuley: poemoj "Terra Australis" kaj "Because".
 Rosemary Dobson: poemo "Cock Crow" au "Jack".
 Colin Thiele: rakonto el "Sun on the Stubble".
 Kath Walker: poemo "We Are Going", kaj rakonto "Kill To Eat".
 Ray Lawler: dramo "The Summer of the Seventeenth Doll".
 Geoffrey Dutton: poemo "The Island" (jam tradukita de R.H.).
 Donald Horne: romano "The Permit", au "The Lucky Country".
 John Rowland: poemo "Landscape" (jam tradukita de R.H.).
 Ruth Park: romano "The Harp in the South".
 George Johnston: romano "My Brother Jack".
 Thomas Kenally: romano "Bring Larks and Heroes", au "Schindler's Ark".
 Randolph Stow: poemo "Dust".
 Frank Moorehouse: rakonto elektota de la tradukonto.
 Jack Hibberd: dramo "A Toast to Melba".
 Michael Thwaites: poemo "Milton Blind".
 Dick Roughsey: indighena legendo "The Giant Debil-Dingo" (jam tradukita de R.H.).
 Joan Lindsay: romano "Picnic at Hanging Rock".
 Nacia himno "Advance Australia Fair".
 Tradicia kanto "Click Go The Shears".

kaj silente, super ĉio la Arbo de la Sciado. Kiam oni pripensas arbon oni eble imagas baron sed neniam rabon.

Tamen en 1982 estis multe da bruo inter la folioj de la genealogiaj arboj, precipe en la reĝaj familioj iiter la gregoj kaj geprincoj.

En Anglio Princo Karulo restis hejme por subteni sian Diinon kiam ŝi naskis filon, nomitan Vilhelmo honore al la prezidanto de la Akademio de Esperanto! Sed lia frato Andreo imitis ardeon en la Brita Aerarmeo kiel piloto de helikoptero. Pro tio li devis vojaĝi al la suda Atlantiko por pliiĝi siajn flughorojn en Falklando kune kun kelkaj cirkuoj. Kaj post tiom da imito de rabobirdoj li kompreneble bezonis iom da ripozo, spektante pli dolĉajn birdojn sur duna aŭ nuda insulo en la suno.

La fratino de Karulo kaj Ardulo, la Princino Anna ankaŭ vojaĝadis. Ŝi iris al Afriko, lando de la fakiro kaj Kafroj por savi infanojn, kaj en la ĉiujara balotado de la BBC (Brita Bromida Centrejo) ŝi gajnis la duan premion en la virina fako. Alia konata bromidistino, la Ĉefministro, estis nomita la plej populara. La tria premio iris al arkeologo, kiu eliris fraŭlinon, Maria Rozo, kunulino de Henriko la Oka (aŭ "la Aŭsano") el la Angla Markolo. La Reĝino, spite de sia inaŭguro, per valso kun Matilda, de la Komunregnaj Ludoj en Brisbano, malfermo de Nacia Artgalerio en Kanbero, kaj krozo inter la Pacifikaj insuloj, troviĝas nur en la kvara loko!

En 1982 la reĝa familio komencis televidan kampanjon por gajni monon per turistvizitoj al la palacoj kaj ties trezoroj — same kiel la Kronjuveloj en la Londona Turo. La Reĝino eĉ ofertis glason da ruĝa vino al ĉiu vizitanto en sia dormoĉambro en la Palaco Buckingham (bukinem). Sed tiu turista allogaĵo devis ĉeŝi kiam evidentiĝis, ke kelkaj turistoj fakte estis spionoj, senditaj por lerni pri la kristnaska parolado de la Reĝino al la popoloj de la Komunregnaro. Tiel oni esperis povi legi la mesaĝon per la telefioj en taso antaŭ ol la Reĝino parolos.

Dank'al la batalpaŭzo en la sankta milito inter la Vatikano kaj la Angla Eklezio (komencita de Henriko la Aŭsano) la Papo povis fari turistan viziton al Anglio. Post la vizito la Eklezio decidis, ke en e tonteco oni ne eltroniĝos reĝinon, kiu edziniĝos kun katolika pastro.

KLAĈAJ ANALOJ DE 1982 de ROLO

Kiam Unuiĝintaj Nacioj decidis, ke 1982 estu la Jaro de la Arbo oni ne supozis, ke estos pro tio tumultaj eventoj. Ĉar la arboj kutime kreskas malrapide

Dum la jaro la Reĝo Baldakeno, aŭ Baldueno, fariĝis mondkonata pro sia subteno de la Universala Kongreso de Esperanto en la Zoologia Ĝardeno en Antverpeno, kaj pro sia sperta prokrasto de la inaŭguro de novaj registaroj. Lia frato Alberto, post vojaĝo al Aŭstralio, raportis, ke la Aŭsanoj bonvenigis gegeran viziton, kio helpus vendi la flamantajn varojn, bieron, lupolojn, ĉevalinojn k.t.p.

El la sudo de Francio venis la trista novaĵo, ke la tre amata princino de Monako mortis pro enaŭtomobila koraktako. Estis pro ŝi ke la originala jaranalisto, Raymond Schwartz nomis unu epokon: "La Jaro de Graco". Via nuna raportanto unufoje paroladis kun ŝi, sur skilifto, kaj trege admiris ŝian gracian gracilon.

Sed la plej gravaj reĝaj eventoj okazis en orienta Eŭropo kaj en la Meza —

kaj Fora Orientoj.

En Sovetunio oni sintenis laŭ la antikva franca slogano: "La Reĝo mortis, vivu la Reĝo!" aŭ "Prezidento Leonido mortis, vivu la KGB". Pro la 60-a jubileo de mi forgesas kio, oni lernis pri la resaniĝo de kelkaj preskaŭ forgesitaj mensomalsanuloj kaj karcerpacientoj. Kaj ĉar Andropovo havas pli da povo ol Andreo oni esperas (per Fundamenta Analiza Anagramatiko) ke venos vera pravondo!

En Pollando, por kristnaska donaco oni esperis la revenon de Bona Reĝo Venceslaso (pseŭdonime Leka Valenska). Sed spite de la solidareco de la glacio la antikva reĝolando restis neŝanĝebla.

La famo de la solidara sindikato fariĝis pli kaj pli diskonita en la mondo. Sed en la hejmlando neniam okazis balo sen nova socia listo.

(Daŭrigota)

Esperanto-Emisio de RADIO ROMA:

VIRINAJ KURACISTOJ

Teksto de Paola Randone, traduko de DE SALVO

Medicino, samkiel multaj sciencoj, estis ĉiam preskaŭ rezervita al viroj. Tamen, se oni esploras la pasintecon, oni malkovras, ke multaj virinoj postlasis spurojn en medicino.

Ni reiru al la jaro 2700 antaŭ Kristo, kaj ni trovas MERIT PTAH, egiptino, la unua kuracistino, pri kiu ni havas sciigojn. Sur ŝia tombo, skulptita el ŝtono, daŭre rezistas je la tempo ŝia meditema kaj hieratika portreto. Multaj jarcentoj pasis de tiam. Sed eble Merit Ptah, en la praktikado de sia profesio, ne spertis la problemojn, kiujn devis affronti la atenanino AGNODIKA, vivinta en la tria jarcento antaŭ Kristo. La leĝoj de Ateno ne antaŭvidadis virinajn kuracistojn; sed Agnodika ruze evitis tiujn leĝojn, surmetante virajn vestojn. Kaj ŝi iĝis tiel lerta kuracistino, ke ŝiaj kolegoj, plenaj de envio, mis-

akuzis "lin" pri seksperforto kontraŭ iuj pacientinoj dum la praktikado de la profesio. Kompreneble, estis facile al Agnodika pruvi la neeblecon de la akuzo; kaj sekve de tio Ateno malfermis la medicinajn studojn al virinoj.

Kaj ni konsideru la mezepokan Italion de la dekunua jarcento: en la mirinda "Salerna Skolo" pri Medicino, ankoraŭ hodiaŭ aprecata, iu virino, kiu nomiĝis TROTULA PLATEARIA, estis "magistrino pri medicino". Ŝi okupiĝis pri ginekologio kaj akuŝ-arto, kaj verkis la unuan traktaton pri iu temo, kiu deproksime tuŝas virinojn "Pri la virinaj suferoj". Same en Salerno, kelkajn jarcentojn pli malfrue, en 1430, COSTANZA CALENDIA havis la honoron esti la unua virino en la mondo, kiu doktoriĝis pri medicino.

"SAT — AMIKARO", la organo de la Franca Laborista E-Asocio, represas la artikolon de Alan Towsey "Necesaj vortoj en Esperanto" el nia eldono de oktobro 1981.

Aŭstralia Norma Elementa Diplomo:

Sukcesis S-ino Marjorie B. Ellyard,
Cook, A.C.T.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** La unua kunveno en 1983 okazis je 9-a de februaro. Prezidis la nova prezidanto Rene Smeets kaj 18 membroj ĉeestis. D-ro Einihovici legis novaĵojn el E-gazetoj kaj S-ro Hawks ekzercigis nin per demandoj.

S-ro Smeets raportis, ke la estraro decidis helpi la Subten-Fonduson de "Australian Esperantist". La ĉeestantoj tuj donacis \$22.50 kaj la estraro duobligis la sumon al \$45.

La kasisto (s-ro O. Loneragan) raportis, ke la partopreno en la ĉi-jara "Hyde Park"-Festivalo estis granda financa sukceso. S-ro Huts, kiu ĵus revenis de vojaĝo al Nederlando, rakontis pri farado de lignaj ŝuoj.

● **ADELAJDO:** La 7-an de februaro okazis la unua kunveno por 1983. Ĉi-foje ni ne kunvenis en la Universitato, ĉar ĝi nun postulas de ni \$20 por ĉiu kunveno. Pro tio ni nun kunvenas en la infanvartejo de la "Uniting Church" en Sefton Park. En la nova ejo ni trovis bonegan kuirejon kaj decidis estonte ĉiam havi kafaŭzilon dum niaj kunvenoj. Nova kurso komenciĝis je 28/2.

La estraro por 1983 estas: Prez: George Clarke, Sekretario kaj bibliotekisto: Bob Felby; Kasisto: S-ino Beryl Randles; Komitatoj Audrey Felby kaj Neill Hart —R. FELBY.

● **MELBURNO:** Dudek unu personoj ĉeestis, el ĉiuj kluboj de Melbourne, kiam je 24/1 Jim kaj Jennifer Dimo rakontis pri sia 21-monata vagado tra Eŭropo. Per belaj diapozitivaj kaj interesa komentario ili pruvis, ke Esperanto vivas.

Je 7/2 S-ro Harry Beechey parolis pri "Sociologio", la studo pri la homoj en grupoj — sed kiel pli ol kial. Semajnon poste Jan Makowski prelegis pri la japana lingvo kaj faris kelkajn komparojn kun la ĉina.

La Generala Kunveno okazis je 21-a de februaro, sed nur 5 membroj ĉeestis.

La sekretario (H. Koppel) raportis, ke la societo havis en 1982, 32 membrojn. (1981: 28 membrojn kaj 1 lernanton). Ĉar la kasisto feris, la sekretario legis la kasraporton, laŭ kiu la societo havis

en 1982 pluson de \$75.60 (1981 defikito de \$6.44). Tiu pluso rezultis ĉefe pro investo de kluba kapitalo je pli alta interezo.

Elektiĝis la jena estraro: Prez: S. Kanaĉki; Vic-Prez: Harry Beechey; Sekretario: H. Koppel; Kasisto: Errol Chick; Bibliotekisto: Fay Koppel; Inform-oficisto kaj Kaskontrolisto: Ken Linton.

Je 28-a de februaro S-ro S. Kanaĉki montris diapozitivajn kaj parolis pri sia vizito al Figio.

La **MALVERN E-Grupo** havis sian Generalan Kunvenon je 7-a de februaro kaj elektis la jenan Estraron: Prez: Don Pescod; Sekretario: Lydie Hooper; Kasisto: Beryl Pescod; Grupvidanto kaj Bibliotekisto: Adrienne Paling.

● **KANBERO:** La klubo translokiĝis al nova kunvenejo en la Instituto por Internaciaj Aferoj, Natonal Bank Premises, Jamison Centre, Macquarie. S-ino Marj Ellyard instruas komencantojn ĉiumerkrede kaj S-ro Ralph Harry gvidas grupon de progresantoj ĉiulunde.

Je 28-a de februaro Marj Ellyard kaj Ralph Harry vizitis kunvenon de la Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj. Marj Ellyard prelegis pri la celo, historio kaj strukturo de Esperanto kaj montris librojn kaj gazetojn. Ralph Harry priskribis la organizon de la E-movado kaj la proponojn de A.E.A. al la Senata Komitato por Edukado kaj Artoj. La 20 ĉeestantoj montris grandan intereson kaj petis informon pri speciala kurso por lingvistoj.

● **SIDNEJO:** Raporto ne alvenis.

● **MANLY:** La 1-an de februaro 20 klubanoj ĉeestis la Jarkunvenon en la hejmo de Edna Giles. Re-elektiĝis Robby Robertson kiel prezidanto, Frank Preacher kaj Judith Hanna, vicprezidantoj, Betty Cleminson, sekretario, Frank Mangan, kasisto kaj Helen Stone, libroagento.

La 8-an de februaro komenciĝis la unua trimestro en la Eduka Centro kun la kutimaj 5 grupoj de ĉ. 30 ĉeestantoj. Ĉiuj ĝuas la duonhoran renkontiĝon post la klasoj kiam kursanoj distras nin per paroladetoj, diapozitivaj aŭ filmoj.

La 4-an de marto Frank Preacher montris interesajn lumbildojn kun lerta komentario pri Seychelles, Balkano kaj diversaj lokoj, kiujn li vizitis lastjare.

Kun granda plezuro ni denove bonvenigis nian japanan amikinin, Mayo Issobe, kiu lastfoje vizitis nin dum la

Aŭstralia Kongreso en Sidnejo. Ĝi nun estas ĵurnalisto en Tokio por la angla-lingva ĵurnalo "Japan Times".

—EUNICE GRAHAM.

● **BRIZBANO:** La unuan de februaro la anoj kunvenis por diskuti kaj aranĝi aferojn dum la nuna jaro. Malgraŭ multe da reklamado, la situacio rilate al komencantoj ne kontentigas. Tamen, la finfina rezulto de la Skolta Ĵamboreo espereble plibonigos tiun situacion. La Skolta Asocio de Aŭstralio (Kvinslanda Fako) donacis al ĉiu helpanto ĉe la Esperanto-Budo dankmemorajon.

La Societo gratulas al Gaye Phillips kaj Kay Andersen, pro la eldono de la kantlibro "Aŭstralio Kantas Sian Historion", kun danko al la aliaj helpantoj. La kantgrupo jam aranĝis la unuan kantpraktikon la 10-an de februaro.

La Ĝenerala Kunveno elektis la ĵenan Estraron: Prez: Trevor Steele; Vic-Prez.: Ray Ross, Tom O'Grady; Sekretario: Cath. Sullivan; Kasisto: Sybil Martin; Publikaj Rilatoj; Cliff Bailey; Redaktoro 'Babilado': Peggy Ross; Libro-Peranto: Lynne Farr; Bibliotekistoj: Ruth Morrison, Annie Spencer.

—RAY ROSS.

● **TOOWOOMBA:** La Ĝenerala Kunveno elektis la ĵenan Estraron por 1983: Prez: Jean Lehane; Vic-Prez: Jean Carney; Sekretario: Sandra Connors; Kasisto Gloria Morgan; Bibliotekistoj: Jean Lehane, Gwen Stower.

La Societo kunvenas ĉiun merkredon en la hejmo de la Prezidantino ĉe 2A Harms Street je la 7-a p.t.m. La Societo starigis budon ĉe la "Hobbies and Crafts Spectacular" de la Rotaria Klubo. Estis 200 budoj kaj 10.000 vizitantoj kaj membroj disdonis E-flugfoliojn al interesatoj.

● **SKOLTA ĴAMBOREO:** Cliff Bailey raportas, ke estas konstanta fluo de lecionoj el diversaj regionoj post la disdonado de la unuaj senpagaj lecionoj dum la ĵamboreo Ĝis nun, kelkaj jam atingis la kvinan lecionon; unu knabo, nur dek-jara, bone progresas. Post apero de artikolo pri Esperanto en la skolta gazeto SCOUT, du plujaj skoltoj petis lecionojn. Entute 24 studentoj partoprenas la korespondkurson.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** S-ro Mike Ahern, Ministro por "Primara Industrio", denove konsentis esti Patrono de la Federacio en 1983.

La unua konferenco por 1983 okazos en Toowoomba, 7-8 de majo. La loĝloko estos la "Blue Violet Motel" en Margaret Strato. Se vi intencas partopreni tuj aligu ĉe Ray Ross, 41 Agnes St., Sunnybank, 4109.

● **VIKTORIO:** La Ĝenerala Kunveno okazis en la Esperanto-Domo en Richmond je 4-a de februaro. Laŭ la kasista raporto la Federacio havis pluson de \$10.42, sed la kredito en la bank-kontoj estas \$666.50 (kiu inkludas \$129 de la Fonduso por la Centjara Jubileo).

La kunveno elektis la ĵenan estraron: Prez: D. Rockell; Vic-Prez: R. Reed; Sekretario: Loretto Jackson; Kasisto: Eva Trainor; Redaktoro: H. Koppel; Publikaj Rilatoj kaj reprezentanto ĉe la UNO-Asocio: Gerald Tunnan.

La unua aranĝo por 1983 estis pikniko en la bela "Blackburn Lake Sanctuary", je 26-a de februaro. 16 membroj partoprenis.

La estraro de la Federacio sendis petskribon al la Kongres-Komitato en Kanbero, ke la vesperaj kunvenoj finiĝu je la 10-a vespere. Okaze de la lasta kongreso en Adelajdo pluraj kongresanoj forlasis la halon je la 10-a vespere pro laciĝo dum la varmega vespero. La Federacio ankaŭ sugestis, ke la Kongres-Komitato nepre kontaktu la Cef-Astronomo de la "Mount Stromlo" Observatorio por aranĝi vesperan viziton de la kongresanoj al tiu interese ga observatorio. Simila vizito dum la kongreso en 1966 estis unu el la plej elstaraj eroj de tiu kongreso.

24-a AŬSTRALIA ESPERANTO - KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT.

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 1-7-1983: \$10 (poste \$25), Pensiuloj, studentoj \$15 (poste \$20).

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614.** Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon. Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE", sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

I-a Listo de Aliĝintoj

1. Ralph Harry, Kanbero
 2. Ivu Fallu, Melburno
 3. Jack Fallu, Melburno
 4. Winsome Greenhalgh, Brizbano
 5. Jack Greenhalgh, Brizbano
 6. Ray Ross, Brizbano
 7. Peggy Ross, Brizbano
 8. Ilja Grahovac, Sidnejo
 9. Vera Payne, Perth
 10. Arthur Cocking, Manly
 11. Marj Ellyard, Kanbero
 12. Sam Ellyard, Kanbero
- Laŭŝtata distribuo: Kvinlando 4, A.Ĉ.T. 3, Viktorio 2, N.S.K. 2, Okcidenta Aŭstralio 1.

Por la reveno de Latino: Alvoko al la itala Parlamento, favore al la instruado de la latina lingvo en italaj mezgradaj lernejoj, estis subskribita de 130 italaj intelektuloj, universitataj profesoroj kaj verkistoj, tuj antaŭ la diskuto, ĉe la Senato, de la projekto de reformo de la italaj mezgradaj lernejoj.

La subskribintoj esprimis sian firman konvinkon, ke la studo de la latina kulturo, devas konsistigi nepran parton de la instruaj celoj, pro sia neanstataŭigebla kontribuo al la lingva, historia kaj eŭropa formiĝo de la junularo. (Radio Roma -- Esperanto).

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO**24 — JIM DIMO**

A colourful citizen of the world.

Jim was born a Serb in Yugoslavia. His father, though a Serb from Montenegro, spent half his life in Hungary which was then part of Austria. His mother was born in Transylvania which was then in Hungary but is now part of Rumania. With such a background it is not surprising that Jim became multicultural, multilingual and multinational (or sansnational). As a small child he was speaking 6 languages which he later extended to 15 or so. No wonder he soon realized the necessity for an international language!

With little else than an insatiable thirst for knowledge and an inborn musical, artistic, talent, Jim was forced to follow an uphill road. At 14 he was playing in a cafe by night and studying by day. Little by little he became a semi-professional magician and clown in a circus, and during the summers worked in many lands. In this way he earned enough to study in Colleges and Universities — Teaching Methods, Comparative Linguistics and Classical Music. As an amateur painter he received several prizes, chiefly for rural scenes. As a music teacher, his fame transcended national boundaries, and in 1964 he became the first Australian invited to U.S.A. as a judge of Jazz in the New York World Fair. Ironically he was at the same time a judge in the Classical Accordion section in a world competition. (By the way, Jim taught his wife Jenny to play the accordion and she was twice adjudged Champion Accordionist of Australia.)

During World War 2, Jim volunteered to fight Hitler and the Fascists in the Yugoslav mountains — as a Partisan. After 2 years, he was captured and was forced to work in a German coalmine 16 hours a day. At the end of the war he weighed 40 kg. (about 6 stone).

In 1949 he migrated to Australia and became an Australian citizen in 1956. He has been a delegate for U.E.A. for 25 years.

During the last few years, he and Jenny have travelled through 42 countries in 5 continents, have visited 150 Esperanto clubs, and have spoken more than 500 times to Esperanto clubs, Rotary, Colleges and Universities. (Jim is a member of Rotary International, Friends of the Earth, the Rome Club, Ecologists, Mountaineers, Amnesty International, Scouts and Nudists. He was the first Vice President of the Australian Nudist Federation.)

He has been very active politically. Twice he has been a parliamentary candidate and, though he has not managed to grace our legislative halls he is still a voice — mainly on population, ethnic affairs, immigration, decentralisation and ecology — in the councils of the Democratic Party.

Jim and Jenny support the movement for a world parliament, the World Nationless Association, the Anti Nuclear movement, disarmament and world peace. They despise dictatorship whether of the Left or the Right and believe that misdirected "patriotism" can be a force for evil. Further, they contend that

world peace will come easily when people eschew blind chauvinism and begin to see that uncontrolled capitalism, though intrinsically evil, contains some very good ideas as does socialism but not, they hasten to add, Communism. (N.B. Any views expressed here are not necessarily those of the writer or Editor. Esperanto is neutral in matters of religion and/or politics.) They assert that Esperanto is the only satisfactory tool of communication between peoples of the world and that the ideals of Esperantism could form the bases of future peace.

In 1975 Jim suffered a grave heart attack and was on the brink of the grave. He had to cease work, and since then has become poorer and poorer, for he receives only the basic pension.

In 1978 his doctor announced that his heart would last only another 2 months. However, the doctor would like to try out an entirely new, computerised, "heart-beater". The necessary operation,

he stated was the most complex open heart surgery in Australia, perhaps in the world. (By now, over 50 people have had it.)

The assisted heart has worked wonderfully, but not perfectly. It often goes wrong. He has had to receive 3 new "heart-beaters" and must have a new one in 1983.

Despite his problems, Jim has recently travelled the world as unofficial ambassador for Esperanto and propagandist for Australia. Wherever one goes in Europe one hears, "Oh, I know about Australia! Jim Dimo showed us some slides last month".

Jim still enjoys his food and his way of life, which he is convinced, is "good and beautiful".

At the moment, Jim and Jenny are about to take the lecture cum slides trail round Australia. Wherever you live, they are likely to be somewhere near your place some time in 1983.

—ARTHUR COCKING.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'iči Išizaki)

La organizo de tokiaj E-grupoj okazigis Aŭtunan Seminarion en la Japana Esperanto-Instituto. 43 esperantistoj partoprenis. Entute okazis 12 prelegoj pri tre interesaj temoj, ekz. "La Gregoria Kalendaro 400-jara", "Akvaj problemoj de Tokio", "Kion manĝas japanoj?", "Komputiloj kiuj vidas", "Modernaj Teknikoj en Telekomunikado".

La 56-a Kjuŝua Kongreso okazis en la urbo Miyazaki kun partopreno de 60 esperantistoj. La prezidanto de tiu regiona organizo, D-ro SUGITA Masaomi, malfermis la kongreson kaj prelegis pri "La 50-jara historio de la Miyazaki E-Societo.

Ĉiuj partoprenantoj ricevis kiel memoraĵon la libron "La insulo mergita kaj aliaj rakontoj el folkloro de Miyazaki", komunan tradukaĵon de lokaj membroj. Postkongrese, kelkaj interesitoj vizitis la hejmon de D-ro Sugita por apreci portreton de D-ro Zamenhof, pentritan de la konata pentristo-esperantisto, S-ro El Kyu, la frato de D-ro Sugita.

Kvin semajnojn post tiu kongreso, la Gubernio de Miyazaki publikigis la nomojn de premiitoj de Gubernia Premio pri

Kulturo. Al D-ro Sugita estis aljuĝita la Gubernia Premio pri Kulturo pro lia 50-jara strebado disvastigi Esperanton kiel internacian komprenilon kaj gvidado de esperantistoj en la Gubernio Miyazaki. Okaze de la nacia tago de kulturo la Guberniestro transdonis al D-ro Sugita la Premion, kiu konsistis el Atesto, Mehormedalo kaj ĉeko de 200.000 enoj.

La dekan fojon okazis "kunloĝado" de esperantistoj en Nagoja. Ĉeestantoj dividigis en 2 klasojn. Unu klason gvidis aŭstralia esperantisto BOWLING*, kiu instruis per la libro "A Practical Course in Esperanto". Ĉeestantoj ankaŭ aŭskultis al interesaj paroladoj, i.a. "Pri la Esperanto-movado en Aŭstralio" de S-ro BOWLING*.

(*Ĉu nia membro D-ro K. Bowling, el Turramurra, N.S.K. ? Red.)

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

1982/83

Antaŭe raportita	\$668
Anonima	20
W.A. Esperanto League, Perth	45
F-ino A. Curtis, Nth Tambourine, Qld.	3

\$736

Registered by Australia Post.

Publication No. VBH 1849.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 205 (285)

MELBOURNE

Aprilo-Majo, 1983

Walter Mudrak en Radio Vieno

PATRO MAKSIMILIANO MARIA KOLBE KAJ ESPERANTO

Estas bedaŭrinda kutimo, ke en raportoj pri eminentuloj ĝenerale, se ili ankaŭ estis esperantistoj aŭ Esperanto-akcelantoj, ne menciis, efektive ignori tiun fakton. Tio ankaŭ koncernas Patron Maksimiliano M. Kolbe, mondvaske konata, ke li, en vera sinofero dediĉis sian vivon anstataŭe al alia koncentrejano, famil'estro (ankoraŭ nun vivanta) en la koncentrejo Auschwitz, suferante malsatmorton, ordonitan de la tieaj Nazi-potenculoj.

Patro Kolbe, ano de la minoritaj fratoj de la Franciskana Ordeno, estis proklamita sanktulo, sanktulo kiel martiro de la Romkatolika Eklezio, la 10-an de oktobro, 1982. Sed apenaŭ, oni povas diri tute ne, estis menciita lia aneco al Esperanto. Des pli necesas raporti pri tiu notinda fakto.

Ni scias kaj legas pri tio i.a. en "Espero Katolika" de januaro 1975, Okazis post la beatigo kiel "konfesanto" 1972, Simpozio, aranĝita memore je li en Nepokalanow, en regiono de Varsovio, monaĥa fondaĵo "Maria Hejmo" de P. Kolbe. Partoprenis invit'oj ne nur

el Pollando, sed ankaŭ de aliaj landoj kaj ankaŭ reprezente por KELI, la Kristana Esperantista Ligo Internacia, do por la protestantaj kungefratoj, pastoro s-ino Nelly Koopmans el Nederlando.

Kuncelebris tiam Mons. d-ro W. Miziolek, helpepiskopo de Varsovio, kun 30 sacerdotoj, sanktan meson. Li tiokaze ankaŭ konstatis, ke "la funda kono pri la moderna mondo kaj ties streboj al unueco, kondukis Patron Kolbe for de la patrujo al Japanio, kie li estimis la signifon de Esperanto dum lernado de la malfacila japana lingvo". Tiam li ankaŭ skribis al polaj esperantistoj en 1937: "Via partopreno en la Esperantomovado plaĉas al la Senmakula"; kaj alia eldiro lia "KAVALIRO ESPERANTO trovus certan sukceson eĉ ĉi tie en Japanujo" (El letero al P. J. Naz'm Mugenzai no Sono, 1931). Tiuj kaj aliaj tekstoj pri kaj por Esperanto troviĝas en pola kaj Esperanto-lingvo sur memortabulo ĉe la altaro de P. Kolbe en Nepokalanow.

La esperantistaro tutmonda vere povas goji kaj esti fiera pri tiu adept'o de

Esperanto, kiu povas, prave kaj rajte, esti konsiderata esperantisto laŭ ideo kaj praktiko.

Estas speciala tasko de ni esperantistoj, atentigi pri tiu fakto en konekso kun unike meritplena Patro Kolbe ne nur en kristanaj rondoj, sed entute inter etike kaj humanece motivigitaj kunhomoj niaj.

KLAĈAJ ANALOJ DE 1982

II

En Okcidenta Germanio la Imperiestro Helmut la Unua mortis, vivu Helmut la Dua! Nia kolego tuj montris kiel, per lojala nesubteno, oni povas en unu tago —la Bundestago—ŝanĝi plimulton en la malon. La Prezidento tiam devis decidi ĉu, laŭ la Konstitucio, sufiĉas ke la imperiestro nur ŝajne ne havas vestojn aŭ ĉu li devas esti vere nuda! La politika stabileco en la Respubliko estis ankaŭ minacata de plago de verdemuloj, kiuj eĉ pli fanatike ol la fruaj Esperantistoj, kriis kaj postulis sanktan harmonion senbomban.

En 1982 la pretendanta reĝo de Albanio, Leka (Sennumera), kiu loĝas en Sud-Aŭstralio kun sia Afrika edzino aŭ inverse, ankaŭ eliris el la obskuro dum vizito al Parizo. Oni raportis, ke kelkaj el liaj korteganoj vizitis plaĝon sur la norda marbordo de Albanio vestitaj per naĝiloj kaj armitaj per aerharpunoj. La soldatoj, kiuj tre ŝatas esti senditaj albanoj, kuniĝis kun la turistoj kaj jetis amasojn da lekantoj en la maron.

En Afganio la konfrontado kontraŭ la bel-riluloj aŭ ebriluloj daŭris. La 68-jaraĝa Reĝo, kiu loĝas en Romo, ĉar li ne ŝatas danci eĉ belajn rilulojn, subtenis la rilulojn nur voĉe. Same demonstraciantoj en Teherano ankaŭ nur voĉe urĝis, krude kaj nude, ke la belaj riluloj starigu ajatolan ŝtaton. La ruza savarmeo kompreneble ankoraŭ restas en Afganio, ĉar ĝis nun la rezuloj ne trovis la personon kiu invitis ilin savi la landon!

La golfmilito inter Irano kaj Irako ankaŭ daŭris, sur la sablaj golfejoj de tiu regiono inter la riveroj. La Iranoj ne povis atingi ŝaton de la araboj. Spertoj en Esperantio pri geografiaj nomoj kredas, ke nepre devas esti ligilo inter la iroj de Irlando kaj la lando Iro, el kie devenas la Iranoj.

Kiel kutime, alia monarko, Monako Begin de Israelo, ofte okazigis novaĵojn. Kiam lia armeo invadis Libanon por defendi Izraelon kontraŭ la palestinanoj kaj por libanigi Bej-ruton,, la juda monarko ne stimulis sirian sirenon. Do, malicaj kristanaj kameletoj metis la nazojn en la tendojn de la araboj. Sajne estis tro da siringoj inter la libanaj cedroj. Tial la usonaj marsoldatoj devis denove forlasi sian halon de montozumado kaj vadi ĝis la marbordoj de Tripolo.

En Azio la Eta Princo de Kamboĝo, monarko de la kampoĉina ordeno, multe vojaĝis, ĉefe por sidi en sia fotelo aŭ fotejo en la Generala Asembleo da Unuigintaj Nacioj. Por protekti sian sidlokon tie, kaj en la Arĝenta Turo en Parizo, li faris aliancon kun la ruĝaj kimeroj por efektivi la belan sonĝon de la omaro.

La Reĝo de Siamo, amiko de Princino Anna, havis multe pli da sukceso en sia batalo kontraŭ la banditoj sur la vila aŭ liva bordo de la Mekonga Riviero. Sed li ne povis persvadi la kamparanojn ĉesigi la kultivadon de floroj — ili restis tre kato-likaj en sia adorado de la avo, t.e. de la papavo. Multaj aŭstraliaj turistoj ankaŭ vizitis tiun landon por preĝi en la temploj pense kaj incense; "O pia papavo"! Kelkaj eĉ intencas resti tie dum multaj jaroj por traprovi la tielandajn karcerojn.

En Usono, kie ne estas Reĝo, sed nur Reganto, ĉi tiu trovis solvon de la situacio en Meza Oriento per kreo de regno palestina ligita al la Reĝa Jorlando kie la Reĝo Husano akceptis la rolon iniciati fandiĝon alivorte fandangon. Pli grava por la reĝa Husaro estis la malfeliĉo de fratino, unu el kies atendantaj virinoj arestiĝis en Aleksandrio (Italio). Oni akuzis ŝin de la krimo ŝmuglado, ĉar ŝi importis juvelojn je valoro de \$700,000 en Italion. La virino, Husarino Aminda aŭ Amata kaj ŝia filo diris al la policanoj, ke ili tute ne sciis ke la landlima policano estis dog-ano.

En Esperantio en 1982, kiel kutime, ĉio estis trankvila. En la kortego, kiu reiris al Eŭropo post kongresa vojaĝo al Brazilo, la genealogia arbo estis tre stabila. En Antverpeno dum la U.K. la reganta Prezidanto proponis al la verdaj socialistanoj de la Zamenhofa Grego koktelojn kaj fincan konsilon. En sia

raporto li pruvis sian lertecon pri modistaj investoj. Li resumigis sian kredon en la filozofia moto de la fama imperiestro:

"Pli bone porti investojn ol neniujn!"
—ROLO.

LA SIGNIFO DE ADJEKTIVOJ KUN LA PREFIKSO "TRANS"

Bernard Golden

Demando pri la prefiksa signifo de "trans" estis prezentita de K. G. Linton el Aŭstralio ("Heroldo de Esperanto", 1973, 4-5). Li diras, ke "transmaraj landoj" estas evidente "landoj, kiuj situas ĉe la alia flanko de la maro", sed demandas, kion povas signifi "transatlantika vojaĝo"? Laŭ lia interpreto ĝi estas "vojaĝo, kiu komenciĝas ĉe unu flanko de la Atlantiko kaj finiĝis ĉe la alia flanko. Tamen, mia opinio, en alia kunteksto ĝi povas signifi vojaĝon faritan en transatlantikaj landoj. La ambigueco estas pli okulfrapa en jenaj esprimoj: "transmara komerco" kaj "transoceana esplorado". Ĉu la komerco kaj esplorado okazis en foraj landoj trans la maro, aŭ ĉu oni volas esprimi, ke la agado okazis inter vendantoj kaj aĉetantoj, kaj fare de esploristoj, sur maraj vojoj? Ankaŭ en **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV) troviĝas kontraŭaj difinoj

- (a) transmara — estanta trans la maro (transmara lando, komerco)
- (b) transoceana — iranta trans oceano (transoceana flugo)

Fakte, 'maro' kaj 'oceano' estas sinonimaj: Kial, do, PIV difinas la prefiksitaĵojn vortojn dumaniere? Tiun ambiguecon komprenis la eminenta esperantologo Eugen Wuester ("Die Verhaeltniswoerter des Esperanto", 1968, p. 16), kiu analizis 'transmara' jene:

- (1) estante trans la maro.
- (2) iranta trans la maron.

Ankoraŭ du transakvaj ekzemploj montros la nekonsekvencon difinadon en PIV.

- (c) transatlantika — sed difino (transatlantika flugado)
- (d) Transganga Hindujo — la parto de Hindujo kuŝanta oriente de Gango.

La signifo de 'transatlantika flugado' probable simila al tiu de la difinita 'transoceana flugo': la prefikso 'trans'

indikas la direkton kaj celon — al la alia flanko de akvoetendaĵo. Male 'Transganga' estas difinita kiel rilatanta al loko sur la alia flanko de la rivero.

Unu adjektivo bazita sur montara nomo estas registrita en PIV;

- (e) transalpa — troviĝanta sur la galla aŭ franca flanko de la Alpoj.

La adjektivo priskribas lokon transe de Alpoj. Rimarku, ke la parto de Hindujo okcidente de Gango estas 'Cisganga Hindujo', kaj 'cisalpa' rilatas al la itala flanko de Alpoj.

Ankoraŭ unu anomalia estas la kazo de la substantivo post 'trans', kiam temas pri movo al alia flanko. Dum en PIV troviĝas 'iranta trans oceano' kun la nominativo, Wuester skribas 'iranta trans la maron' kun la akuzativo. Malgraŭ Zamenhofaj ekzemploj kun la akuzativo, G. Waringhien argumentas favore al la nominativo (Plena Analiza Gramatiko, 1980, p. 258). Kiam temas pri prefiksita adjektivo, pluraj povas esti ambiguaj, se mankas sufiĉe klara kunteksto. La enkonduko de la akuzativo helpas elimini dubon pri la senco. Mi proponas kiel solvon la adjektivigon de la adverba akuzativo de direkto (ekze 'hejmen', 'teren', 'ĉielen') por indiki, ke la agado okazas ne nur sur la alia flanko, sed de unu flanko al la alia.

transmar + en + a = transmarena
transocean + en + a
= transoceanena
transatlantik + en + a
= transatlantikena
transalp + en + a = transalpna

Por emfazi, ke la prefiksita adjektivo rilatas nur al la transa loko sen al — aŭ tramovo, oni povas uzi kiel prefikson 'transede' aŭ 'eltrans'.

transedemara eltransmara
transedeoceana eltransoceanena
transedeatlantika eltransatlantika
transedealpa eltransalpa

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Je 23-a de feb. dek tri membroj ĉeestis kaj partoprenis, en 3 grupoj, diskuton pri la ebleco aranĝi Esperanto-kongreson en Perto en 1986. D-ro Einihovici legis raportojn el "Heroldo", post kiam membroj partoprenis en ludoj.

Je 9-a de marto ni havis la plezuron gastigi F-inon Majo Issobe el Tokio. D-ro Einihovici denove legis novaĵojn el "Heroldo". Okazis diskuto pri la venonta kongreso en Kanbero kaj la post-kongreso en Manly kaj oni denove priparolis la eblecon organizi kongreson en Perto en 1986.

● **ADELAJDO:** Okazis kunveno je 7-a de marto. Ĉar kurso okazas antaŭ la klubkunveno, pluraj gekursanoj restis kaj partoprenis la grupvesperon. Ni sidis ĉirkaŭ la kaftablo, aŭskultis al la klarinet-ludado de Neill Hart kaj kantis kantojn el la nova kantaro "Aŭstraliaj kantas sian Historion".

Je 11-a de aprilo ni diskutis ĉu ĉi ĉemeligi kun transmara Esperanto-klubo kaj decidis kontakti klubon en Hampshire, Anglujo. Bob kaj Audrey Felby montris filmon pri Kopenhago kaj la Nordo de Selando. — BOB FELBY.

● **MELBURNO:** Kelkaj Melburnanoj, 4-a de marto, havis la plezuron renkonti la junan japaninon Majo Issobe el Tokio. Ni gvidis ŝin al la Botanika Ĝardeno kaj montris al ŝi la Esperanto-Domon. En la vespero Majo estis gasto en la hejmo de Ges-roj Koppel.

Je 7-a de marto S-ro H. Koppel prelegis pri "Novaĵoj el Esperantujo". Je 28/3 S-ro S. Kanaĉki kaj S-ro Marshall Cohen rakontis kiamaniere ili fariĝis esperantistoj. Du semajnojn poste S-ino Fay Koppel, Ken Linton kaj Herbert Koppel siavice daŭrigis tiun temon.

Bonvena gasto je 18-a de aprilo estis S-ro Mac Le Fevre el Launceston (Tasmanio). S-ro H. Koppel prelegis denove pri "Novaĵoj el Esperantujo".

● **KANBERO:** Ĉiumerkrede S-ino Marj Ellyard gvidas kurson por komencantoj laŭ la libro "Esperanto for Beginners".

Progresantoj kunvenas ĉiulunde. Gvidanto estas S-ro Ralph Harry kaj oni uzas la libron "Step by Step in Esperanto".

Je 5-a de aprilo okazis "Lud-Vespero" S-ino M. Ellyard organizis la ludojn kaj S-ro Harry diskutis kun la membroj, ne serioze, eblajn novajn nomojn (laŭ sugesto de S-ro Charles Perkins) por la aŭstraliaj ŝtatoj. Oni proponis "Cignolando"n por Okcidenta Aŭstralio, "Megilando"n por Suda Aŭstralio, "Batman-urbo"n por Melburno.

● **SIDNEJO:** Je 28/2 S-ino M. Chandelcote parolis pri la temo "Kiel uzi la vortetojn". Ŝi citis vortojn listigitajn en la lernolibroj 'Nelson' kaj 'Teach Yourself' kiuj fakte estas nur aŭ prefiksoj aŭ sufiksoj kun la gramatikaj finaĵoj; ekz. 'Indas', 'Aligi', 'Male' ktp. kaj la stranga 'nelsona' vorto 'Anigemulino'. Pensiga teorio!

Je 7/3 ni diskutis diversajn artikolojn, kiuj aperis en la plej nova 'Monato'. Samvespere, ni bonvenigis Ges-rojn Gaetano kaj Maria-Elena Pryzyski, el Pollando, kiuj restos en Sidnejo dum kelkaj semajnoj kaj volas vojaĝi suden.

La 14-an de marto okazis nia Jarkunveno. Oni elektis la jenan estraron: Prezidanto, Sekretario kaj Raportisto: S-ino M. Chaldecote; Vic-Prez: S-inoj S. Purkitt, S. Fanos; Bibliotekisto: S-ro J. Harwood; Kasisto: S-ino S. Fanos; Kas-kontrolistoj: Ges-roj M. kaj T. Elliott. —M. Chaldecote.

● **MANLY:** Aranĝoj por la Post-Kongresa Renkontiĝo bone progresas kaj Marjorie Duncan raportas, ke 20 personoj jam mendis loĝadon en lokaj hoteloj.

La 8-an de aprilo Robby Roberson estis intervjuita dum 25 minutoj en la radio-programo "City Extra". Robby brile respondis al demandoj pri la strukturo kaj praktika utileco de Esperanto kaj rezultis multaj petoj por informo rilate al la lernado de la lingvo.

—EUNICE GRAHAM

● **ST. LUCIA:** Je 23-a de marto la anoj de nia klubo bonvenigis S-inon Anne Whittaker el Portland, Oregon, Usono. Anne informis, ke ŝia klubo havas proks. 15 anojn. Ŝi ankaŭ rakontis, ke en 1972 tiu malgranda klubo tre sukcese organizis Universalan Kongreson en la tiam novkonstruita Hilton-Hotelo en Portland.

Ŝi kuraĝigis nin ĉeesti la venontjaran Universalan Kongreson en Vankuvero,

Kanado. Si priskribis kelke da vidindaĵoj rilate al la postkongresaj ekskursoj en la Portlanda regiono.

Kiel memoraĵon de ŝia vizito en Kvinslando, dank' al la Brizbana Klubo, ni donacis al Anne la ĵuseldonitan kantlibron de tiu klubo "Aŭstralio kantas sian historion".

● **BRIZBANO:** Tri klasoj daŭre okazas en la Klub-Ĉambroj ĉiun lundon, kie la anoj aŭ studas aŭ partoprenas diskutojn. La konversacia rondo, posttagmeze ĉiun Sabaton, laŭvice vizitas la hejmojn de la partoprenantoj. La kantgrupo preparas erojn por la E.F.K. Konferenco en Toowoomba, 7/8an de Majo.

Tre plaĉis al ni bonvenigi S-inon Anne Whittaker, Portland, Usono, kiu vizitis al parencoj kaj en Brizbano kaj en Caloundra. Anne parolis pri la laboro necesa dum la UEA Kongreso, kiun ŝi helpis aranĝi en Portland, antaŭ kelkaj jaroj. Tio multe interesis nin, kiuj eble frontos al tia situacio en 1988.

Oni aranĝis studsemajnfinojn je la fino de Junio en Tamborine. —RR.

PETO POR HELPO

Jen estas peto por helpo pri specialaj aspektoj de la Historio de A.E.A. Temas pri la fruaj jaroj de ĉiu grupo, klubo aŭ societo, ekde la Melburna Esp-o Klubo en 1905 ĝis hodiaŭ. Rilate al la Historio de AEA, estas relative simpla afero skribi datojn kaj aliajn statistikojn, sed la esence baza fundamento de tia historio restas kun la grupoj/kluboj. Ĉar ne estas haveblaj al mi fruaj protokoloj, mi petas helpon pri iuj ajn personaj detaloj; multaj anoj laboris pri klubaferoj, krom la estraroj, kaj sendube meritas mencian en la analoj de la kluboj. Ĉi tiu sekcio de la historio probable estos la plej grava en la tuta verko. Do, analistoj kaj samideanoj, mi atendas vian novaĵon pri via klubo aŭ societo. Antaŭdankon!

Ray Ross (Komisiito pri la Historio de AEA.)

KOREKTO: En la lasta eldono de nia gazeto (p. 160) ni raportis, ke S-ino Marjorie Ellvard gajnis la Elementan Diplomon. Tio estis eraro, ĉar S-ino Ellyard sukcesis en la Ekzameno por la Aŭstralia Norma SUPERA Diploma. Ni petas ŝian pardonon.

N. BUTKUNAS

Mortis en Melburno, la 13-an de marto, 1983, S-ano Napoleon BUTKUNAS, 76-jara. Li lernis Esperanton en Litovio kaj enmigris Aŭstralion post la dua mondmilito. Li estis membro de A.E.A. kaj fidele vizitis la kunvenojn de la Esperanto-klubo en Oakleigh.

24 a AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 1-7-1983: \$20 (poste \$25), Pensiuloj, studentoj \$15 (poste \$20).

Sendu vian kongres-kotizon al S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon, Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE". Sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

2-a Listo de Aliĝintoj

13. Idyss Einihovici, Perth
14. D-ro. Tim Einihovici, Perth
15. Joyce Turner, Rockhampton
16. William Leah, Curlewis, NSK
17. Sheila Leah, Curlewis
18. Marjorie Duncan, Manly
19. Barbara Williams, Melbourne
20. Terry Metherall, Marmong Pt., NSK
21. Herta Mueller, Sydney
22. Sylvia Burkitt, Sydney
23. Isabel Gale, Melbourne
24. Prof. R. Robertson, Sydney
25. Margaret Robertson, Sydney
26. Bob Felby, Adelaide
27. Audrey Felby, Adelaide
28. Joan Green, Coal Pt., NCK.
29. Herbert Koppel, Melbourne

Laŭŝtata distribuo: N.S.K. 11, Kvinslando 5, Viktorio 5, A.C.T. 3; Okcidenta Aŭstralio 3, Sud Aŭstralio 2.

Vizito: al Mt. Stromlo Observatorio:

Se vi deziras viziti la faman observatorion dum la vespero NEPRE TUJ kontaktu S-inon M. Ellyard, ĉar **NUR 15 personoj** povos partopreni en tiu ekskurso (Ne grumblu en januaro se via nomo ne estos sur la listo. AGU TUJ!).

DRAMO-KONKURSO: Okazos denove konkurso por la Drama Trofeo de A.E.A. kaj lokaj grupoj anoncu sin tuj. Via prezentado devos esti almenaŭ dekminuta, sed devos NE daŭri pli ol 30 minutojn. Se eble indiku la titolon de via prezentado.

MUZIKA TROFEO: Okazos ankaŭ konkurso por la Fritz Mueller-Soraŭ Muzika Trofeo por Kant-Grupoj. La reguloj estas: La kantistoj devas esti de unu klubo. La grupo konsistu el almenaŭ 3 kantistoj. Ili kantu, en Esperanto, du erojn, laŭ propra elekto.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$736
S-ro C. Dunstan, Brisbane	5
S-ino E. Oliver, Orelia, W.A.	10
S-ro S. Kanački, Melbourne	2
S-ro Stan Kelly, Melbourne	1
S-ino K. Gassner, Sydney	2
S-ino Olive Russell, Sydney	10
S-ino Marj. Duncan, Manly	20

\$786

KIE OKAZOS LA 1986-a KONGRESO ?

La venonta kongreso en Kanbero devos decidi kie okazos la kongreso en la jaro 1986. Kiam oni studas la liston de la pasintaj kongresoj, oni tuj trovas, ke ne plu okazis kongreso en Perth dum 14 jaroj. Ke Pertanoj deziras okazigi tiun kongreson montras la sekvonta letero ricevita de nia redakcio:

"Estas nia vico, eĉ malfrua vico, organizi la landan kongreson en 1986 ĉe ni en Perth. Ni havas ĉi tie entuziasman grupon por entrepreni tiun taskon. Kongresejo, kaj agrabla kaj komforta, apud bushaltejo troviĝas en Perth.

Perth estas verda urbo ĉe la rando de dezerto. La "King's Park" en la urbocentro estas unika. Perth havas belan ĉirkaŭaĵon, kie troviĝas akvofaloj, riveroj kaj montoj en pitoreska scenejo. Spuroj de la pasinteco estas vidindaj, kiel ekzemple "Mahogany Inn", malnova domo, restarita kaj meblita en la ŝtilo de la pasinta jarcento. La domo estis iam en la centro de la vojrabista aktiveco.

Kompreneble, ni volonte uzos la organizan sperton, rilate al kongresoj, de la samideanoj en la orientaj ŝtatoj. Ni bone komprenas la malavantaĝojn

kaŭzigitajn de la granda distanco. Pro tio eblas tre grave por ni scii kiel eble plej frue, kiom da partoprenantoj ni povos bonvenigi.

Mi esperas, ke ĉi tiu letero kaŭzos simpatian resonon.

Multajn salutojn,

R. Smeets, Prezidanto de la
E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio

PUBLIKA RADIO-RAPORTO

Radio-Stacio 2MCEFM Bathurst, NSW elsendis du Radio-Programojn ĉiusemajne dum 3 jaroj. Tiuj Esperantaj programoj estis edukaj, informaj kaj du-lingvaj skeĉoj, kaj ĉiuj daŭris 5 minutojn. Entute estis 13 lecionaj, 96 dulingvaj kaj 8 informaj programoj, kiujn uzis "MCEFM. La radio-stacio uzis kaj uzos pli longajn Esperantajn programojn iinteresiĝi kiam ili estas haveblaj.

En la Jan.-Feb. "Australian Esperantist" aperis unu el la 96 du-lingvaj skeĉoj elsenditaj per radio.

La Manly-Warringah Publika Radio ekfunkcios en septembro 1983. Anoj de la Manly Esperanto-Klubo jam vizitadas komitatajn kunvenojn de tiu radio-stacio por amikiĝi kun la anoj kaj helpi ĉiel eble. Tiel niaj programoj estos elsendataj ĉiutage per tiu radio. Fakte, ni povus havi duonhorajn programojn. La problemoj estas nur la preparado de la programoj. Do, la ĉiutagaj programoj devas esti tiuj, kiujn ni jam havas, kaj tiuj estas la 116 kvin-minutaj programoj de Bathurst kaj la 13 "Bonan Tagon" lecionoj de Kvinlando.

—Roger Springer.

LA UNUA ESPERANTO-STRATO EN AŬSTRALIO

Sub ĉi tiu titolo "Heroldo de Esperanto" de 10-a de marto, 1983, raportis pri la inaŭguro de "Esperanto Way" en Balga, antaŭurbo de Perth. Kvankam ni devas gratuli al S-ino I. Einihovici pro tiu sukceso, ni tamen devas atentigi, ke la honoro pri la unua Esperanto-strato en Aŭstralio ne apartenas al niaj okcident-aŭstraliaj amikoj kaj al S-ino I. Einihovici, sed al la kvinlandaj esperantistoj kaj la mortinta Kavalirino V. Fraser.

Estis en la jaro 1964, ke, pro intensa propagando fare de S-ino Fraser, la urbestro de Redcliffe tiel firme konvinkigis, ke en Esperanto kuŝas la solvo de la lingvo baro, ke li proponis al la

Konsilantaro, ke nova strato apud la konstruota hospitalo estu nomata honore al Esperanto. La nomo de la ĉef-konsilantaro estis S-ro J. E. Houghton, la jaro 1964.

POST-KONGRESO EN MANLY

La Manly Esperanto-Klubo invitas vin al "Apudmara Renkontiĝo" tuj post la landa kongreso en Kanbero. Ĝi okazos de la 15-a ĝis 21-a januaro, 1984.

La programo inkludas aŭto-ekskursojn al vidindaj lokoj, gajajn festmanĝojn, distrajn vesperojn, ĉiutagajn eblecojn por naĝado, krozadon ĉirkaŭ la haveno.

Vi povos loĝi aŭ en "People's Palace" (\$11 nokte, inkl. de kuirita matenmanĝo), aŭ en "Hotel Manly" (ĉ. \$25 nokte, kun propra banĉambro).

Gravas, ke vi **TUJ** rezervu ĉambron, sendante antaŭpagon de \$11 al Manly Esperanto Club, P.O. Box 415, Manly, NSW, 2095. (Aldonu 10 c imposton por interŝtataj ĉekoj kaj afrankitan koverton.)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO 25 — CYRUS J. CALDERA

THE PATRIARCH

We could have called him "the Moses" of the Australian Esperanto Movement", for, like Moses, he led (and at times drove) his people to the Promised Land. Like Moses, for 40 years in tenderness and occasional anger, he saw and ensured the best interests of his people, but he went further than Moses. Moses took his people to the Promised Land. Dr. Caldera took his people **into** it!

Now, as an old man of 96, he sits in the Land of Promise Fulfilled, looking back on his labours.

The "inward eye" of an old man can see back a long way. He sees, in reverie, his boyhood in Northern Italy at the foot of the Alps. He has a troubled dream — a nightmare — about the coming of Fascism. He remembers how "fierce indignation" lacerated his heart so that he could no longer keep silent. Principle, to him, was more important than security so he sacrificed his position as Professor and Ear Nose and Throat Specialist in the famed Pavia University, and came, as a refugee of conscience, to Australia.

From an early age he had shown great potential in his studies. He had graduated with honours in medicine at Torino University. After a very few years he had become a well known E.N.T. specialist and in 1923 he had developed a unique and most rewarding clinic at Pavia.

On leaving Italy, he was offered a Chair in several Universities but many of the e — such as those of South America — did not appeal to him because of the anti-democratic nature of

their regimes so he came to us, at first to Brisbane in 1926.

In 1939, in Perth, he began his Esperanto career, prompted and inspired by the late Isidor Masel. As in all his endeavours, he threw himself into the study and the ideal of Esperanto, to which he has ever since been wholly dedicated. In a few years he became the erudite Esperantist, achieving the highest degree of Klereco with honours.

At this time the Australian Esperanto Movement was not wandering in the wilderness but two matters gave Dr. Caldera concern. Physical conditions for learning — in Perth — were not conducive to study. It was typical of Caldera that he didn't just **hope** for a change. He worked, and paid for it, so he rented — paying the rent from his own pocket — suitable accommodation so that different levels could be taught in different rooms. The fact that Australian Esperanto was tied to the British Examination setup also irked the good doctor. He pressed and pulled and pushed and organised until the present Australian Esperanto Examination system became established. In due course he became an Examiner.

He has been President of A.E.A., but it was, perhaps, in local activities that he made his special mark. A strict, tireless teacher who at times tired out his students so that at the end of his long sessions they felt that their brains and their bottoms were quite benumbed; a superb organiser, on occasions organising people — for their own good — in ways in which at first they didn't want

to go; a short giant with a daunting mien which covered up a compassionate and considerate nature; a subtle humorist; an inspiration; a guide, philosopher and a good friend. This is how so many remember him, with love and respect.

Now his advanced age precludes a very active interest in Esperanto, though e.g. he recently inspected the newly named Esperanto Way, but he still has a contemplative, retrospective interest in it, especially in Australian Esperanto which he helped to mould. So, he sits — in serenity — tendered and “fussed over” by his wife (formerly his nurse-receptionist whom he married 45 years ago).

(This information was supplied by Tim Einihoviĉi and Ruth McGrath. Tim is his grateful former Medical Assistant and protege. Ruth is his adoring former student. However, these are only two of the many good Esperantists whose Esperanto life was shaped by Dr. Caldera. His name crops up time and time again; so much so, that, although I never met him. I almost feel that I knew him in the summer of his vigor. So many have given such clear word portraits that I can almost see him—an academic with the common touch, a man of intellectual and personal integrity, an achiever, a man whom one would be proud to claim as associate and friend)

—ARTHUR COCKING.

Al D-ro Caldera estis aljuĝita la A.E.A. Honor-Insigno en 1976. (Vidu “A.E.” — aprilo/majo, 1976, paĝo 26).

RECENZOJ

POEZIA BUKEDO Por Geknaboj de la Mondo, de Bertram POTTS (1895-) eld. AMO-AKADEMIO, Tenmori, Kozo'i, Aŝiken, Japanujo. Ned. guld. 10.00 plus 25% por sendkostoj.

Jen volumeto, kiu tuj allogas unuavice pro kolorplena kovrila desegno — ilustraĵo pri nur unu el ties internaj juveloj. Plaĉas al la okuloj ankaŭ multaj instru-

helpaj vinjetoj kaj bildoj kiuj ornamas la paĝojn. Tamen plej ravaŝ finfine la versoj kun orektiklaj ritmoj multvariaj kaj sorĉa enhavo, tutgame pritraktanta la spertojn, la pensojn kaj fantaziojn de infanoj.

“Poezia Bukedo” estas la kvara volumo de la serio de la FABELO POR TUMONDAJ INFANOJ de AMO-AKADEMIO, kaj, en la vortoj de S-ro Eizo Itoo, kiu subtenis, kaj klopodis por efektiviĝi, ties eldoniĝon “konsistas el multkoloraj bonodoraj floroj, ĉiu kun individua carmo kaj plezuro — verko, kiun ĉiu amanto de nia esperanta literaturo, juna kaj maljuna, devus ne nur posedi, sed informi aliajn samideanojn, por ke ankaŭ ili posedu ĝin kaj spertu la saman ĝuon”.

Kio mankas? Nu, ĉu troviĝas jam geknaboj kapablaj samtempe ĝui la belritmajn versojn kaj kompreni ties enhavon? Por kiu aĝo ili taŭgas? Tiurilate gravas la enkonduka klarigo de spertulo Marjorie Boulton, el kiu jen parto: “la poemoj de Potts . . . ne estas lakto por suĉinfanoj aŭ kaĉo por beboj; sed eĉ infanoj sulĉe frue bezonas pli varian dieton . . . Bertram Potts permesas al si grandan vortaron kaj foje iom pensopostulan sintakson . . . sed en la ĝusta stadio de lingvo-lernado infanoj ofte tre ŝatas novajn vortojn . . . jen, jam ni havas volumon kiu ŝanĝas la kriteriojn de postkomencaj esperantaj infanoj poemoj Multaj gepatroj kredoble dankos, ke ili havas infanlibron, kiun ili povas laŭtelegi laŭpete sen netolereble naŭza tedo; multaj instruistoj dankos, pro solida legolibro, kiu estas vere amuza kaj feliĉa”

Gepatra aŭ instruista gvidado sendube glatigos la vojon por junaj legemuloj, kie jen kaj jen la preskoboldo neeviteble sukcesis eskapi malkovron, kaj kondukos al ĝuplena, ofte ripetenda legado.

—FAY KOPPEL.

Mendu ĉe la A.E.A. Libro-Servo. Se nia Libro-Peranto ne havas la libron, li certe provos akiri por vi.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$29
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 206 (286)

MELBOURNE

Junio, 1983

LA TRIA TUTPACIFIKA ESPERANTO-KONGRESO

Multaj aŭstraliaj esperantistoj scias, ke la unua Pacifika Esperanto-Kongreso okazis inter la 4-a kaj 10-a de januaro, 1976, en "Queen's College", Melburno. Ĝin malfermis la Hon. Murray Byrne, Ministro por Turismo de Viktorio. Ĉeestis 139 Aŭstralianoj, 29 el Nov-Zelando, 9 el Japanujo, 7 el Usono kaj po unu el Kanado, Aŭstrio, Belgio, Irlando kaj Svedio, do entute 189 kongresanoj.

Okaze de tiu kongreso oni decidis organizi pacifikan kongreson ĉiun kvaran jaron, ĉiam en la sama jaro kiam okazas Olimpiaj Ludoj.

La 2-a Pacifika E-Kongreso okazis inter la 26-a kaj 29-a de julio, 1980, en la Universitato de Vankuvero, Kanado. Ĉeestis 153 esperantistoj, kiuj venis el Usono (89), Kanado (38), Koreujo (8), po 3 el Aŭstralio, Nov-Zelando kaj Ĉinio, po 2 el Anglujo, Svislando kaj Germanujo, kaj po unu el Hungario, Italio kaj Meksikio. Kongres-Sekretario estis S-ino Marie Zacherl (Vankuvero)

Okaze de la 2-a kongreso, oni sugestis, ke la 3-a kongreso okazu en Honolulo, Havajo, vere centra pacifika loko. Sed tiu propono ne estis tre realisma, se oni konsideras, ke tie troviĝas nur 3 ĝis 4 esperantistoj.

Estis la ĝenerala espero, ke la 3-a kongreso okazu en ne-anglalingva lando, prefere en Japanio. Sed tiu revo

ne realiĝis pro la nekomprenebla malinklino de japanaj Esperanto-gvidantoj organizi tian kongreson.

Des pli ĝojiga estas la novaĵo, ke la 3-a Tutpacifika E-Kongreso ja okazos, ĉi-foje en Portland, Oregon, Usono. La kongreso okazos en la kadro de la kongreso de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, en la Universitato de Portland, Oregon, de la 14-a ĝis la 19-a julio, 1984. La Universitato de Portland estas ideala kongres-loko, kvicita en la mezo de la urbo kaj vivkostoj estas modestaj. Krome ĝi ne estas grandan distancon de Vankuvero (Kanado), kie de la 21-a ĝis la 28-a de julio, 1984 okazos la 69-a Universala Kongreso.

La Kongresa Komitato intencas nomi "Konsilanton" por ĉiu el la ĉefaj landoj de la Pacifiko. La ĝisnunaj Konsilantoj estas:

Usono: Cathy Schulze, redaktoro de "ELNA—Newsletter".

Kanado: Wally du Temple, Prezidanto de la 2-a Pacifika Kongreso.

Japanio: Yosimi Umeda, Estro de Internacia Fako de Japana E-Instituto.

Aŭstralio: Herbert Koppel, Sekretario de la 1-a Pacifika Kongreso.

Pli da informo estas havebla de Jim Deer (Prezidanto de LKK), 11905 SW Settler, BEAVERTON, OR 97005, USA.

D-ro Arthur Baur en Svisa Radio Internacia

RICHARD WAGNER EN ZÜRICH

En ĉi tiu jaro oni ĉie en la mondo memorigas la centjaran datrevenon de la morto de Richard Wagner. Li mortis 1883 en Venecio. La muziko de Wagner ankoraŭ hodiaŭ estas temo de disputoj, inter la admirantoj de liaj grandaj operoj el la ĝermana mitologio kaj liaj kritikantoj ankoraŭ hodiaŭ polemikas, sed ĉiuj rekonas, ke li estis granda muzika genio, unu el la plej grandaj komponistoj de ĉiuj epokoj.

En la vivo de Wagner liaj restadoj en Svislando estis gravaj epokoj. De 1849-58 li loĝis en Zürich, de 1866-72 en Lucerno. Apud Lucerno troviĝas la kampara domo Trübchen, kiu nun estas transformita en muzeon pri Wagner; en Zürich troviĝas la vilao Wesendonck, pri kies rolo en la vivo de Wagner mi tuj parolos. Kiel kontribuojn pri la jubileo de Wagner, la urbestro de Zürich tie instalas salonon kun memoraĵoj pri la restado de Wagner en Zürich.

La kaŭzo pro kiu Wagner venis al Zuerich estis drameca. Li ne venis pro la bela pejzaĝo, sed ĉar lia vivo estis en danĝero. Li estis dungita kiel kortega *dirigento* de la reĝa orkestro en Dresden, Saksio, ekde 1843 sed en 1849 li partoprenis en la sensukcesa demokrata revolucio kaj nur povis eviti la arestadon fuĝante. Li direktis sian vojon al Zürich, ĉar tie li havis amikon en la persono de iu pianisto Alexander Mueller, kiu siaflanke iam estis komponinta opereton kun la titolo "La fuĝo al Svislando", stranga koincido.

Alia komponisto peris al Wagner la konatecon de altaj urbaj oficistoj, kiuj havigis al li senprokraste svisan pasporton. En tiu tempo la burokratoj evidente laboris pli rapide, ĉar Wagner intencis vojaĝi al Parizo por establiĝi tie.

Li efektive vojaĝis tien, sed rapide ekkonis, ke liaj ŝancoj pri ekzisto tie ne estis favoraj kaj li revenis al Zürich, kie li luis modestan loĝejon kaj kien sekvis ankaŭ lia edzino Minna. Post 3 jaroj, kiam li rigardis sian pozicion kiel firmigitan, li translokiĝis al

pli bela loĝejo, kiun li lukse ekpisis. La suldoj pro tio poste multe turmentis lin.

Se oni legas la biografion de Wagner, la zorgoj pri la monrimedoj ĉiam premis lin kaj dependigis lin de mecenoj. Wagner ŝatis vivi en Zürich kaj li eĉ publikigis planojn pri la riĉigo de la tiea teatra vivo, eĉ projekton pri festivala teatro, sed tamen Zürich ne transformiĝis al Bayreuth pro li. En la bavara urbo Bayreuth dudek jarojn poste realiĝis lia aŭdaca plano pri la konstruado de granda festivala teatro, kie ja ankoraŭ nun ĉiujare okazas la grandaj wagneraj festivaloj

Wagner trovis en Zürich multajn amikojn, inter ili la granda verkisto Gottfried Keller, la urba sekretario Bernhard Spytli, la edzo de la fama aŭtorino de la infanlibro 'Heidi' kaj la riĉa komercisto Westendonck.

Wagner partoprenis en la muzika vivo de Zürich, kiun li riĉigis per sia genio. Li direktis en la urba teatro dekunu operojn, inter ili 'Freischiuetz', 'Fidelio', 'Don Giovanni' kaj liaj propraj kreaĵoj kaj li direktis 25 koncertojn. La granda vira koruso de Zürich nomis lin honora membro. Se ni rigardas la datojn, kiam la grandaj operoj de Wagner finiĝis, oni povus kredi, ke liaj jaroj en Zürich estis senproduktaj, ke li trairis ne-krean periodon, sed la datoj trompas. Wagner mem diris poste ke la jaroj en Zürich estis tempo kiam lia krea povo floris, ĉar tiam maturiĝis la ĝermoj, kiuj elkreskis en liaj postaj verkaĵoj.

En Zürich li multe okupiĝis pri la teoria fundamento de sia nova arto, ĉar li ja forlasis la klasikan operon kaj kreis la novan 'totalan' muzikan dramon, kiu ampleksas ankaŭ la aliajn artojn. Pri tio li tiam publikigis diversajn librojn. Plej signifa por tiu tempo estis la verkado de la teksto por lia granda trilogio "La ringo de la Nibelungo", kies muzikon li poste realiĝis plejparte en Lucerno. Wagner mem diris foje: "Lasu min krei la verkaĵojn, kiujn mi koncipis tie, en la kalma belega Svislando vidante la majestajn orumitajn

montojn. En neniu alia loko mi estus povinta koncipi ilin".

Unu grava opero kreiĝis ankoraŭ en Zürich, tio estis "Tristan kaj Izolde". En tiu tragedio de amo estas amplektita multe de lia persona sorto, ĉar inter li kaj Mathilde Wesendonck evoluis amo, al kiu ni dankas hodiaŭ la grandan operon kaj la ofte kantatajn Wesendonck-kantojn. La nomon de Wesendonck mi nomis en la komenco. Tiu riĉa komercisto konstruis al si imponan vilaon en granda parko apud Zürich, hodiaŭ ĉirkaŭita de Zürich, kaj en malgranda domo ne plu ekzistanta hodiaŭ en tiu parko, Wesendonck loĝigis Wagner. Li nomis la dometon azilo kaj ege bone fartis tie, sed la ĝermanta amo inter Mathilde Wesendonck kaj Richard Wagner kaŭzis al li psikan maltrankvilecon, kreis streĉon inter la geedzoj Wesendonck kaj furiozigis la edzinon de Wagner, Minna, kiu neniam vere komprenis la genicon de sia edzo. El tiu situacio kreskis krizo, kiun Wagner nur povis solvi forlasante Zürich. Samtempe Minna kaj li disiĝis. Sekvis maltrankvilaj, malkomfortaj jaroj por Wagner, ĝis lia granda admiranto la bavara reĝo Ludoviko en 1864 malfermis novan epokon en la vivo de Wagner.

K L E R E C O

Du laborkolegoj hazarde renkontiĝis en bulvarda drinkejo, Ambaŭ mendis bieron, kaj baldaŭ komenciĝis konversacio.

"Ĉu vi konas Liszt?", demandis unu el ili. La alia sulkis la fronton kaj respondis kun hezito:

"Eble la nova danco, ĉu?"

La demandinto ekridis: "Dio mia! Ĉu nova danco? Ne, kara kolegio; Liszt estis hungara pianisto, kiu naskiĝis en Raiding en 1811 kaj mortis en Bayreuth en 1886. Tion oni devas scii. Sed diru al mi: Magalhaes certe estas konata de vi?"

"Magalhaes? Ĉu la germana aŭtomobil-konstruisto?"

"Sensencaĵo! Li estis portugala maristo kaj esploristo, kiu la unua veladis ĉirkaŭ la terglobo en 1520. Sed por ŝanĝi la temon: diru al mi, kia estas via opinio pri Cromwell?"

"Ĉu la usona tabako, kiu kelkfoje oni reklamas en la televido?"

"Granda ĉielo! Ne temas pri takako,

sed pri fama brita politikisto. Kaj Rossini? Ĉu eble ankaŭ tiun vi ne konas?"

"Ĉu la bongusta svisa kremĉokolado?"

"Stulta ideo! Li estas mondfama itala komponisto vivinta en Parizo antaŭ pli ol cent jaroj. Sed pri Nero almenaŭ vi aŭdis, ĉu?"

"Mi supozas, ke vi parolas pri la hundo de la viandisto Huber".

"Ĉu la hundo de Huber? Ne, tute ne. Mi parolas pri la romia imperiestro, kiu antaŭ dumil jaroj persekutis la kristanojn kaj bruligis la urbon Romo. Jen vi vidas, kara kolego, kio estas instruiteco kaj kulturo".

"Nu", demandis la ne-tiel-klera ulo, "kie kaj kiel vi akiris tiom da klereco?"

"Ha", ridetis la unua, "tion mi lernis en la Popola Universitato, kie mi partoprenas klerigajn vesperojn dufoje ĉiusemajne".

Subite ekflagris strangaj lumetoj en la okuloj de la alia.

"Se vi konas tiom da homoj, certe vi konas ankaŭ Ruzkap, ĉu?"

"Ruzkap" . . . Ne. Pri li mi neniam aŭdis".

"Vidu", daŭrigis la alia kun insida rideto, "ĝuste lin vi devus koni",

"Kial ĝuste lin?"

"Nu", precizigis la ne-klerulo, "ĉar li estas la viro, kiu vizitadas vian edzinon dum vi sekvas la klerigajn kursojn en la Popola Universitato".

(A.L.—Brazila Esperantisto)

PRI LA PREFIKSO "TRANS":

Mi tute konsentas kun la maniero, kiun proponis nia amiko, Bernard Golden, en A.E. 205, por kuraci la problemon pri "trans", sed mi opinias ke ni devus konfesi, ke la originala elekto de signifo por tiu vorto estis malfeliĉa. Por signifi "en loko pli malproksima ol" ni devintus elekti la latinan "ultra". Bedaŭrinde ni imitis eraron, kiu jam ekzistis en la latina lingvo, kie "transmarinus" signifis "en loko pli malproksima ol la maro", aŭ angle "beyond the sea", kiel ni povus diri ankaŭ latine "ultra maris".

Estas malfacile traduki la anglan "How many bridges has Paris across the Seine?" krom se vi dirus "Kiom da pontoj havas Parizo super la Sejno" aŭ "transverse de la Sejno". Se "trans" signifus "de flanko al flanko kaj "ultra" signifus "en loko pli malproksima ol" la problemo jam ne ekzistus. Kvankam

nia lingvo estas neŝanĝebla, mi opinias, ke ni devus agnoski la difekton por atendi la tempon, kiam ĝi estos ŝanĝebla. Aliaj similaj difektoj ekzistas. En la lasta numero de "UN kaj Ni", N-ro 28, mi rimarkis, ke la redaktoro kuraĝis ŝanĝi iun jam delonge malĝustan vorton, kiam sur paĝo 236 ŝi skribis "agrokultivo" anstataŭ la kutiman "agrikulturo". Intertempe ni devus agnoski la difekton kaj uzi la kuracilon sugestitan de Bernard Golden.

—KEN LINTON.

Por mia amiko Robi

LA TEO

Dum jarmiloj sankta muzo
Kantis pri ver-dona vino,
Kun ebria voĉobtuzo
Laŭdojn sternis ja sen fino,
Sed, neniu korifeo
Flutis pri humila TEO.

Bardoj harpis sub la kverko
Pri meritoj de biero,
Elo bruna el' el sterko,
Flatis sian kun fiero,
Sed ne unu alineo
Pri entasa sorĉa TEO.

Skotoj sur nebulaj montoj
Ŝalmas sake pri viskio,
Akvo el sekretaj fontoj,
Gusto, alkoholo, ĉio,
Sed, en tuta la arĉo,
Fajfas kiu pri la TEO?

En Ruslando samovaro
Anstataŭu vodkon fortan,
Jugoslava drinkoparo
Glutu ne likvoron mortan;
Tuj elvenu el muzeo
Poto, taso kaj la TEO.

Sekvu ni la Japaninojn,
En gastejoj kaj tedomoj,
Ili ne salutas vinojn,
Sed en bonaj trinkaromoj
Ina papilio-feo
Riverencas al la TEO.

Kaj Aŭs-anoj kantu ni
Dum boliĝas bilipoto,
Trinku ni en Aŭstrali'
Ne viskion kiel skoto,
Nek ĉampanon, nek ruĝvinon,
Nek bieron, nek la ĝinon.
Tostu ni en jubileo
Al ecri-libera TEO!

—ROLO

AŬSTRALIA- =KRONIKO

● **PERTO:** La unua pikniko por 1983 okazis je 10-a de aprilo. Estis nur malgranda grupo, kiu kunvenis ĉe 'Woodlands', sed dum bona vetero ni ĝuis malstreĉigan tagon, babilante en Esperanto.

Nian kunvenon de la 13-a de aprilo ĉestis 15 membroj. D-ro Einihovici legis novaĵojn el "Heraldo" kaj S-ro Hawks ekzercigis niajn langojn. S-ino Einihovici informis pri letero ricevita el Ĉinio, ke ĉinaj esperantistoj deziras bonvenigi aŭstraliajn esperantistojn, se ili vizitos Ĉinion.

Simila kunveno okazis je 27-a de aprilo, kiun 14 membroj ĉestis.

● **MELBOURNE:** Je 9-a de majo Ken Linton legis tradukitajn rakontojn. Je 16-a de majo, Marshall Cohen legis interesan artikolon pri "Energio el la Maro". Temis pri granda ingeniera projekto en Israelo por uzi la akvojn de la Meza Maro kaj la Morta Maro por havigi elektron.

Bonvena vizitanto je 23-a de majo estis Harold Gilbert el Cairns, eks-Melburnano. S-ro Chick iom teknike parolis pri ekipaĵo por radio kaj televido. S-ro Koppel raportis novaĵojn el Perto pri drameca vivsavo surmare helpe de esperantista radio-amatoro, Arturo Oliver, kaj S-ro Kanaĉi prezentis sonbendigitajn radioprogramojn el Pollando, Svisio kaj Ekvadoro.

● **SIDNEJO:** 21-a de marto: Ni plue informiĝis pri la Somerlernejo ĉe Armidale, kaj Shirley Fanos legis poemon kaj serion da leteroj, kiujn ŝi verkis dum la kurso. Semajnon poste M. Chaldecott prezentis erojn el la libro "Vort-Teorio" de Rene de Saussure.

Je 11-a de aprilo ni ludis "Scrabble", per la literoj taŭgaj por Esperanto. Je 18-a de aprilo ni rememoris tiujn, kiuj mortis la 14-an kaj 25-an de aprilo. Ĉu iliaj mortoj estis necesaj?

—M. CHALDECOTT.

● **MANLY:** Dum la unua trimestro en la Eduka Centro ĉestis niajn kursojn ĉiumarde (7-9a p.m.) meznombre 25 anoj. —EUNICE GRAHAM.

● **BATHURST, N.S.K.:** La Publika Radio-Stacio 2MCEFM elsendis en Aprilo la sekvantajn Esperanto-programojn: "Bonan Tagon" (Enkondukon kaj 4

lecionojn), plus kvar du-lingvajn skeĉojn (Angle Esperante). En majo sekvis "Bonan Tagon", lecionoj 5 ĝis 8, plus kvin du-lingvaj skeĉoj.

—ROGER SPRINGER

● **BRIZBANO:** Ĉirkaŭ 20 anoj de nia societo partoprenis la Federacian Konferencon en Toowoomba (7-8an de majo). Dankon al la Toowoomba Societo pro la tre sukcesa semajnfino.

Dum nia lasta kunveno ni decidis daŭrigi la kontakton kun nova grupo sur la Insulo Reunio. Tiucele ni preparas kasedon, sur kiu estos prelegetoj, salutoj kaj ero de la kantgrupo. Vizitanto al nia klubejo estas S-ro Wybraniec, ekspolo, kiu loĝis lastjare en Adelajdo. Li serĉas laboron kiel boristo; bonŝancon, S-ro W.!

La 25-26an de junio okazos stud-semajnfino ĉe junulgastejo ĉe Mt. Tamborine: la celo estas provizi Esperantan atmosferon kaj samtempe ekzerci anojn pri diversaj aspektoj de la lingvo. Dume la tri klasoj daŭras ĉe la klubejo.

—R.R.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** La 7-8an de majo okazis la unua konferenco, 1983, en Toowoomba, kie ĉirkaŭ 27 anoj kunvenis. La vetero, post abunda pluvo, estis tre agrabla kaj provizis belegan scenon pro la verdaj parkoj, floroj kaj ĉiam allogaj arboj.

Sabate post-tagmeze okazis Generala Kunveno, kie estis diskutoj pri diversaj aferoj. La Prezidanto raportis pri la rezulto de letero al 13 studentoj el Kvinslando, kiuj partoprenis seminarion en Kanbero rilate al Dag Hamarskjold. Ĝis nun 4 akceptis la EFK-proponon pri donaco de "Teach Yourself Esperanto" kaj esprimis intereson kaj intencon poste lerni la lingvon.

Cliff Bailey raportis pri la fina rezulto de la dek-leciana kurso por Skolttoj; ĉirkaŭ 20 daŭrigas la studadon. Eble la plej elstara novaĵo dum la konferenco estis la starigo de Fonduso "Queensland Esperanto House"; la unua malavara donaco de \$1000 certigas la (eventualan) celon de la fonduso. Oni decidis, pere de la St. Lucia Grupo, organizi la majan 1984-an konferencon en Brizbano. Oktobre ĉijare la Brizbana Grupo aranĝos konferencon en Beaudesert.

Sabatvespere, post la kutima bongusta vespermanĝo, okazis la distra vespero. La Brizbana Kantgrupo prezentis 4 kantojn. Tom O'Grady parolis pri

"Samanismo", Peggy Ross pri Novzelanda Legendo "Tania" de la Rifo: Ray Ross pri "Vivo de la Homo". Annie Spencer solkantis kaj deklamis propran poemon "Per Aŭtobuso al Adelajdo".

Dimanĉe ĉ. 20 anoj veturis al Brookvale Park (45 km okcidente de Toowoomba); tie en 1974 EFK respondis pri du eŭkaliptoj kiel parto de parko de 2500 aŭstraliaj eŭkaliptoj. Foto de la 2 arboj, nuntempe du metrojn altaj, restos en la Esperanto-Domo en Brizbano. Entute tre sukcesa kaj ĝuplena semajnfino, dank' al la Toowoomba-anoj.

—R.R.

● **N.S.K.:** Nia monata kunveno, je 17-a de aprilo, estis pli granda ol kutime. Inter ni, dum la pasintaj semajnoj, estas pola paro Kaetano kaj Maria-Elena Pyrzynski. Ili volis prezenti lumbildojn pri Pollando, do ni decidis aranĝi vespermanĝon post la monata kunveno.

Dank' al la laboro de Sylvia Burkitt, Myrtle Straker kaj aliaj, kaj la kradrostigilo de Robbie, tiuj kiuj volis rosti viandon povis sidi kune kaj ĝui bone preparitan salaton kun la viando.

Ĉeestis multaj "malnovaj" geamikoj kaj kelkaj gastoj, inklude polon Stan Kulski, kiu alvenis en Sidnejo pasintjare. Stan kaj Kaetano parolis tre flue kaj klare pri la diversaj belaj vidindaĵoj montritaj sur la ekrano. La tuta vespero estis tre ĝuinda kaj ni eble okazigos similajn vesperojn denove dum la jaro, sed ne ĉiumonate.

—M. CHALDECOTT.

● **VIKTORIO:** La maja aranĝo de la Federacio estis vizito al 'Potters Cottage' en Warrandyte. Kompense por la malmult-nombra ĉeestantaro (nur 13) estis la agrabla sperto konatiĝi kun du novaj membroj, ĉarmulinoj, kies juna aspekto kontraŭis kun ties universitataj atingoj. S-ino Mary Armour, el Anglujo, estas diplomito pri trafik-inĝenierado kaj S-ino Pam Francis, aŭstralianino, diplomito pri farmacio. Ambaŭ jam multe vojaĝis tra eŭropaj landoj kaj spertis lingvajn malfacilaĵojn.

KANBERA INTERKONATIĜA SEMAJNFINO

Grupo el Sidnejo veturis aŭtomobile al la nacia ĉefurbo la 23-an de aprilo kaj restis dum la semajnfino por ĉeesti kunvenon de la loka klubo, viziti la vidindaĵojn kaj partopreni la aŭroran Diservon.

Sabaton vespere ni iris al Belconnen, kie S-ro Ralph Harry varme bonvenigis nin al la Kanbera klubo, kie oni distris nin per filmoj kaj ludoj, ankaŭ regalais nin per bongustaj sandviĉoj kaj kukoj.

Dimanĉe ĉiuj piknikis kune apud la Cotter-rezervujo; kvankam pluvis preskaŭ la tutan tagon, la arboj estis buntaj kaj la sandviĉoj provizitaj de S-ino Robertson estis bongustaj. Je Anzac-tago ni ĉeestis la aŭroran Diservon ĉe la Aŭstralia Milit-Monumento.

S-ino Sylvia Burkitt estis la kapabla organizanto de la karavano, kaj ŝoforis du eksterlandanojn, Ges-rojn Pyrzinski, kiuj alvenis el Pollando antaŭ kelkaj semajnoj.

—Robby Robertson kaj Eunice Graham

24-a AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝo estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: Antaŭ 1-7-1983; \$20 (poste \$25). Postuloj, studentoj \$15 (poste \$20).

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614**. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon. Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE", sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

3-a Listo de Aliĝintoj:

30. Pam Harris, Yuendumu, Norda Teritorio
31. Annie Spencer, Brisbane
32. Ken Linton, Melbourne
33. Eunice Graham, Manly
34. Wre. Chandler, Sydney
35. Gladys Burmeister, Melbourne
36. Ann Hearne, Melbourne
37. Myrtle Straker, Sydney
38. Jim Dimo, Rochester, Vik.
39. Jennifer Dimo, Rochester
40. Irene Courtenay, Melbourne
41. Don Pescod, Drouin, Vik.
42. Beryl Pescod, Drouin, Vik.
43. Malcolm Ross, Manly
44. S-ino A. Ross, Manly
45. Betty Cleminson, Manly

46. Tom Elliott, Sydney
47. Mavis Elliott, Sydney
48. Svetislav Kanački, Melbourne
49. Harold Gilbert, Cairns, Kvinlando
50. Dorothy Threlfall, Perth.

Laŭstata distribuo: N.S.K. 19; Viktorio 14; Kvinlando 7; Okcidenta Aŭstralio 4. A.C.T. 3; Suda Aŭstralio 2; Norda Teritorio 1.

Apudmara Renkontiĝo en Manly

Niaj anoj planas 5-tagan programon de dimanĉo, la 15-a de januaro, 1984, ĝis sabato, la 21-a, matene. 15 Esperantistoj iam mendis ĉambrojn en "Manly People's Palace" kaj 5 en "Hotel Manly".

Se iuj aliaj volas partopreni en niaj aranĝoj estas nepre necese, ke ili skribu tuj al **Box 415, G.P.O. Manly, 2095**, aŭ telefonu Marjorie Duncan (02) 977-5163, prefere antaŭ la fino de junio.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$786
S-ino E. Graham, Manly	5
S-ino Fay Koppel, Melbourne	20
F-ino Barbara Williams, Melbourne	20
Ges-roj C. Bailey, Brizbano	5
		\$836

RECENZOJ

KVINOPO da LIBROJ POR INFANOJ "El Popola ĉinio"

Eble plej ĉarmas "PESI ELEFANTON", kiu estas samtempe titolo de la unua el aro da rakontoj, prezentitaj per tutaĝaj kolorplenaj bildoj. Ĉi ties unulinia klarigo en simpla, bonstila Esperanto instruas kaj pri la lingvo kaj pri aferoj kaj kutimoj ĉinaj. Ĉiu rakonto havis sian pentriston kaj ĉiu enhavas bonan lecionon pri la neceso uzi la cerbon por solvi problemon kaj forte labori por atingi deziratan celon.

Similspeca NEGA INFANO, kompilita kaj pentrita de Liu Si, iom pli longa kun iom pli da teksto, temas pri kuniketo. kies patrino konstruis por ĝi lertan ludkunulon, la Neĝan Infanon.

GEAMIKETOJ EN NIA KORTO kun eĉ pli da teksto prezentas infanĝardenanaron kaj ties ludojn diversprofesialajn.

Per la titolo SIMIOJ PROVAS EL-AKVIGI LA LUNON, prezentigas tre maldika libro kaj ties unua el du rakontoj, kun bildoj, pri simia agado kaj teksto por pli aĝaj geknaboj.

La plej dika ekzemplo, do plej longa rakonto estas NEZHA KIRLAS LA MARON, liverita de Shanghai-a Belarta Studio. Antikvan fantazian ĉinan legendon akompanas fantastaj pentraĵoj, multaj ravaĵ, aliaj tamen sufiĉe timigaj se iam ili koŝmare invadus etulan dormadon.

Ciuj verkoj kompreneble postulos ĝepatran aŭ instruistan gvidadon almenaŭ ĉe unua tralego. Mendu ĉe nia Libro-Peranto. —FAY KOPPEL.

AŬSTRALIO KANTAS SIAN HISTORION: Eldonita de la Brizbana E-Societo, 70 p.

Kompilis Kay Andersen kaj Gaye Phillips, helpis per traduko de multaj kantoj Ruth Morrison. Kovrildeegno far John Paroz. Kun muzik-notoj kaj vinjetoj.

Jen neta kantlibro, kiu enhavas 33 aŭstraliajn kantojn. Oni devas gratuli la Brizbanan E-Societon, pro la eldono de tiu kantlibro, por kiu ĝi sukcesis ricevi subvencion de la Departemento por "Arts National Parks & Sports" de Kvinslando.

Taŭga kantlibro por grupvesperoj, ĉiu Esperanto-klubo nepre aĉetu ĝin. Bona donaco por viaj transmaraj korespondantoj. Mendu ĝin de **S-ino Sybil Martin, 48 Launceston Street, Salisbury, 4107.** Prezo: \$3.00., plus 60 cendoj por afranko

Globkrajonoj kun 9 surprisitaj telefonnumeroj diverslandaj, haveblaj ĉe Tom Elliott, P.O. Box 230, Matraville, 2036, por \$1.10.

Sukcesis pri Aŭstraliaj Normaj Ekzamenoj:

Supera: S-ino Annie Spencer, Brizbano
Elementa: S-ino Jennifer Dimo, Rochester, Vik. — Kun Honoro

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

26 — ALAN TOWSEY

"A light hidden under a bushel".

And what a light! A veritable cluster of lights which, together, "fairly blaze". One is a Chinese lantern, picturesque and colourful. Another is a Japanese neon sign, striking in its brilliance. A fourth is a light from our neighbour, Indonesia. A fifth was like many of our electric globes, "made in Holland". The sixth shows Teutonic thoroughness and reliability, and the seventh is French, which shows forth, "l'amour, l'amour, l'amour". Yes, Alan speaks all of these languages but seldom speaks of them. To change the metaphor, how many of us with so many stars in our crown could so modestly keep them hidden so much?

As you have already opined, Alan was a language teacher, then, in due and deserved progression, Master of Modern Languages, Deputy Headmaster and finally Headmaster.

He was also, at one time, mentor of the Asian students who were studying Chinese for exam purposes. Unfortunately most of them had previously failed, for the exam was in Mandarin and the Chinese spoke dialects. However, Alan's knowledge of Japanese ideograms was

very helpful and the tide of failure was turned into the flood tide of success.

Previously he had so shone in Japanese that, by the end of the war, he was Captain in charge of the unit whose job it was to interrogate Japanese prisoners of War in Bougainville. He began by attending the Army School of Japanese in Melbourne, where he met Reg Banham, Roy Rawson and other "greats".

Returning to teaching, he took up Dutch, was appointed to the newly formed Dutch Syllabus Committee and was awarded the Netherlands Government Scholarship for one year's post-graduate study in the famed Leiden University. There, of course, he met many Esperantists from Holland and Germany. He remained a member of the Dutch Syllabus and Examination Committee until two years after his retirement. In fact, at one stage he was Chief Examiner, and Chairman of the School Certificate Committee from its inception.

Meanwhile, whilst Deputy Headmaster at Picton High School, he taught himself Indonesian, began to teach it and made a trip to Indonesia to consolidate his knowledge and skills.

His retirement as Headmaster of Casula High School in 1976 anticlimaxed a career which began as an undergraduate just after the Depression. He graduated from Sydney, B.A. (Hons.) in 1938 and Dip.Ed. in 1939.

He married, and enlisted in 1941. He (with Joan his wife, of course) has one daughter and 2 sons, all ex-teachers and with children. One son is a B.A., Dip.Ed. and the other M.Sc., Dip.Ed.

Now we've "raved on" about umpteen languages, but not a word concerning Esperanto! In 1930, Alan bought "Esperanto Self Taught". He soon found the language to be addictive, and when in 4th year (now year 10) of High School, published his first article — in "La Suda Kruco", the forerunner of "The Australian Esperantist". The beginning of over 50 active years of "Esperanting".

After retirement, he and Joan toured the world, renewing acquaintance with old Esperanto friends in Holland, and visiting a long-standing (30 years) pen-friend in Czecho-slovakia.)

Alan has published many articles (mainly on language and teaching topics) in English, Esperanto, French and Dutch.

He has studied other languages but considers himself fluent, nowadays, in "only a few — 4 or 5 at most". Since retirement he has concentrated mainly on Dutch and Esperanto.

Why hasn't such an outstanding fan held office in the Australian Esperanto movement? He has! In 1952, because of his flair for organization, he was elected Chairman of the A.E.A. Congress in Sydney and for the next 2 years was Vice-President of A.E.A. He edited Reg Banham's "Translation Course", is currently Commissioner for A.E.A.'s projected "Australia Antologio" and he is Editor of the Correspondence Service's "Esperanto Bulletin". This year he taught in the Armidale Summer School. All this while he is Secretary of Picton Rotary Club!

When attending the next Australian Congress, look out for Alan. He has a little moustache and is probably—with wit and compulsive enthusiasm—teaching a group of near beginners. But don't look for a man in his mid 60's! He still has a gleam of youth. After all—as Past President of a Legacy group—he still looks after 7 widows!



Egaleco por Viroj

Neeviteble tio devis okazi, pli-malpli frue. La leĝo kontraŭ seksaj diskriminacioj, vigle petita de virinoj, utilis (prave) por protekti la subprematajn rajtojn de viro.

Tio okazis en Ruvo di Puglia (sud-orienta Italio), kie sinjoro Giuseppe Faldtico plendis antaŭ juĝisto, ĉar la loka komunumo rifuzis dungi lin, kun la preteksto, ke por tiu tasko estas pli taŭga iu virino.

La juĝisto agnoskis plene pravaj la plendojn de la "diskriminaciita" viro, kaj ordonis ĝian dungadon, surbaze de la leĝo, kiu antaŭvidas absolutan egalecon inter viroj kaj virinoj. Interalie, aldonis la juĝisto, kvankam por tiu tipo de laboro oni kutime dungas virinojn, en kuirejoj viroj proponas la samajn garantiojn kiel virinoj; eĉ la elstaraj kuiristoj estas pli multnombraj ol la

eminentaj kuiristinoj. Sed la ĉefa instruo venas el la konstato, ke la feministaj bataloj tiel antaŭiris, ke nun la viroj devas profiti de defendiloj elpensitaj por protekti la virinojn. Por la momento, temas pri izolita kazo; sed ĝi estas, sendube, indiko pri la nunaj tempoj.

(De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

Esperantisto en vivon-sava rolo

Laŭ presraporto en okcident-aŭstralia gazeto, konata esperantisto Arthur Oliver, kiel radio-amatoro, ludis gravan rolon en drameca savo.

Li fidele restis dum 2 tagoj ĉe sia sendilo VK6ART, perante necesajn informojn inter sinkanta jahto de franco Jacques de Roux en la Hinda Oceano kaj Nov-Zelandaĵ radio-amatoroj. Gratulon al li!

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 207 (287)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1983

TELEGRAMO AL NIA REDAKCIO

Budapeŝto, 2-an de aŭgusto, 1983.

Preskaŭ kvinmil esperantistoj partoprenas la 68-an Universalan Kongreson de Esperanto. S-ro Gregoire Maertens (Belgio) reelektita Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. — Les SCOTT.

AŬSTRALIA ĈEFMINISTRO SALUTAS LA 68-an UNIVERSALAN KONGRESON KAJ INVITAS LA 73-an AL BRIZBANO



PRIME MINISTER
CANNBERRA.

18 Jul., 1983.

Mr. R. L. Harry, AC, CBE
President of the Australian
Esperanto Association.
8 Tennyson Crescent
Forrest ACT 2603

Dear Mr. Harry

Thank you for your letter of 23 June concerning the efforts of the Australian Esperanto Association to have the annual congress of the Universala Esperanto-Asocio held in Brisbane in July 1988.

I am pleased to support you and your Association in these efforts and I invite you to convey the following message from me to the President of the Universala Esperanto-Asocio:

"I send greetings to the Sixty-eighth Congress of Esperanto and wish it every success. I hope that the Seventy-third Congress will be in Brisbane, Australia, in the year of our Bicentenary, 1988.

Yours sincerely
R. J. L. HAWKE.

(TRADUKO: Mi dankas pro via letero de la 23-a de junio rilate la klopodojn de Aŭstralia Esperanto Asocio okazigi la ĉiujaran Kongreson de la Universala Esperanto-Asocio en Brizbano en julio 1988.

Plaĉas al mi subteni vin kaj vian Asocion en tiuj klopodoj kaj mi invitas vin transdoni la sekvantan mesaĝon de mi al la Prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio:

"Mi salutas la 68-a Kongreson de Esperanto kaj deziras por ĝi plenan sukceson. Mi esperas, ke la 73-a Kongreso estos en Brizbano, Aŭstralio, en la jaro de nia Ducentjara Jubileo, 1988".
Subskribita R. J. L. Hawke.

LABORGRUPO PRI INTERNACIA LINGVO

La 18-an de junio, 1983, kunvenis en Kanbero grupo de tutlandaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri internacia interkompreno, por inaŭguri laborgupon favoran al Esperanto.

Partoprenis la Estraro de A.E.A., la prezidanto de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, reprezentantoj de la Aŭstralia Federacio de Asocioj de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, de la Virina Kristana Organizaĵo por Abstinemo, de la Societo de Amikoj (Kvakeroj) kaj observanto de la Instituto pri Internaciaj Aferoj. A.E.A. Prezidanto Ralph Harry prezidis la kunvenon.

Post tuttaga diskutado pri Esperanto kaj vizito al la Nacia Biblioteko de AEA, la kunveno akceptis rezolucion, kiu

- (1) aprobas la submeton, jam faritan de AEA, de proponoj al la Senato de la Aŭstralia Parlamento, kies Komitato pri Edukado kaj Bel-

artoj nun enketas pri kunordigita Lingva politiko por Aŭstralio.

- (2) starigas laborgrupon por plani publikan informadon, prezentojn al la Federacia Registaro pri la neceso subteni Esperanton internacie, programojn por la enkondukon de Esperanto en porinstruistajn kolegiojn, lernejojn kaj Universitatojn,
- (3) invitis AEA, la Asocion por UN kaj la asociojn de instruistoj skizi proponojn por la laborgrupo.

La Kanbera Esperanto-Klubo kaj ties Prezidanto, Ralph Harry, meritas la gratulon de la tutaŭstralia esperantistaro, por la organizado de tiu sukcesplena tuttaga kunveno de 6 ne-registaraj organizaĵoj kun membraro de proks. 10,000.

TASMANIA JUNULINO EN JAPANIO

En majo la AEA-Estraro donis stipendion - at SHAUNNAGH(ŝone) DOR SETT, de Laŭncestono, por helpi ŝin viziti E-klubojn en Japanio kaj partopreni la 31-an Regionan Kongreson en Ikeda, "fratinurbo" de Laŭncestono. Jen ŝia raporto:

"Antaŭ ol komenci, mi ŝatus danki la Esperanto-Asocion pro la stipendio de \$200, kiu faris mian restadon pli ĝuebla.

Dum la 10 tagoj de mia restado mi vizitis 9 urbojn, ĉiuj en la Kansaj-distrikto. Oni kondukis min al multaj temploj, kasteloj kaj interesaj sanktejoj.

Ĉiun vesperon mi vizitis alian klubon kaj respondis al demandoj pri mi mem kaj pri Aŭstralio. El la personoj kiujn mi renkontis, nur unu sciis kie Tasmanio estas.

Ĉiun nokton mi loĝis ĉe iu alia klubo kaj la postan tagon ili montris al mi sian urbon kaj mi veturis al alia loko en la vespero.

Dum la unuaj 3 tagoj mi malfacile funkciis, ĉar ĉiu parolis per japana akcento, sekve mi ne komprenis ĉe vorton al mi diritan. Tamen, post iom da tempo mi komencis kompreni kaj ekde tiam ĉio estis en ordo.

Do, fine mi atingis la kongreson, kiu komenciĝis sabate je la 2-a posttag-

meze. Partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj. Tiun vesperon ni loĝis en spaco de hotelo, kunigita al budhista templo. Dum la vespero ĉiu klubo prezentis skeĉon aŭ teatraĵon uzante marionetojn. Mi montris miajn diapozitivajn pri Tasmanio, kvankam ne estis sufiĉe da lumo por bone legi la komentariojn.

La posta mateno estis la komenco de aferkunveno. Okazis multaj paroladoj, inkluzive de (por mi kaj ŝajne al multaj aliaj tre enuiga) 50-minuta prelego pri "Administrado de la Rondo". Post tiu prelego mi devis sidiĝi sur la podio kaj, post la urbestro de Ikeda, mi faris etan paroladon. Ĝi estis trege mallonga kaj daŭris nur proks. 15 sekundojn. Neniam antaŭe mi estis tiel nervoza. Poste oni faris grupfoton kaj sekvis konversado.

(La ĉambroj por la diversaj kunvenoj portis la nomojn de bestoj. Honore al 2 atenditaj ĉinoj-kiuj ne alvenis-unu ĉambro nomiĝis "Pando", alia, honore al Shaunagh, nomiĝis "Koalo".)

Posttagmeze estis pli da klasoj kaj diskutado, kaj ferma soleno, kiam oni kantis "La Esperon". Post du tagoj mi ekvojaĝis hejmen kaj mi tre bedaŭris la neceson foriri.

Mi kunsendas (laŭ mia opinio) teruran raporton en la "Examiner".

Tutkorajn salutojn,
Shaunnagh.

(**Nota:** La raporto en "Examiner", la matena ĵurnalo de Laŭnceston, laŭ la opinio de la Estraro, estis bonega. Estis 3-kolumna titolo en nigraj literoj: "Esperanto student enjoys trip to Japan", kun foto de Shaunagh. La artikolo de 300 vortoj menciis, ke ŝi portis salutleteron de la Urbestro de Laŭncestono al la Urbestro de Ikeda. — Ralph Harry)

LA I.F.E.F. — KONGRESO

La 35-a kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio okazis inter la 4-a kaj 10-a de junio, 1983 en Ostendo, urbo ĉe la belga marbordo. Pli ol 400 gesamideanoj el 19 landoj ĝoje renkontiĝis sabatvespere dum la Interkona Vespero. La bela voĉo de Tiana Moons, fortepiane akompanata de Petro De Smedt, ĉarmis la ĉeestantojn.

Gazetara konferenco jam okazis je 2-a de junio kaj sekve de tiu konferenco aperis longaj artikoloj en la belgaj franc- kaj nederlandlingvaj ĵurnaloj.

La kongresejo troviĝis en la centro de la urbo, en la Fest- kaj Kulturpalaco. Dimanĉmatene kolektiĝis 200 kongres-

anoj en la novgotika ĉefpreĝejo de St. Petro kaj Paŭlo por partopreni la Eku-menan Diservon.

Dum la Inaŭguro de la kongreso parolis la ĝenerala direktoro de la belgaj fervojoj, S-ro Emanuel Flachet. Plie salutparolis la prezidanto de FISAIC, S-ro Gilbert Schmit (Luksemburgo), en la internacia lingvo. Same en Esperanto alparolis nin la urbestro de Ostende, S-ro Goekint, kiu diris, ke malofte okazas, ke en grava kunveno, kiun partoprenas 19 nacioj, li povas uzi unu solan lingvon kaj esti komprenata de ĉiuj. La prezidanto de UEA, S-ro Gregoire Maertens dankis al IFEF pro la preteco al kunlaboro dum la 100-jara jubileo de Esperanto.

Lunde kunvenis la terminara komisiono, kiu vigle diskutis pri la faka Terminaro. Ankaŭ okazis akcepto en la urbo-domo. La urbestro, kun 4 de siaj kunlaborantoj, afable akceptis kongresan delegacion. La mezepoka belega urbo Brugio estis la celo de duontaga ekskurso.

Dum la kongreso aperis kvar tre detalaj bultenoj. Ĉiuvespere la festsalono estis plenplena por la distraj programoj.

Marde okazis ekskurso al Zeebrugge por pli bone kompreni la ĉefan fakprelegon. Merkrede estis vera labortago: Plenkunsido, Terminara Komisiono, Fakprelega Komisiono, informa fako, fervoja koresponda servo. Menciinde estas la ĉefa fakprelego pri "La rolo de la fervojo en la haveno de Zeebrugge".

Elstara kariljona koncerto ravis la aŭskultantaron. S-ro Petro De Smedt klarigis sprite kaj humore sian profesion. Vespere okazis la Internacia Balo. La orkestro senlace dancigis la ĉeestantaron dum 5 horoj.

Oni diskutis ses kongresproponojn, speciale "esplori eblecon kiel instiĝi kongresanojn malpli krokodili." Ĵaŭd-vespere plezurigis nin eksterordinara koncerto de la Nacia Fervoja Orkestro.

Vendrede okazis tuttaga ekskurso. Aŭtobuse oni traveturis okcidentan Flandrion. Post la reveno okazis kongresa fermo en la granda salono de la Fest- kaj Kulturpalaco. S-ro De Sutter transdonis la IFEF-flagon al bulgara samideano, ĉar venontjare okazos la IFEF-kongreso en Burgas, ĉe la nigra maro en Bulgario.

—Elfriede Ernst, Bruselo.

24-a AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: \$25 Pensiuloj, Studentoj \$20.

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Eliyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614**. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon, Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE", sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

4-a Listo de Aliĝintoj:

51. Katherine Lewis, Canberra
52. Brenda Burkett, Canberra
53. Elaine Pianta, Perth
54. Patti Anson, Canberra
55. Beryl Randles, Adelaide
56. Eva Trainor, Melbourne
57. Jean Lehane, Toowoomba, Kvinsl.
58. Mary Armour, Yarra Junction, Vik.
59. Eva Matasin, Sydney
60. Dr. K. Bowling, Sydney
61. Sybil Martin, Brisbane
62. Gaye Phillips, Brisbane
63. Mac LeFevre, Launceston
64. Olive Larter, Perth
65. Agnes Curtis, Tambourine, Kvinsl.
66. H. Peddie, Sydney
67. Mary Egan, Perth
68. Jack Hawks, Perth
69. Marshall Cohen, Melbourne
70. James Harwood, Sydney
71. Alan Towsey, Tahmoor, NSK
72. Colin Rice, Sydney
73. Margaret Liston, Manly
74. Kit Brisbane, Melbourne
75. Trevor Steele, Brisbane
76. Volo Gueltling, Sydney
77. Keith Hanna, Sydney
78. Judith Hanna, Sydney
79. Ruth Morrison, Brisbane
80. Val Fotheringham, Melbourne
81. Gilbert Shonham, Brisbane
82. Decia Shonham, Brisbane
83. Cliff Tronerud, Brisbane
84. Margaret Chaldecott, Sydney

Luŝtata distribuo: N.S.K. 30; Viktorio 19, Kvinslando 16. Okcidenta Aŭstralio 8. A.C.T. 6, Suda Aŭstralio 3, Norda Teritorio 1, Tasmanio 1.

PROVIZORA PROGRAMO

Sabaton, la 7-an

- Matene: Alveno kaj registrado
10.00 AEA-Estraro kaj LKK Kunveno
12.30 Lunĉo (ankaŭ aliajn tagojn)
14.00 Ekskurso I — Urbai vidindaĵoj
19.30 Interkona Vespero (Komuna kantado, dancado, ludoj)

Dimanĉon, la 8-an

- 09.00 Tuttaga Ekskurso (A.C.T.)
17.00 Ekumena Diservo (Kapelo de Kolegio John XXIII)
19.30 Distra Vespero (Ĥorkantada Konkurso, Magiaĵoj)

Lundon, la 9-an

- 09.00 Gazetara Konferenco
10.00 Solena Inaŭguro far la Prezidanto. Asembleo de Kanbero Paŭzo por fotografado
14.00 Daŭrigo de la Inaŭguro — Salutoj laŭ Statoj
15.00 Paŭzo (ĉiam paŭzo inter 2 kunvenoj)
15.15 AEA-Aferkunveno 1 (Raportoj)
19.30-22.00 Muzika Vespero, cv. Internacia Koncerto (Publika)
Vizito al Observatorio de Monto Stromolo

Mardon, la 10-an

- 09.00 Lingvaj Seminarioj kaj Klasoj por Komencantoj
11.15 AEA-Aferkunveno II (Propagando, publiko, planoj)
14.00 Literaturaj eroj, Aŭstralia Antologio
19.30-22.00 Drama Konkurso por la Trofeo Koppel I

Merkredon, la 11-an

- 09.00-17.00 Tuttaga ekskurso (Cockington Green. Botanika Gareno, Piknika Lunĉo, Sipveturo sur Lago Burley Griffin)
18.30 Bankedo kaj Aŭksio

Ĵaŭdon, la 12-an

- 09.00 Lingvaj Seminarioj kaj klasoj
11.15 Kunvenoj de SAT, PAPIE

- 11.45 Kunvenoj de ORE, ILEI
- 14.00 Junulara sesio, paroladoj far nova oratoroj
- 16.00 Kunveno de UEA, Planado por Centjara Jubileo
- 20.00 Dramo Konkurso II

Vendredon, la 13-an

- 09.00 Lingvaj seminarioj kaj klasoj
- 11.15 AEA Aferkunveno III (Decidoj, elektoj)
- 14.00 Ekskurso (Nacia Galerio, Alta Tribunalo, Parlamentejo)
- 19.30-22.00 Distra Vespere (Debato, Kvizo, Skeĉoj, Pupteatro)

Sabaton, la 14-an

- 09.00 Lingvaj seminarioj
- 11.15 Kunveno dela Nova Estraro
- 14.00 Oficiala Fermo
- 19.30 Neformala Vespere

Dimanĉon, 15-an Foriro post Matenmanĝo

GRAVA ANONCO: Individuoj aŭ grupoj, kiuj deziras partopreni en la distraj aranĝoj, kaj konkursoj en la ĥor-kaj Dramo-Konkursoj bv. anonci sin KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ !!

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO
1982/83**

Antaŭe raportita	\$336
S-ro Arthur Cocking, Manly	5
		<hr/>
		\$841

KIU SEKVSOS ?



● **PERTO:** Nia ĉiam agema Vera Payne ferias nuntempe en Eŭropo. Ŝi instruis kvin klasojn kun 63 lernantoj. Dum ŝi estas for, aliaj membroj prizorgas la lernantojn.

Je 19-a de junio okazis pikniko en Rossmovne en la hejmo de Ges-roj Threlfall. Dek tri membroj ĉeestis kaj ĝuis agrablan tagon. S-ino Ruth

McGrath montris lumbildojn, kiujn ŝi faris dum vizito en Anglujo, kie ŝi ĉeestis la britan kongreson en Manĉestro.

Je 22-a de junio D-ro Einihovici legis internaciajn novaĵojn kaj recenzis libron kiun li lastatempe legis. Je 13-a kaj 27-a de julio okazis kunvenoj, dum kiuj ni traduk-ekzercis kaj diversaj membroj legis leterojn ricevitajn de Eŭropo.

● **ADELAJDO:** Ges-roj Sam kaj Marij Ellyard el Kanbero estis niaj bonvenaj gastoj je 13/5 en la hejmo de Ges-roj Felby. Dek geesperantistoj ĝuis agrablajn vesperon. Je 4-a de julio ni kunvenis en la infanvartejo. Laŭ la programo ni devus esti solvintaj krucvort-enigmaj, sed iel la konversacio tiris nin al diskuto pri la nomoj de multaj malsanoj. Tamen, eĉ tio montrigis tre interesa. — Bob Felby.

● **MELBURNO:** Varian programon prezentis, 30/5 S-ro S. Kanaĉki. Li montris bildojn pri Fiĝio, Parizo kaj Jugoslavio. Je 20-a de junio S-ro H. Koppel invitis membrojn al speciala vespero. Estis 35 jaroj de kiam li ekagis en la Melburna Societo post alveno el Kanado. Li priskribis kelkaj elstarajn eventojn en tiu periodo, kiel ankaŭ multajn eksterlandajn vizitantojn. Poste, li disdonis al ĉiuj ĉeestantoj malgrandajn donacojn kaj invitis al manĝeto preparita de lia edzino.

Interkluba vespero okazis je 27-a de junio. Estis la jam tradicia "Duonjara fina Konkursvespero". Estris la programon Margaret Sanders de la Oakleigh-Grupo. La temo de la konkurso estis: "La loko kie mi plej ŝatus esti". La premion por la plei bona Esperanto gajnis S-ino Sanders, kiu parolis pri la Insulo Tongo. La premion por la plej interesa loko gajnis S-ro G. Tumman, kiu parolis pri "Kostariko". Margaret ankaŭ prezentis enigmajn konkursojn kaj disdonis utilajn premiojn pro sukceso. Sekvis gaja babilado, dum la teo kaj kukoj rapide malaperis.

● **SIDNEJO:** 16-an de majo: "Telekomunikado" estis la temo. Tom Elliott kaj James Harwood parolis pri la fruaj tagoj de komunikado per la morsa kodo, uzante diversajn ilojn por ricevi kaj sendi mesaĝojn. Sylvia Burkitt montris, ke ankaŭ ŝi estas sperta pri la morsa kodo.

Je 23-a majo ni bonvenigis Ges-rojn Woodruff el Kanado kaj Fred Turvey, kiu lastatempe vojaĝis al Pekino kaj Japanio. S-ro Woodruff antaŭe loĝis en Moore kaj nun vivas en Vankuvero, kie venontjare okazos Universala Kongreso. Semajnon poste Sylvia Burkitt parolis pri ŝpinado kaj montris sian ŝpinradon.

Je 6-a de junio M. Chaldecott kaj D. Gould montris lumbildojn kaj filmojn por prezenti al niaj polaj vizitantoj aŭstraliajn vidindaĵojn, kiujn ili ĝis nun ne povis mem vizi.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** Niaj anoj ege bedaŭras la morton, je 14-a de julio, de nia amikino Adelaide Ross, kaj ni sincere kondolencas al Malcolm pri la perdo de la amata edzino. Ni ĉiam rememoros Adelaide pro ŝia bonkoreco kaj sprita humoro. memore al ŝi nia klubo dediĉos libron por la biblioteko.

14/6 vizitis la klubon Gordon Gregson el Perto. Kelkaj anoj invitis lin hejmen kaj akompanis lin al vidindaĵoj.

10-15/7 pluraj anoj diversmaniere agrabligis la restadon de Prof. Carl Stop-Bowitz dum lia gastigo en la hejmo de Marjorie Duncan. Ni aranĝis viziton al la Zoologia Gardeno, kie atendis nin fotisto kaj raportisto de "Manly Daily". La Kuratoro mem montris al "Carl" tiujn aŭstraliajn bestojn, kiuj havis specialan intereson, kaj poste invitis nin al lunĉo. Tiun vesperon "Carl" parolis al niaj anoj pri Norvegio. Sekve de sia vizito al Melbourne li donacis 3 vermegojn (elfositajn en Gippsland) al la Aŭstralia Muzeo. La alian tri oni sendos konservitajn al la Universitato de Oslo.

—Marjorie Duncan.

● **BRIZBANO:** Por emfazi la "Jaron de Komunikado", biblioteko en apuda "Logan City" invitis la Brisbanan Societon starigi elmontron de 16-a ĝis 30-a de julio en antaŭurb'o Woodridge. Kun plezuro la Societo akceptis la inviton tion fari, per bildkartoj, afiŝoj kaj eksterlandaj gazetoj. Samtempe ni provizos stokon da flugfolioj por sciigi vizitantojn pri Esperanto.

Denove ni reklamas pri klaso por komencantoj, kiun ni aranĝos en la klubo je la 11-an de julio. Dume anoj en la 3 klasoj studas ĉiun lundvesperon. Nekutima pluvego en junio nuligis la proponitan studsemajnfino ĉe Mt. Tambourine; ni pripensas alian eble en septembro.

—Ray Ross.

● **COFFS HARBOUR, NSK:** La loka taggazeto "Advocate" presigis, 7-an de junio 1983, duonpaĝan intervjuon kun Grace Kirkwood pri Esperanto.

NEKROLOGO

Je la 24-a de Junio, subite mortis fidela amiko kaj konstanta laboranto por Esperanto, emerita lernejestro de Dorrigo, NSK., S-ro S. J. (Jock) Campbell, B.A., M.Ed., Dip.Ed.Admin., M.A.C.E., F.R.G.S.

Lia aktiveco komenciĝis en 1971, kiam, vidinte reklamon en instruist-sindikata gazeto, li aliĝis al korespondanta kurso.

Tom poste, Walgett High School (dua-grada lernejo) adoptis—laŭ lia instigo—Esperantlingvan moton por sia ŝildo.

Transloĝinte al Dorrigo, kiel lernejestro de la High School kaj estro de la Vespera Kolegio, Jock trovis tempon inter multaj aliaj aferoj, por persone instrui Esperanton al zorge elektitaj lernejoj — kiujn, kompreneble, li antaŭe entuziasmigis. Li faris tion dum pli ol kvin jaroj. Sed nur post kvinjara konstanta klopodado kun multaj argumentoj, li fine — ĵus antaŭ sia emeritiĝo — ricevis oficialan permeson tion fari! — de la "Board of Senior School Studies" (komitato pri altgradaj studobjektoj).

Jock ankaŭ iĝis kursgvidanto por la korespondkurso servo, kaj post sia emeritiĝo akceptis deĵoron ankaŭ kiel AEA-Komisiito pri Esperanto en Lernejoj. Traktante tiun taskon serioze, li skribis multajn leterojn al lernejoj tra la lando. Sed poste, konstatante ke li ne plu povas dediĉi, kion li taksis, sufiĉan tempon al tiu grava laboro, li malvolonte ekŝiĝis — tamen restante kursgvidanto, kaj — laŭoportune — foje parolante pri Esperanto al Rotariaj kluboj ktp.

Ĉiuj, kiuj konis lin, sentos la perdon de tia fidela kunlaboranto, bona amiko kaj cetere, vera "ĝentilhom".

Al liaj edzino kaj familio ni kondolencas. . . . John Moore.

AŬSTRALIA ANTOLOGIO

La jenaj pecoj jam estas tradukitaj (aŭ tradukataj):

Tom Collins: el "Such is Life" (Wre. Chandler)

A. B. Paterson: "Waltzing Matilda" (Jack Pinwill/John Moore/ Neil Russell)

"The Man from Snowy River" (Ken Linton)
 Dorothea Mackellar: "My Country" (Winsome Greenhalgh)
 Patrick White: el "The Tree of Man" (Ralph Harry).
 Judith Wright: "Bullocky" (Winsome Greenhalgh/Ken Linton)
 Geoffrey Dutton: "The Island" (Ralph Harry)
 John Rowland: "Landscape" (Ralph Harry)
 Dick Roughsey: "The Giant Debil-Dingo" (Ralph Harry)
 Nacia Himno: "Advance Australia Fair" (Audrey Childs-Mee)

Judith Wright: "Black Cockatoos" (Winsome Greenhalgh)
 Kath Walker: "We are going" (Winsome Greenhalgh).

☆ ☆ ☆ ☆
 Tradukontoj, nun bonvolu informi min, kiun pecon ili proponas traduki, antaŭ ol komenci, por ke mi avertu ilin en la okazo ke iu alia jam elektis la saman pecon. Tiel ni evitos perdon de tempo kaj peno — kaj eventualan ĉagrenon.

Mia adreso estas: 19 Market Street, TAHMOOR, N.S.W. 2573.

—ALAN TOWSEY (Komisiito por la Antologio)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO 27 — VINCENT J. ("TIMMY") TIMMINS

"The Great Encourager".

Timmy's Esperanto career spans 74 years! In 1907, whilst still a pupil in the original Fort St. High School, he found in a second-hand bookshop a complete course in Volapuk — with dictionary. He bought it for a shilling and after some study became enthusiastic with the idea of an international language. However, after a few months, he found it impossibly difficult, and therefore quite unspeakable. Still, the time was not wasted, for it instilled into his mind the need for a means of international communication.

Two years later, "Timmy" joined the staff at the Bank of Australasia (now A.N.Z.). In that year the "Sydney Sun" took over the old "Evening Star" and immediately began to publish elementary lessons in Esperanto. A whole column full of them! At last, here was a really practical language and he took it up with enthusiasm. Dymock's sold him O'Connor's textbook. How long these lessons continued in the paper he will never know, for shortly afterwards he was transferred to Queensland.

It was not until 1911 that "Timmy" linked up with the Esperanto movement. Once a week he and 4 or 5 young Esperantists met at the home of Mrs. Wright. Unfortunately, this contact was short-lived as he was again transferred — to another town.

In 1913 he received his first Esperanto gazette, "La Abstinenca Observanto", official organ of "La Internacia Ordeno de Bontemplanoj" to which he

subscribed and whose headquarters were in Germany. When war broke out, of course this contact ceased. Whilst on a troopship serving in World War One, "Timmy" found in Pearson's Magazine an extract of a speech by Lloyd George. It read, "Ni ne demetos la glavon, ne facilanime preniton, ĝis la rajtoj de la malpli grandaj nacioj restos sur neŝanceligebla fundamento".

The war over, he returned to Sydney and attended Sydney Club which held meetings near Central Railway Station. However, he attended only 2 or 3 times, for his wife did not like being left alone at night.

Time has effaced the names of the members then, but "Timmy" "rather fancies" that Percy Hudson was one.

For at least 40 years, "Timmy" was an isolated Esperantist until he attended his first Congress — in 1962 in Sydney. During those years he carried on an extensive correspondence, for, in 1922, his name and address had appeared in "Esperanto Triumfonta" — the forerunner of "Heroldo" — and letters flowed in from all parts of the world. He was also an avid reader—especially of "La Suda Kruco".

However, although our friend was not a "clubber" he has played a most significant part in holding small classes at Hornsby, in his home and in the home of the late Dorothy Hasluck. Could a bank manager understand the problems and discouragements of beginners in Esperanto? "Timmy" could. He gathered

around him a circle of appreciative—yes, admiring—students who became his friends. Audrey Dennys, Olive Russell and Margaret Liston have spoken of his help and encouragement, of his keen sense of humour, of his inspiration. Margaret especially appreciated his keen mind and his feeling for drama. He, it was, who particularly urged her to persevere in writing and presenting her Esperanto plays. He, with wit and insight, was happy to provide constructive criticism cum suggestions.

“Timmy” has always been a stickler for correctness in Esperanto but not to the point of pedantry: he delighted in rendering everyday English expressions such as “Don’t pull the wool over my eyes” into simple idiomatic Esperanto.

This flair for finding the apt Esperanto phrase stood him in good stead as a mentor in the Correspondence Courses. For years he corrected these lessons with occasional very mild criticism but with encouraging words of praise. Nowadays, with failing eyesight and advancing age he can’t carry out this task so dear to his heart: but he still manages to attend Esperanto House on special occasions.

We can’t leave “Timmy” without his tale which illustrates his sense of humour. Many years ago he was in a hotel in Italy and had a smattering of the language. He mislaid his wallet. He was quite concerned, but, when he returned to his room, was relieved to find the bed made and the wallet—contents intact—resting conspicuously on the quilt. Obviously the honest maid had found it. Wishing to reward her, “Timmy” waited for her to return. When she entered the room, he picked up the wallet, took some notes from it, put the wallet back and patted the bed, as much as to say “Thanks for finding my money”. She, completely misreading his pure mind, replied in alarm. “Oh no! I’m a respectably married woman”.

—ARTHUR COCKING.



RECENZOJ

LA NOVA BUTIKISTO DE NUKUGAIA de Bertram Potts; eld. T. K./Stafeto; Antverpeno-La Laguna; 250p.

Novel-amantoj, kiuj memoras la kolekton “Nokto da Timo”, nepre bonvenigos pluan novelaron el la vigla plumo de ties aŭtoro. “La Nova Butikisto de Nukugaia” estas nur unu el aro da vervoplenaj rakontoj, en kiuj troviĝas nenia fantaziaĵo, nek granda katastrofo aŭ tragedio, nek fantastaj aventuroj en ekzotikaj mondpartoj, nek amafero tro dolĉe romantika. Jen prezentigas ĉiutagaj situacioj kaj okazaĵoj el la reala mondo, en kiu la verkisto pasigis sian jam ne mallongan vivon, kaj kiun ŝajne li konstante, klare kaj plendetale observis.

Liaj rakontoj temas nek pri superhomoj, geprincoj aŭ milionuloj, nek pri homoj pie virtaj aŭ tute fiaj. Ili pri-traktas ordinarajn, kvankam tre diversajn, vere homajn homojn, ĉiam el la konata medio, plej ofte Nov-Zelando, kie la verkisto sin trovis dum granda parto de sia vivo, sed, jen kaj jen, la sceno ŝanĝiĝas al la eŭropa zono de la Unua Mondmilito, kie li deĵoris soldate.

Ŝajne plej interesas lin la homoj, kiujn li rigardas kun varma toleremo, kaj el kies agoj kaj rilatoj inter si li tiras jen humuron, jen kompaton aŭ timon, jen admiron, kelkfoje mildan malaprobion, mallonge, tutan gamon da emocioj por konsistigi sufiĉe dikvan volumon. Tamen li havas okulojn ankaŭ por la belajoj de la naturo, kaj plurloke bildigas por la leganto pejzaĝon aŭ panoramon kvazaŭ kolorplenan filmon, eĉ sonfilmon.

Multaj trafaj esprimoj kaptas atenton, kiel la jenaj: “Nuboj lantuke kovris la malvarman vaston de la ĉielo kaj sur la tero la akra blovado kruele pinĉis nian vizaĝon”. kaj “ridklukis”, “vort-laksa sinjorino”, “sekretis langoklake”, “buŝblova respirigo”. Sugestio pri ia mistero aldonas al la intereso en “La Kopro-Kontisto”. Fakte, mankas nenio, eĉ ne preseraĵoj kaj preterlasaĵoj. Estas vere domaĝe, ke ĉi-lastaj evidentiĝas plimultnombre ol kutime en eldonajaĵoj de la koncerna firmao T.K.

—FAY KOPPEL

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 208 (288)

MELBOURNE

Septembro, 1983

LA 73-a UNIVERSALA KONGRESO EN BRIZBANO EN 1988 !

Jen por ni aŭstralianoj la plej elstara rezulto de la 68-a Universala Kongreso, kiu okazis inter la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto, 1983, en la hungara ĉefurbo Budapeŝt. Jam je la 29-a de julio 30 en- kaj eksterlandaj ĵurnalistoj partoprenis gazetaran konferencon, el kiu rezultis multaj raportoj en la Radio kaj la gazetaro.

La vetero estis varmega, sed feliĉe la granda Sportpalaco, en kiu okazis la kongreso, estis bone klimatizita.

Pri la nombro de aliĝintoj okazis sufiĉa miskompreno. Fiere oni anoncis, ke la kongreso estis rekorda, kaj la "Kongresa Kuriero" raportis, ke la anaro superis la 'magian' ciferon 5000. Al la plej juna 'kongresano', la sepmonata Gabriele Corsetti, oni donis la kongres-numeron 5000. Sed post la fino de la Kongreso oni eltrovis, ke oni ellasis 200 numerojn, kiujn oni rezervis por eblaj aliĝontoj el la Tria Mondo. Do, fakte, la oficiala nombro estis 4834 kongresanoj el 50 landoj kaj la urbo Nurenberg ankoraŭ tenas la rekordon el la jaro 1923 per 4963 kongresanoj.

La Solena Inaŭguro estis vere impona. Inter la multaj honor-gastoj troviĝis ankaŭ la hungara kosmonaŭto Bertalan Farkas, kiu estas bona Esperantisto. La Honora Protektanto de la kongreso, S-ro Sandor Gaspar, estro de la hungaraj sindikatoj, diris i.a. "Ni konsideras la Esperanto-movadon unu el la plej noblaj kaj puraj movadoj." "Festparolis—anglalingve—S-ro E. Butler, Generala Sekretario de la "Internacia Telegrafia Unio". Kongresanoj ricevis Esperanto-tradukon de lia prelego, sed la plimulto de la kongresanoj esprimis la deziron, ke estonte la festparolado estu en Esperanto.

Salutis ses ambasadoroj kaj multaj ambasadaĵ sekretarioj, kelkaj el ili en Esperanto. Elstaris la unua sekretario de la Ambasado de Egiptujo, S-ro Fatah Ezz el Din, kiu salutis en perfekta Esperanto. La salutojn de la aŭstralia ĉef-ministro laŭtleĝis D-ro Renato Corsetti. Tio multe impresis la UEA-estaron, kiu "principe akceptis la inviton de la Aŭstralia Esperanto-Asocio por okazigi la Universalan Kongreson en 1988 en Brizbano."

Oni elektis **novan Estraron** por la venontaj 3 jaroj: Prezidanto Gregoire Maertens, Belgio; Vic-Prezidantoj, Humphrey Tonkin, Usono (eksteraj rilatoj), Josimi Umeda, Japanio (informado); Generala Sekretario: D-rino Flora Szabo-Felso, Hungario; Estraranoj: Renato Corsetti, Italio (Landa agado, jubilea jaro), Barbara Despiney, Francio (eksteraj rilatoj, junularo), Roland Lindblom, Svedio (kongresoj), Baldur Ragnarsson, Islando (kulturo), Peter Todorov, Bulgario (faka agado). Kiel 45-an landan asocion oni akceptis la Kuban E-Asocion.

Denove la Internacia Kongresa Universitato plenumis gravan rolon en la kongresa programo. Prelegis 8 universitatanoj el 7 landoj. La Hungara Poŝto eldonis Esperanto-poŝtmarkon je valoro de 2 Forintoj (tarifo por enlanda letero), en 745,000 pecoj. Okazis la kutimaj kulturaj vesperoj kaj multaj fakkunvenoj. La Universalaj Kongresoj fariĝis tiel multflankaj, ke estas fakte neeble por malgranda gazeto doni plenan raporton.

S.A.T. KONGRESIS EN LINZ

De la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto Sennacieca Asocio Tutmonda okazigis sian 56-an Kongreson en LINZ, ĉefurbo de Supra Aŭstrio. El 17 landoj venis 185 kongresanoj, kiuj pritraktis organizajn kaj aktualajn temojn en 4 laborkunsidoj. Sur granda afiŝo sur la scenejo estis videbla la devizo de la kongreso, nome "**La internacia kongreso sen interpretistoj**".

Du prelegoj vekis la intereson de la ĉeestantoj. Duontaga ekskurso en la nordan parton de Supra Aŭstrio kaj tuttaga ekskurso al Bad Ischl montris al la kongresanoj la belecon de la lando. Dum la kongresa balo la maljunuloj same diligente dancis kiel la junaj gekongresanoj. La vizitoj al diversaj uzinoj montris al la gekongresanoj la labor-kondiĉojn kaj la laborejojn en la lando.

En du vesperoj kongresanoj konatiĝis kun la aŭstria folkloro per artaj prezentadoj. En pluraj frakci-kunvenoj disvolviĝis debatoj pri pacismo, liberpensado kaj liberecanaj ideoj. Krom Gvidrezolucio koncernanta agadon kaj vivon de la Asocio estis akceptita **DEKLARACIO**, kiu **alvokas** por vigla kontraŭstaro al vetarmado: **protestas** kontraŭ ĉia militista propagando en eduksfero kaj

kontraŭ la persekutado de militrifuzantoj; **konstatas**, ke unu el la ĉefaj faktoroj endanĝerigantaj la mondpacon estas insida ŝtata manipulado de la mensoj en informado kaj komunikado; **akceptas** la gravecon de interhoma komunikado; **opinias**, ke la avangardaj teknikoj de komunikado ne sufiĉas sen la uzado de komuna sennacieca lingvo; **salutas**, ke Ĉinio per enkonduko de Esperanto en la superan instruadon, kreas la bazon de sendiskriminada komunikado.

SUKCESA N.E.M.-KONFERENCO EN GRAZ

De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto, 1983, okazis en Graz, Aŭstrio, la 9-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Partoprenis en ĉi tiu Konferenco en la stiria ĉefurbo delegitoj el 9 landoj. La ĉefa temo de la Konferenco estis "Renkonte al la Jubilea Jaro 1987". La delegitoj pridiskutis la ĝisnunajn laborojn en la Internacia Kunordiga Komitato, kiuj ankoraŭ ne donis kontentigan rezultojn.

La Konferenco alvokis la gvidantaron en UEA kaj ĉiujn organizantojn, kiuj ankoraŭ ne decidis, urĝe konsideri sian starpunkton cele al realigo de komunaj agadoj surbaze de komuna kadra programo en la intereso de Esperanto. La Konferenco aprobis ankaŭ la projekton de Deklaracio kaj Alvoko al la Mondo okaze de la Jubilea Jaro, ellaboritan de prof. Lapenna, kaj prezentos ĝin per diskuto al la Internacia Kunordiga Komitato. La Konferenco unuanime esprimis sian fortan deziron, ke en la Jubilea Jaro okazu maksimume harmonia kaj efika kunlaborado, por doni fortan antaŭenpuŝon al la Internacia Lingvo.

Ĉiuj konferencaj laboroj kaj kunvenoj okazis en plena amikeco kaj agrabla etoso. Kiel konferencejo servis ĉambro en studenta hejmo, kiu dum la ferioj funkcias kiel hotelo. Parto de la konferencanoj ankaŭ loĝis tie. Kelkaj prelegoj same kiel ankaŭ la solena inaŭguro, okazis en salonegoj de la Universitato de Graz.

Dum la Interkona Vespero prezentis sin la muzika grupo "TYM & Co." el Graz kun kelkaj modernaj kantoj en Esperanto. Ili planas eldoni sondiskon en Esperanto, kiu estos havebla jam en aŭtuno, 1983.

Ĉe la Inaŭguro la konferencanojn salutis urba konsilisto Dipl.-Ing. Klaus Gartler kiel reprezentanto de la urbestro de Graz, kaj la pre-rektoro de la Universitato. La festparolado de prof. d-ro I. Lapenna temis pri "Komunikado en Libereco" kaj estis aklamita kun entuziasmo.

La posttagmezo de la unua tago estis dediĉita al gvidado tra la urbo Gráz, historie interesa kaj sud-lande ĉarma, kun bele konservita antikva urbokerno. Vespere s-ro Hugo Kraus prezentis al la konferencanoj alian urbon, nome la aŭstrian ĉefurbon Vieno, en lerte aranĝita son-bild serio.

La prelegoj okazintaj la sekvantan tagon temis pri "La amaspropono favore al la "Internacia Lingvo" prezentita al UN en 1966: Ankoraŭ nekonataj aspektoj" (Prof. d-ro Ivo Lapenna) kaj "La propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo: Sperto de la efiko de la lingvo-orientiga instruado" (Prof. d-ro Helmar Frank, Paderborn), kaj trovis multan intereson ĉe la aŭskultantaro.

Du akceptoj atestis pri la favora sinteno de la oficialaj instancoj. Anstataŭante la landestron, alparolis la konferencanojn la vicprezidanto de la buroo de la landa registaro, kortega konsilisto D-ro Werner Blanc. La sekvantan tagon la partoprenantoj estis akceptitaj en la urbdomo de s-ro Alfred Stingl, vicurbestro de la landa ĉefurbo Graz.

Al la konatiĝo de la konferencanoj kun Stirio kontribuis ankaŭ 2 ekskursoj. Tuttaga ekskurso gvidis al la norda montara regiono. En Admont la ekskursantoj povis rigardi la mondfaman bibliotekon de la tiea benediktana monaĥejo, riĉe ornamita per freskoj kaj skulptaĵoj. Celo de la duontaga ekskurso estis Leibnitz kaj la suda vinregiono.

Laŭ la opinio de la partoprenintoj la ĉi-jara Internacia Konferenco de NEM estis tre sukcesa el ĉiuj vidpunktoj. veturante hejmen ili jam nun antaŭĝojas pri revido venontan jaron en Leeuwenhorst, Nederlando, ĉe la 10-a Internacia Konferenco de NEM.

—Klaus Perko, Graz.

NACIA BIBLIOTEKO de AEA

La Biblioteko de AEA daŭre kreskas kaj evoluas en la salonoj de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj en Kanbero. KEK-anoj laboris por la Instituto 60 horojn en Aŭgusto, same kiel en Aprilo, kiel lupago.

La Biblioteko provizis informojn al pluraj membroj kaj organizoj en ACT kaj en la Statoj. Ĝi ankaŭ funkcias kiel altnivela konstanta ekspozicio. Ekzemple ĝi pozitive impresis reprezentantojn de ne-registaraj organizoj dum la Kunveno en Junio.

Gravan aldonon faris lastatempe S-rino E. Oliver, kiu donacis ekzempleron de ĉiu libro en la stoko de Esperanto Publishing Company (Orelia O.A.), aliajn valorajn librojn kaj gazetojn.

S-ro V. J. Timmins transdonas al la Biblioteko kolekton de frutempaj Esperantoj, heredajo de la mortinta pioniro George Collingridge (Vidu la Aŭstralian Vortaron de Biografio Vol. 8). Oni planas ceremonion de akcepto dum la 24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Kanbero, se eble ĉe la strato nomita honore al Collingridge! **Ni esperas, ke aliaj membroj kunportos al Kanbero librojn kaj gazetojn por la Biblioteko.** Ni ŝparu poŝtkostojn!

S-ro R. G. Robertson donacis kasedon enhavantan registron de liaj du intervjuoj kun ABC. Robi ankaŭ anoncis sian intencon donaci kelkajn librojn, kiam estos spaco!

S-ro R. L. Harry pagis la koston de bindo de ĉ 20 volumoj da gazetoj, kaj de kelkaj libroskatoloj.

En Aŭgusto F-ino Joyce Turner vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno. La Bibliotekisto, Katherine Lewis, kiu vojaĝos en Eŭropo intencas viziti la Bibliotekojn Butler kaj Hodler en Londono kaj Roterdamo por konsultado. La Estraro provizos helpon pri vojaĝkostoj el la Fonduso Stipendio.

Estas en la Biblioteko kelkaj duoblaĵoj de libroj kaj gazetoj. Eksterlandaj gazetoj kelkfoje petas ekzemplerojn de **Suda Kruco, La Rondo** kaj **Aŭstralian Esperantist**. La politiko de la Estraro estas oferti tiajn duoblaĵojn unue al aŭstraliaj E-Organizaĵoj, kiuj havas aŭ organizas bibliotekon, antaŭ ol sendi al eksterlandaj bibliotekoj. Organizaĵoj al kiuj mankas kelkaj gazetoj eldonitaj en Aŭstralio bonvolu informi la Bibliotekiston antaŭ la fino de la 24-a Kongreso. Same rilate librojn. Haveblaj duoblaĵoj estos indikitaj en la Biblioteko. La Biblioteko posedas, aldone al bindita kompleto de SK., L.R. kaj A.E., preskaŭ kompletan kolekton de apartaj ekzempleroj de A.E. Ekzempleroj de ĉiuj indeksoj estas ankaŭ haveblaj.

La Biblioteko ŝatus akiri, por kompletigi siajn seriojn, mankantajn numer-

ojn de la sekvantaj gazetoj:

- (a) **Kontakto** (ĉiujn numerojn antaŭ 1979)
- (b) **Norda Prismo** (ĉiujn)
- (c) **La Mevo** (ĉiujn antaŭ 1979)
- (d) **OOMOTO** (1936-58; 1962 & 63; 1964 —285 ĝis 292; 1966 —309/10; 1967 —321/22; 1968 —341/42; 1969 —343/44; 1971 —371/372; kaj numerojn post Junio 1978.

La Estraro rajtigis la Bibliotekiston aĉeti aktualajn librojn ĝis valoro de \$200. Ni bonvenigus sugestojn pri titoloj. La Estraro bonvenigus mondonacojn por regula aĉetado, por eldono de la katalogo, kaj por novaj bretoj nun bezonataj.

Decembro estas la tradicia monato kiam ĉiu Esperantisto aĉetas almenaŭ unu libron. Ĉi tiun jaron sendu vian libron post legado al la Nacia Biblioteko de AEA — aŭ ebligu ĝin aĉeti libron.

—RALPH HARRY.

VERDA ALFABET-SUPO

Bernard Golden

Vane vi serĉos recepton por verda alfabet-supu en **La Internacia Kuirlibro**, kaj ĝi eĉ ne estas listigita en **Gastronomia Terminaro**. Kiam mi estis infano, mi tre ŝatis manĝi supon, en kiu naĝis malgrandaj literoj faritaj el farunaĵo. Fakte, tiu manĝaĵo havas ne nur nutran sed ankaŭ didaktan valoron, ĉar infanoj tiel povas lerni literi vortojn. Tamen, nuntempe mi ne tro emas manĝi alfabet-supon, ĉar mi konstatis, ke la specoj, kiuj estas aĉeteblaj en vendejoj, ne havas supersignitajn literojn, do ne decas surtabligi ilin en ĝisoste esperantista hejmo.

Lastatempe mi rimarkis fenomenon en la uzo de la Internacia Lingvo, kiu memorigas min pri literplena supu. Traleginte plurajn revuojn kaj gazetojn, mia atento estis aldirita al la ĉiam plioftiĝanta uzado de mallongigoj. Temas ĉefe pri nomoj de organizaĵoj, sed tiaj litrigrupoj anstataŭas ankaŭ ofte ripeŝigantajn vortojn kaj esprimojn. Por ilustru tiun tendencon en Esperanto, mi trakribis la enhavon de 'Der Esperantist' (n-ro 3/4, 1982). Sur la unua paĝo oni povas trovi tekston pipritan per alfabetaj: DDR, Nr., ISSN, Pf., GDR, SUPG, CK, elp., KL. Eĉ kiam oni legas la inicialojn en kunteksto, ili restas kriptaj, kiel montras jena frazo sur la sekva paĝo:

... parolis d-ro Imre Pethes, vicprezidanto de HEA kaj prezidanto de MEM kaj prof. d-ro B. Kameškov, la

reprezentanto de ASE kaj de SSOD."

Vane oni serĉas en la koncerna artikolo la plenajn nomojn de tiuj organizaĵoj: tute mankas ŝlosilo por decifri ilin.

Mi daŭrigos mian listigadon: ĈSSR, ĈEA, AESSR, USSR, IPE, SAT, SEU, EKRELO, AOKS, BulEA, BKP, FDGB, BEA, UEA, TEJO, ZV. Ne kredu, ke la bovlo nun estas plena de verda alfabet-supu, ĉar mia listo atingis nur la 11-an paĝon. Rapide mi nombris la mallongigojn sur la ceteraj paĝoj, kie aperis pli ol 40 litrigrupoj. Se mi bone kalkulis, tiu numero de la revuo enhavas 75 mallongigojn. Tralegado de la kajero ja estas utila, ĉar je kaj tie en la artikoloj troviĝas la plenaj nomoj de kelkaj organizaĵoj, sed aliaj ne estas klarigitaj. Tiom da literoj — proporcie — en unu bovlo da alfabet-supu certe donus al manĝanto misdigeston. Al leganto ili donas kapdoloron.

Ankoraŭ unu problemo estas prezentita, ĉar ne ĉiuj mallongigoj anstataŭas Esperantajn vortojn. Pluraj estas etnolingvaj formoj kiel WTO (angla), MAV (hungara), SSOD (rusa) kaj FDGB (germana). Cetere, apud la vere internaciaj poŝtaj kaj aŭtomobil-numerplataj mallongigoj troviĝas aliaj neinternaciaj formoj: jen du duoblaĵoj: CS:ĈSSR, SU:USSR.

Esperantaj tekstoj kun abundo da mallongigoj similas al skribajoj larditaj per fremdaj vortoj kaj esprimoj, kiujn ne ĉiuj esperantistoj povas kompreni. Alia trajto de mallongigoj koncernas ilian prononceblecon. Esperantistoj jam al kutimiĝis legi kaj elparoli mallongigojn kiel TEJO kaj SAT kvazaŭ ili estus vortoj, sed MFGDREA estas nur plumbuŝo da literoj. Tamen, eĉ tiaj longaj mallongigoj fariĝas tolereblaj, se ili estas formulitaj kiel akronimoj, t.e. vortoj kunmetitaj el la inicialo aŭ unuaj literoj de sinsekvaj partoj de plurelementa nomo aŭ termino. Eble la unua tia vorto en Esperanto estas la landonomo Usono, kiu konsistas el la inicialoj de la anglaj vortoj "United States of North-America" (Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko), al kiuj estas aldonita la substantiva finaĵo "o". Tiel estis kreita la ĉi-supre menciita EKRELO, nomo de eldonejo, kies plena titolo estas Eldon-Kooperativo de Revolucia Esperanta Literaturo.

Tiu ĉi maniero formi nomojn de organizaĵoj kaj ankaŭ terminojn, ŝajne estas facile akceptebla en multaj etno-

lingvoj, kaj de ili vortoj venas en Esperanton. Plena Ilustrita Vortaro (PIV) registras "Unesko" kaj "Benedukso". El la germana venis "Gestapo" kaj "nazio", kaj la rusa kontribuis "sovhozo" kaj "komsomolo". Internaciaj teknikaj terminoj kiel "radaro" kaj "lasero" estis formitaj sammaniere. Laŭ la Jarlibro de UEA la plejmulto de la mallongigoj de nomoj de fakorganizaĵoj estas prononceblaj akronimoj; escepto estas LSG pro manko de vokaloj. Kelkfoje oni faciligas la formadon de tiaj akronimoj per nekutima vortorado en la plena titolo; EGLI estas Esperantista Go-Ligo Internacia anstataŭ la pli kutima Internacia Esperantista Go-Ligo (IEGL). Tamen, estas rimarkinde, ke la mallongigoj de multaj organizaĵoj finiĝas per la litero "o" kiel TEJO, STELO kaj IABO. Se tiuj akronimoj estas mallongaj, ili estas preferindaj al neprononceblaj litergrupoj, sed ELF-AREK kaj IAdEM jam komencas forpreni la apertiton de ŝatantoj de la ne tro densa verda alfabet-supro.

VENENIĜO EN LA ANTIKVA ROMO

La iamaj romanoj manĝadis nutraĵojn venenigitajn de plumbo, kaj do suferis pro saturnismo, la malsano kaŭzata de plumba toksigo, kiu en la plej seriozaj kazoj, povas eĉ alkonduki al morto.

La malkovro estis farita de usona sciencistino, la paleoostologino Sara Bisel, kiu zorgeme pristudis la skeletojn de multnombraj viktimoj de la famkonata erupcio de Vezuvo en Pompejo kaj Herkulano (79 p.K.); el la ekzameno rezultis, ke la restaĵoj entenas 100 ĝis 200 plumbajn erojn en ĉiu miliono, iun sufiĉe altan procentaĵon. La ĉesto de plumbo ŝuldiĝas al la uzado de potoj, kalikoj, tubaraj fabrikitaj el plumbo, iu metalo tre facile prilaborebla, sed kiu iom post iom venenigis la loĝantaron, kaj precipe la pli riĉajn klasojn.

La hipotezo, ke la antikvaj romanoj estis venenigitaj de plumbo, estis lanĉita jam antaŭ kelkaj jaroj de kanada sciencisto, d-ro Jerome Kruagu, kiu tiel celis klarigi la strangaĵojn de kelkaj aspektoj de la roma historio en ĝia dekadencan epoko (oni pensu pri la sinteno de imperiestroj kiaj Nerono kaj Kaligulo); nun la hipotezo ŝajnas konfirmita de laboratorioj testoj.

(De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

AŬSTRALIA = KRONIKO

● **PERTO:** Je 10-a de aŭgusto ni povis bonvenigi 2 nederlandanojn, S-ron Kruiswijk kaj ties filinon, S-rinon Leopoldt. Ili venis al nia ŝtato por viziti parencon. Prezidanto Smeets gvidis diskuton pri konservado de la naturo. Kelkaj membroj legis korespondajn ricevitajn de niaj multaj membroj, kiuj nuntempe ferias.

Pikniko okazis ĉe "John Forrest"-Nacia Parko (17/8) dum sufiĉe agrabla vetero.

● **ADELAJDO:** Je 5-a de septembro ni kunvenis en la infanvartejo. Bob Felby montris lumbildojn pri la Vikinga Urbo Frederikssund. Ĝi situas ĉe la Fjordo de Roskilde, kaj la iamaj vikingoj kutimis veni de Norvegio kaj enŝipiĝi en la fjordon por ataki Roskilde, kiu tiam estis la ĉefurbo de Danujo. En la daŭro de la vespero ni vidis ankaŭ lumbildojn pri Kumla en Svedio, kiu estas ĝemela urbo de Frederikssund.

Post tio ni revidis lumbildojn pri la Esperanto-ekspozicio en la Sudaŭstralia Biblioteko kaj pri la Zamenhofa Vespero de 1982.

—BOB FELBY.

● **MELBURNO:** Ges-roj J. Dimo, 11/7 estis bonvenaj gastoj Jim prelegis amuze pri "La Angla Lingvo, plej facile lernebla lingvo"? Semajnon poste, s-ino Fay Koppel parolis pri novaj libroj en la biblioteko de la Melburna Klubo.

Lumbildojn pri vojaĝo al Jindabyne prezentis Errol Chick (25/7). Semajnon poste Herbert Koppel raportis pri "Novaj el Esperantujo". Vic-Prezidanto Harold Beechey, 15/8, prelegis pri la "Rajto al sintrudo". Li montris plurajn librojn kun tiurilataj titoloj kaj prezentis diversajn subtenajn argumentojn kaj ekzemplojn.

Interesan prelegon prezentis. 22/8, Jan Makowski pri "La Japana Fenomeno". Li parolis pri la neklarigebla diferenco inter la tradicia sinteno kaj la aktuala ekonomia situacio, el kio eble kreskos konflikto en la menso de la japana popolo.

S-ro Jack Hawk el Perto vizitis Melburnon je 29/8. Li rakontis pri sia vagado per aŭtomobilo kaj demonstris la manieron per kiu li paroligas siajn samklubanojn. Poste Errol Chick montris unikajn lumbildojn pri la "surluniĝo" de usonaj astronautoj.

Prof. D-ro Carl Stop-Bowitz, Akademiano, Universitata Profesoro el Oslo, vizitis Melburnon la 13-an kaj 14-an de julio, 1983. S-roj S. Kanaĉki kaj H. Koppel gvidis lin al la Bestrezervejo en Healesville, kie la direktoro bonvenigis lin. Samvespere, en la hejmo de f-ino I. Gale, la gasto prezentis kolorplenan prelegon pri Norvegio. Je 14/7 oni kondukis la gaston al la regiono Gippsland, por plenumi lian multjaran deziron vidi la gigantan tervermon "Megascolides australis". Helpe de Konsilanto Green de Korumburra li povis forporti plurajn specimenojn de la vermo, por muzeoj en Sidnejo kaj Oslo.

● **SIDNEJO:** Je 20-a de junio Tom Elliott amuzis nin per sia tre interesa parolo pri amikoj kaj aliaj personoj, kiujn li "renkontis" per la kurtonda radio.

Je 4-a de julio ni diskutis la plej bonajn kaj malbonajn filmojn, kiujn ni vidis Semajnon poste D-ro Stop-Bowitz el Norvegio prezentis lumbildojn pri sia bela lando — interesa prelego de flua parolanto.

Je 18-a de julio ni diskutis la ŝanĝojn en la eduskistemo dum la pasintaj 30 jaroj.

—MARGARET CHALDECOTT

● **MANLY:** La 13-an de septembro, en la hejmo de Marjorie Duncan, ĉe aferkunveno, la ĉe-estantoj diskutis aranĝojn por la Apudmara Renkontiĝo en Manly, en januaro la 15-an ĝis 21-a. Marjorie raportis, ke mendis ĉambrojn 29 personoj. (N.S.K. 9, Okcidenta Aŭstralio 7, Kvinslando 6, Sud-Aŭstralio 2, A.C.T. 2, Japanio 2, Viktorio 1).

Pluaj ĉe-estantoj bonvolu mendi la proprajn ĉambrojn kaj informi la Manly Klubon ĉe Box 415, P.O. Manly, 2095. Ĉambroj en "Peoples Palace" ne plu haveblas. Guinda interesa programo estas jam aranĝita. Por detaloj sendu poŝtmarkon al Box 415.

—EUNICE GRAHAM

● **BATHURST, N.S.K.** Dum aŭgusto Radio 2MCE elsendis 9 Esperantajn programojn. Sep estis dulingvaj skeĉoj

kaj du estis informaj programoj pri Prononcado, Adverboj kaj Adjektivoj.

—ROGER SPRINGER.

● **BRIZBANO:** Kvar klasoj kunvenas semajne en la klubejo, krom negranda klaso por komencantoj al kiu patrino kaj filo vizitas. Nuntempe reklamado pri la fina klaso ĉijare por komencantoj, je 5-a de septembro, daŭras.

La 21-an de aŭgusto, dek anoj partoprenis "Aŭto-ralion", organizitan de Lynne Farr kun helpo de Merv Schramm! La partoprenintoj tre ĝuis la sperton. Sybil Martin kaj Bev Allatt, egalpoente, gajnis la premion, kiun ili redonacis al la Zamenhof-Festo en decembro. Loterieto kaj kradorstita lunĉo, sub bela aŭtuna ĉielo, konkludis sukcesan kunvenon.

La saman post-tagmezon, Trevor Steele alparolis grupon de skoltestroj, laŭ aranĝo de Cliff Bailey. La aŭskultantoj montris intereson kaj faris multajn inteligentajn demandojn.

Ĉiusemajne, aŭ la dramo-grupo aŭ la kantgrupo renkontiĝas vice en la hejmoj de klubanoj por prepari, kaj por la Federacia Kunveno en oktobro kaj por la AEA-kongreso en Kanbero.

La klubanoj gratulas la AEA-Prezidanton pro la kovrilpaĝo kaj artikolo en la UEA "Esperanto", julio-aŭgusto, 1983.

—RAY ROSS

● **ST. LUCIA:** Anoj de nia grupo suferis malfeliĉan perdon. Nia Prezidanto, **Alan Mason**, mortis en Wesley Hospitalo, la 2-an de septembro, post severa koratako. Liaj lastaj vortoj en Esperanto al edzino Ruth, kaj la familioj estis: "Mi amas vin ĉiujn. Via amo signifis ĉion al mi." La hejmo de Ruth kaj Alan ofte estis dua kunvenejo ĝis la lasta malsano de Alan.

Mary Stephenson baldaŭ revenos el Skotlando. Ŝi skribis pri vizito al la hejmo de William Auld en Dollar. Lian bildkarton pri la vizito ni multe aprezas.

—WINSOME GREENHALGH

24-a AŬSTRALIA

ESPERANTO KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato. Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉam-

bro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: \$25 Pensiuloj, Studentoj \$20.

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614**. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon, Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE", sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

5-a Listo de Aliĝintoj:

- 85. Vlado Kosef, Cobar, NSK
- 86. S-ino Joko Issobe, Tokyo
- 87. F-ino Julie Issobe, Tokyo
- 88. Rita Dunbar, Manly

Laŭŝtata distribuo: N.S.K. 32, Viktorio 19, Kvinslando 16, Okcidenta Aŭstralio 8, A.C.T. 6, Suda Aŭstralio 3, Japanio 2, Norda Teritorio 1, Tasmanio 1.

LA "A.E." SUBTENO — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$841
S-ro V. Kosef, Cobar, NSK	10
S-ro W. Betts	5
		<hr/>
		\$856

Dum nia vojaĝo en Eŭropo ni instigis, ke multaj kluboj, Esperanto-revuoj kaj gesamideanoj skribu al U.E.A. kaj proponu, ke oni okazigu la 1988-an Universalan Kongreson en Aŭstralio (okaze de nia 200-jara jubileo) kaj ankaŭ, ke ili skribu al nia Turista Oficejo kaj petu pliajn ekzemplerojn de la esperantlingva broŝuro pri Aŭstralio, kiu estas tre interesa kaj bele ilustrita. Nun ankaŭ vi povas helpi skribante al U.E.A. kaj al "Australian Tourist Commission, G.P.O. Box 73B, Melbourne, 3001, (Jim kaj Jennifer Dimo)

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

28. BOB FELBY

THE MAN FROM TORRENS RIVER*

"There was movement at the Congress, for the word had got around, that the former Ad'laide colts had gone astray.

(Or become non-Esperantists—had not stood their ground)
And something must be done without delay"

* See "The Man from Snowy River". (A. B. Paterson)

The year was 1980, the place, Sydney. It was said, "It's time we had a Congress in Adelaide. What a pity we can't. After all, the first Australian Congress was held there. However, there are no Esperantists there".

"Oh yes you can!" said bold Bob Felby: "I live in Adelaide".

"How many other Esperantists?"

"Not very many, but there's my wife and there's me and in 2 years' time, there will be others. I can guarantee we can host the Congress". And they did! Bob Felby "wheeled things round", and (not exactly "alone and unassisted" for he gathered round him a new, enthusiastic team) brought them back. Thanks to Bob's initiative, what couldn't be done, was done.

Who is this Bob Felby? Well, he was born a Dane and soon became great at

adapting. He had to! He had only seven years' "schooling" because German refugees were living in the school buildings and students had to learn in changing rooms, restaurants or Salvation Army Halls. Some of the time classes were just not on.

At 13, Bob worked—for a week—in a horseshoe factory, but found the work too hard. He needed shoes and he had to work, so he found a job in the Royal Porcelain Factory in Copenhagen. After 5 years, he went to work in a ship-building yard. Later he became a postman, a maker of cables, a sweeper of snow from streets, a conductor on a London Bus, a poultry farmer, a wardsman in a hospital in London. At the moment he works in the Adelaide Hospital. He also had to adapt to semi-prison conditions, for, as a pacifist, he

refused military service and was sent to a labour camp for 2 years.

It was whilst at the porcelain factory that Bob started Esperanto. At first he studied by himself but never got beyond the 4th lesson—the accusative. However, he 'phoned a lady teacher and, after going to her place once a week, he soon mastered the language.

Whilst working at the shipyard, he met several good Esperantists (mainly S.A.T. members) and also became interested in other languages, for he was helping to build Russian ships, under the control of a Russian supervisor and many different languages were spoken.

He enjoyed his job as a postman. Much of the mail was in Esperanto and one man told him that he could read all the Esperanto magazines himself before handing them over.

During his enforced stay in the labour camp, he was allowed to teach Esperanto in a class of 10 but after a year this nonsense was stopped and he was told he had to learn English because, as everybody knew, English was the international language.

In due course, Bob went to London where he stayed with an Esperanto friend and where he met an English girl called Audrey—now his wife. It's said that "you don't have to know the language" but if he had had a command of English and/or she had spoken Esperanto it would have helped. When Bob took her out, he said things first in Esperanto and, if she couldn't understand it, said the same thing in Danish, which, Bob says, is very much like English. They communicated sufficiently and went off to Copenhagen to be married. They stayed there for a year.

Back in England, both joined the South End Esperanto Club and made lots of good friends.

About 6 years later, they went back to Denmark where they associated a lot with Railwaymen Esperantists. They lived about 40 km from the capital and both commuted to work. Audrey worked in a chemical factory where there was a girl who could not speak Danish and so was very lonely. Audrey tried Esperanto and it worked! Now there were 5 Esperantists in the factory—this girl, her security-guard husband, a Bulgarian married to a Dane and, of course, Aud-

rey. They formed an Esperanto society in Frederikssund, started a little magazine and linked up with a twin town in Sweden. Esperanto had opened many doors!

However, Bob always considered himself a foreigner in England. Audrey was a foreigner in Denmark, so they decided in 1974 to come to Australia to be foreigners together. Of course, they are no longer foreigners but fellow Esperantists and fellow Australians.

—ARTHUR COCKING.

RECENZOJ

MIA BILDLIBRO DE ESPERANTO: Ĉi tiu libreto estas verkita kaj eldonita far John Moore, kaj havebla ĉe nia Libroservo aŭ rekte de la aŭtoro. Prezo: \$1.00 unuope, aŭ \$2.00 triope.

Ĝi enkondukas la akuzativon en la unua leciono, eĉ antaŭ ol la pluralon. Tion la plej multaj aŭtoroj evitas. Estos interese observi la sukceson de tio; ĝi certe helpas kompreni la diferencon inter transitivaj kaj netransitivaj verboj, kio prezentas la plej grandajn malfacilaĵojn por komencantoj; tamen mi emus enkonduki la akuzativon de moviĝo ne tiel frue.

La aŭtoro unue donas lecionon en la angla, kaj poste ripetos la saman lecionon en Esperanto, kio multe helpas la lernanton kompreni la Esperanton. La lertaj ilustraĵoj de Annie Spencer ankaŭ multe helpas. Presigis ĝin Ray Ross kaj Brizbana Esperanto-societo.

Pri la prononco estas uzata la kutima frazo: "are there three or two". La malavantaĝo de tio estas la ĉeesto de la litero "r", kiun la angla uzas por modifi la sonon de la vokalo. Tiun malavantaĝon la instruanto povas facile eviti, prezentante aliajn ekzemplojn sen la litero "r", kiel la "a" en "calm" kaj la "o" en "lawn". La ekzemploj de la diftongoj estas bonaj, krom ke "through your" por la diftongo "uj", ĉar la sono de "ough" estas "uŭ" kiel en la vortoj "food" kaj "rude" anstataŭ la pura vokala sono kiel en "foot" kaj "good", kaj tiel la "uj" fariĝas "uŭj", kreante du silabojn anstataŭ unu.

Bonega lernolibro por infanoj.

—Ken Linton.

Registered by Australia Post.

Publication No. VBH 1849.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland. 4702

N-ro 209 (289)

MELBOURNE

Oktobero, 1983

NIA ESPERANTISTA PILGRIMADO

JULIO-AŬGUSTO 1983

Ci-jare Idyss kaj mi kuraĝe entreprenis longan kaj lacigan vojaĝon. Unue ni aktive partoprenis la altgradan kurson de Esperanto ĉe la Stata Universitato en San Francisko, gvidata de Prof. Claude Piron el Svislando kaj de multe konata japana esperantisto Josimi Umeda.

Prof. Piron, eminenta psikologo, majstro de pluraj lingvoj kaj perfekta esperantisto ravis la aŭskultantaron. S-ro Umeda eŭrope edukita japano, ĉarmis la kursanojn per siaj afablaj manieroj, integreco kaj sperta instruado. Li ofte parolis kaj diskutis pri japana kulturo kaj japanaj vivkondiĉoj.

Ni frekventis 6 horojn da lecionoj tage dum tri semajnoj kaj vespere pretigis hejmtaskojn kaj ofte ĝuis kantadon kaj muzikon. Kvankam tiu trisemajna laboro estis laciga, ĝi estis plene kompensata. Dum semajnfinoj ni vizitis lokajn gesamideanojn, kiuj malavare regalis nin per bongustaj abundaj frandaĵoj, kaj distris nin per kantoj kaj dancoj, prezentitaj de japanaj kursanoj. Krom granda nombro de japanoj, aliaj kursanoj venis el Kanado, el pluraj Usonaj Ŝtatoj, Aŭstralio kaj Ĉinio.

Post la fino de la kurso, ni partoprenis la ELNA-kongreson, kie oni dis-

kutis pri la graveco de la Esperanto-Centro en Nov-Jorko kaj pri aliaj Esperanto-problemoj. La plejmulto el la multnombra kongreso forveturis per karavano al la UEA-kongreso en Budapeŝto.

Ni flugis al Kameoka-Kioto por partopreni la 70-an japanan kongreson kaj la Oomoto-jubilcon. La lokaj organizantoj bonvenigis nin kaj gastigis nin tre amike kaj malavare. S-ro Eizo Ito, kiu ĉiam entuziasme parolas pri aŭstraliaj esperantistoj, precipe klopodis pri nia aranĝado. Fakte oni asignis al ni puregan apartamenton kun ĉiuj komfortoj. Ni dormis sur la planko, laŭ japana stilo, kaj ĝuis tion; ni konsideras tiun dormmanieron tre saniga. La manĝoj estis abundaj, vegetaraj kaj bongustaj. Nek pano, nek viando, nek butero, nek alkoholo, multe da rizo kaj multe da marverdajo. Nur dum oficialaj vespermanĝoj kaj bankedo oni ofertis tre bongustan fiŝon.

La malfermo kaj la fermo de la kongresoj estis tre detale prizorgitaj. La ceremonioj estis tre solenaj, tre pompaj kaj impresaj. Precipe la religia ceremonio de publika kunveno de Oomoto, okazigita en digna, modesta, sed arta templo, multe impresis nin.

Oomotanoj, religia grupo de dediĉitaj esperantistoj de absolute morale integro, do homoj kies devizo estas "Unu Dio, Unu Mondo, Unu Lingvo, konvinkis min, ke vera religio, ne bigotismo, havas lokon kaj ludas gravan rolon en la homa vivo ĝenerale, kaj povus esti tre taŭga kaj en akordo kun la Esperanto-movado.

Aparta atento kaj gastamo estis dediĉitaj al eksterlandaj delegitoj. Ni estis superŝutitaj malavare per donacoj. Post la kongreso okazis tre agrabla ŝipekskurso laŭlonge de rapidega rivero inter Kameoka kaj Kioto. Estas menciinda la prezentado de teatraĵo speciale verkita de Oomoto por la okazo.

Post Kameoka ni flugis al Tokio, kie ni ĝuis kvar neforgeseblajn tagojn. Ni vizitis kaj eĉ dormis unu nokton komforte en la "Esperanto-Instituto". La esperantistoj de Tokio tre varme bonvenigis nin kaj dediĉis al ni multe da tempo, precipe ges-roj Issobe (la gepatroj de Majo) s-ro Minami kaj aliaj, inter kiuj ankaŭ troviĝis la veterana esperantistino Yukiko Isobe. Ĉiuj tre bone konas kaj aprecas samideanojn en Aŭstralio. La gepatroj de Majo invitis nin per bonega tagmanĝo kaj ĉarmaj memoraĵoj. S-ro Minami donacis al ni

interesan libron "Dezerto", tradukitan de li en Esperanto.

La ekonomia situacio en Japanio estas tre prospera kaj enviema. Senlaboreco ne ekzistas, la banka interezo estas tre malalta (3-4%) kaj same la inflacio. La lando posedas pli ol 300 universitatojn, sed pro la alta nombro de diplomitaj intelektuloj, multaj ne trovas taŭgan faklaboron; ta-men ili volonte laboras en aliaj fakoj.

En Taipei (Taivan), nia lasta halto, ni renkontis du lokajn samideanojn, tre dediĉitajn kaj klerajn esperantistojn, kiuj tre amike bonvenigis nin kaj kontribuis al nia plezurega libertempo en tiu belega kaj fascina urbo. Ni tuj enamikiĝis kun tiuj novaj amikoj, manĝis kune, promenadis kaj babiladis. Precipe ni ĝuis la viziton al vilaĝo de indiĝenoj, tre interesa loko en montetoj, kiun oni atingas per malgrandaj vagonetoj sur mallarĝaj reloj. La indiĝenoj prezentis popolajn dancojn en riĉkoloraj roboj en tre gaja etoso. La arhaveno kaj monumentoj de Taipei estas ege impresaj. La Taipeianoj estas tre afablaj homoj kaj tre helpemaj al turistoj.

Entute ni riĉigis niajn spertojn dank' al nia Esperantista pilgrimado.

—A. EINHIVICI.

De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma

LA TURKOJ EN VIENO

Vieno celebradas sian liberiĝon, antaŭ 300 jaroj, el la sieĝo de la turka armeo, kiu celis konverti Eŭropon al Islamismo. En septembro 1683, 250,000 turkaj soldatoj, sub la gvido de la Granda Veziro Kara Mustafa, kiuj sieĝis Vienon dum du monatoj, estis disbatitaj de kristana armeo. Estis haltigita tiel, la antaŭeniro de turkoj en Eŭropo. kun la revo islamigi la okcidentan mondon. Temis pri turno en la historio, kaj samtempe pri la unua anonco de la dekadenco de la "Otomana Imperio".

La pintoj de la celebradoj okazis en septembro, kiam Papo Johano Paŭlo la dua vizitis Vienon. Interne de la viena Artgalerio (kies fasado estis porokaze refarita, kaj nun similas buntan turkan tendon) videblas 1500 turkaj objektoj: armiloj, flagoj, militaj konkeraĵoj, artverkoj rilatoj al militaj scenoj aŭ la portretoj de militaj ĉefroluloj. Naturdimensia modelo, kun sonaj kaj lumaj

efektoj, reproduktas kavalerianojn kaj infanterianojn, kiuj sieĝas la urbon.

La Papo el Pollando (kies samnacionoj, siatempe, rimarkinde kontribuis je la venko super turkoj) asertis, ke la memorigo havas elstaran gravecon, ne nur ĉar Vieno estis savita "dank' al la komunaj streboj de la kristanaro", sed ankaŭ ĉar la evento utilas por "konsciigi la nuntempajn kristanojn pri la komuna respondeco, kiun ili havas al Eŭropo, kaj por doni novan kuraĝon por akceli pacon kaj justecon. homajn rajtojn kaj solidarecon inter la popoloj".

—“Ĉu vi ne pensas, ke mia filo estas eksterordinare talenta?”, demandas fiere la patrino la instruiston. “Li havas multe da originalaj inventoj! Ĉu ne?”

—“Jes”, ĝemas la instruisto, “precipe kio koncernas la ortografion!” (Bud. Inf.)

Ilse Panaschell en la Esperanto-Emisio de Radio Vieno

300 JAROJN VIENA KAFEJO

Ci-jare oni ne nur festas la venkon super la turkoj en la jaro 1683, sed ankaŭ 300 jarojn de Viena Kafejo. La legendo rakontas, ke Kolschitsky alportis la kafon al Vieno kaj fondis la unuan kafejon en Vieno. Sed tio estas legendo. En vero malfermis la 17-an de januaro, 1685 la armeno Johannes Diodato la unuan kafejon en Vieno, sed ĉar por ni turkoj kaj kafo estas interligitaj, ni solenas ambaŭ ĉi-jare.

Ekzistas multe da kafejoj ĉie en la mondo, sed la Viena Kafejo estas io eksterordinara. Ni trovas atmosferon, kiel nenie alie. Por la vienano la kafejo estas dua hejmo. Ĉi tie li povas labori kaj renkonti geamikojn aŭ komercajn kompanianojn. Li povas legi ĉiujn gazetojn kaj ĵurnalojn kaj se oni ne havas multe da mono, oni povas resti kelkajn horojn, konsumante nur unu malgrandan tason da mokao. La fama glaso da

akvo kompreneble estas aldonita senkoste.

La viena kafejo kontribuis multe al la aŭstria kulturo. Ĝi estas renkontejo por artistoj, pentristoj, poetoj kaj muzikistoj. Por citi kelkajn: Strauss, Raimund, Schubert, Schwind, Brahms kaj eĉ la homeviteman Beethoven oni povis trovi en la kafejo. Ankaŭ nuntempe kelkaj famaj kafejoj estas satataj rendezuejoj por aktoroj kaj politikistoj.

Post la dua mondmilito multaj grandaj, belaj kafejoj devis cedi al bankoj aŭ meblodomoj. Oni iris en la "ekspresojn" kaj trinkis starante la mokaon. Sed feliĉe tiuj tempoj estas pasintaj, nuntempe oni denove ŝatas la veran vianan kafejon. Kelkaj grandaj kafejoj montriĝas en nova brilo, al kiu ankaŭ la kulturoficejo de la urbo Vieno kontribuis. Ĝi ekkonis ĝustatempe, ke ili estas necesaj por la evoluo de nia kulturo.

KIU FONDIS LA UNUAN ESPERANTO-KLUBON EN AŬSTRALIO?

La "Australian Encyclopedia" erare informas nin, ke **George Alphonso Collingridge de Tourcey** starigis la unuan Esperanto-klubon en Aŭstralio. Fakte, li fondis en 1908 la "Gosford-E-Klubon, kiu havis 17 membrojn. George Collingridge estis la Prezidanto kaj P. J. Holdsworth la Sekretario.

Sendube Collingridge estis unu el la plej fruaj esperantistoj en Aŭstralio kaj fondis la **unuan Esperanto-klubon en Nova Sud-Kimrujo**. Laŭ la esploroj de nia historiisto Ivan T. Maddern "Collingridge ŝajne neniam fariĝis sperta en la lingvo. Tamen li estis la sola esper-

antisto el N.S.K., kiu ĉeestis la 1-an Aŭstralian E-Kongreson en Adelajdo, oktobro 1911."

La honoro esti la fondinto de la unua E-klubo en Aŭstralio apartenas al **John Booth, M.C.E.** Li estis eminenta inĝeniero kaj membro de la konsilantaro de la Melburna Universitato. En lia hejmo (25 Rathdown Street, Carlton, Melbourne), je **10-a de februaro, 1905**, estis fondita la "Esperanta Klubo Melburna". La ĉeestintoj ĉe la fond-kunveno elektis unuanime John Booth kiel Prezidanton kaj la nova grupo kunvenis ĉiusemajne en la hejmo de Booth.

EL POPOLA ĈINIO

Rabatoj por frua abono:

La 1984-a abonvarba kampanjo de "El Popola Ĉinio" jam komenciĝas. Ek de la 1-a de nov. 1983 ĝis 29-a de feb., 1984, vi povas profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj

varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesos varbi 4 abonantojn vi ricevos ĉinstilan memoraron kiel donacon.

Abontarifo: 1 jaro \$7.00 rabatita prezo \$5.60 2 jaroj \$11.00 rabatita prezo \$8.80; 3 jaroj \$15.00 rabatita prezo \$12.00.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St. Glenhuntly, Vic. 3163.

Antaŭ proksimume unu jaro fondiĝis nova Esperanto-asocio sur la malgranda franca insulo Réunion, en la Hinda Oceano (ĉ. 800 km oriente de Madagaskaro). Ĝia teritorio estas nur 2500 kvadrat-kilometroj kaj havas proks. 250.000 loĝantojn. Ni petis la prezidanton de tiu nova asocio sendi al ni artikolon pri tiu insulo.

HISTORIO DE REUNIO

La insulo Reunio estis malkovrita de portugala maristo Pedro au Garcia Mascarenhas, komence de la 16-a jarcento. La insulo estis tiam loĝita nur de multaj birdoj kaj testudoj. De 1513 ĝis 1638, diversnaciaj maristoj (anglaj, francaj, nederlandaj, portugaliaj) haltis kelkfoje sur la insulo, sed ilia devenŝtato ne interesiĝis pri koloniigo. Nur en la jaro 1638 la Francoj oficiale prenis posedon de la insulo (tiam ĝi nomiĝis Santa Apolonia). Ili nomis ĝin Insulo Bourbon, laŭ la nomo de la tiama reĝo Ludoviko la 14-a. En la sama jaro, la Nederlandanoj fariĝis posedantoj de la naŭbara insulo Maŭricio (antaŭnomo de Maŭricio van Nassau), kie ili restis ĝis 1712.

En la jaro 1666 la Francoj komencis fondi kolonion en la regiono de St. Paul, nord-okcidente de la insulo. La unuaj enloĝantoj estis do francoj (maristoj kaj ge-aventuruloj). Sed mankis laboristaro. Oni do praktikis, kiel estis tiam kutimo, nigrultrafikon: oni "importis" Afrikanojn, kiuj devis labori kiel sklavoj. Franca Revolucio (1789) okazis, Napoleono I-a fariĝis imperiestro (1804). La insulo Bourbon fariĝis insulo Réunion (1794) kaj poste insulo Bonaparte (1806).

De 1809 ĝis 1815, la Britoj okupis la insulon. En 1815 ĝi iĝis ree franca kaj ree nomiĝis "Bourbon". 1848 estis grava jaro. Bourbon fariĝis definitive Réunion (Reunio) kaj la sklavoj liberiĝis. Kvankam "liberaj", la plimulto el ili plue laboris sur la bienoj, kie ili antaŭe ŝvitis kiel sklavoj sur sukerkano aŭ kafo aŭ tabakplantaĵoj. Baldaŭ okazis tamen manko de laboristoj, kaj sekve oni organizis (de 1860 ĝis 1882) enmigradon de laboristoj el Hindio (Tamiloj). Tiuj "liberaj", sed tre malriĉaj laboristoj anstataŭis la sklavojn.

En la nuna loĝantaro, oni retrovas la tri ĉefajn originajn rasojn (kvankam ne

tute purajn). Ĉirkaŭ kvarono estas eŭropdevena, kvarono afrikdevena, kvarono hinddevena. La kvara kvarono konsistas el ĉiugradaj miksaĵoj el la aliaj rasoj.

Ankaŭ multaj ĉinoj kaj islamanoj el Hindio enmigris poste, por labori kiel komercistoj Ĉiu grupo konservis parton de sia propra kulturo donante al Reunio grandan diversecon tiurilate.

Post la dua mondmilito, kiam la plimulto el la francaj kolonioj komencis batalon por sendependeco, la loĝantaro de Reunio esprimis la deziron fariĝi franca departemento. (La 'departemento' estas administra regioneto en Francio; Francio konsistas el ĉ. 100 departementoj). La Reunianoj havas do depost 1946 la samajn devojn kaj rajtojn, la samajn leĝojn kiel la aliaj "eŭropaj" francoj.

La politikaj partioj estas la samaj kiel en Francio. Ekzistas tamen ankaŭ tiel malgranda partio por sendependeco. Sed la granda plimulto deziras resti franca. La oficiala kaj lerneja lingvo estas kompreneble la franca. La loĝantaro parolas francdevenan dialekton, la "kreolan". La diversaj etnaj grupoj vivas kune harmonie. Oni ne povas diri, ke ekzistas rasa problemo. La veraj problemoj estas ekonomiaj, sed tio preterpasas la kadron de tiu rapida historia bildo de la Insulo Reunio.

— P. LELIEVRE.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto
Bun'iči Išizaki)

La 32-a kongreso en la Tokai-regiono (distrikto de Nagoya) okazis kun partopreno de 50 esperantistoj. Du eksterlandanoj, S-roj Markus Gabor (Hungario) kaj František Hajnos (Pollando), ankaŭ partoprenis.

S-ro Gabor parolis pri "la internacieco de Japanujo". Estis stipendio de esperantista entrepreno en Nagoya, kiu ebligis al li lian restadon por studi en Universitato. S-ro Hajnos parolis pri ĝeneralaj aspektoj de Pollando. Prof. M. Katumori parolis pri "Esperanto, la interlingvo en la maŝina tradukado".

* * * * *

La ankaŭ en Aŭstralio bone konata esperantisto R. Bossong gvidis grupon de ok nederlandaj kaj unu brita esperantistoj en vojaĝo tra la Sovet-Unio kaj Japanio. Dum aliaj membroj de la vojaĝgrupo povis nur sekvi antaŭaranĝ-

itajn vojaĝplanojn, la esperantistoj estis akceptitaj en la hejmoj de lokaj samideanoj.

* * * * *

La esperantistoj en la distrikto de Kanagawa organizis "Panel-diskuton" en la Centra Publika Halo de Kamakura. Kvindek personoj partoprenis kaj diskutis pri la temo "Kio estas Internacia Amikeco nun por ni".

S-ro T. Kataoka de la Esperantista Grupo por Homaj Rajtoj diris, ke la ĉefa tasko estas "konstrui veran internaciismon kaj konkuri ŝovinisman naciismon". Li ankaŭ pledis por senrezerva okcidentismo de nuntempaj japanoj. S-ro S. Namgung forte kritikis la antaŭjuĝon de japanoj kontraŭ koreanoj, kiuj daŭre loĝas en Jananio. Aliaj parolantoj parolis kontraŭ diskriminado koncerne al internacie geedziĝintaj japanoj kaj pledis por pli vigla korespondado inter japanoj kaj ĉinoj.

* * * * *

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Je nia kunveno de 14-a de septembro. Vera Payne rakontis pri sia vojaĝo al usono, kie ŝi partoprenis trisemajnan Esperanto-kurson ĉe la Universitato de San Francisko. Ankaŭ S-ino I. Einihovicj revenis de longa vojaĝo kaj ŝi rakontis pri sia vizito al Japanio.

Je 19-a de septembro ni havis la plezuron renkonti Arthur kaj Phyllis Cocking el Manly. Du tagojn poste ni montris al ili la kamparon ĉirkaŭ Perto.

● **MELBURNO:** Novajojn el Esperantujo prezentis s-ro H. Koppel (5/9) kaj s-ro S. Kanaĉki aldonis raporton pri sia sperto kiam oni intervjuis lin pri Esperanto en la jugoslava sekcio ĉe Etna Radio-Stacio 3 EA.

Je 12/9 la membroj kontribuis diversajn erojn al la programo. Elstaris prelego de s-ro Errol Chick, kiu tre teknike parolis pri "Radiokomunikado".

S-ro Jan Makowski (19/9) kaptis la intereson de la ĉeestantoj per prelego pri "Kulturaj Aspektoj de Japanio", en kiu li priskribis la historion kaj evolu-

on de diversaj artformoj ĝis la komenco de influo el la okcidento.

La ĉiujara bazar-vespero "American Tea" okazis je 26-a de septembro. Ĉeestis 23 personoj el la Melburna, Oakleigh- kaj Malvern-grupoj, kiuj vendis kaj aĉetis varojn kaj loteribiletajn antaŭ ol refreŝigi sin per abundaj bongustaj. Dum tiu gaja kunestado estis deciditaj la du loterioj por kukoj. La fina enspezo estis \$73.59, kiu inkludis mondonacojn de ges-roj Fallu kaj f-ino A. Hearn.

Por festi la "Jaron de Komunikado", la U.N.-Asocio de Melburno organizis ekspozicion en la "Butikuma Centro de Eastland", de la 15-a ĝis 20-a de aŭgusto, 1983. Ges-roj G. Tumman kontribuis bele aranĝitan standon de Esperanto-libroj, broŝuroj kaj gazetoj, kiu allogis grandan intereson inter la multaj vizitantoj.

● **KANBERO:** Je 8-a de aŭgusto membroj kunvenis por legi la dramon verkitan de Ralph Harry por la Dramo-Konkurso ĉe la Aŭstralia Kongreso en januaro. Ok personoj ludas en la dramo, kies titolo estas "Diplomatia Dilemo".

Nia taggazeto "Canberra Times" publikigis raporton de Ralph Harry pri la intenco de A.E.A. eldoni "Antologio de Aŭstralia Literaturo". La revuo de la Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, "Canberra Linguist", aperigis artikolon de Ralph Harry pri "La Universala Kongreso en Antverpeno".

● **BATHURST, N.S.K.:** Dun septembro Radio 2MCE elsendis sep dulingvajn skeĉojn kaj du informajn programojn, kiuj pritrakitis la prononcadon de verboj kaj "Demandoj kaj Respondoj". —ROGER SPRINGER.

● **BRIZBANO:** La 10-an de septembro, Margaret kaj Cliff Bailey revenis de la UEA-Kongreso en Budapeŝto, tre entuziasmaj pri la granda sperto. Krom la vizito al pluraj landoj, ili renkontis kelkajn plumamikojn. Niaj membroj antaŭeas ĝisdatan novajon pri la Kongreso kaj eblajn sugestojn por certigi glatajn aranĝojn dum 'NIA' UEA-Kongreso en 1988.

Nia vigla Socia Sekretariino Lynne Farr aranĝis grupviziton al speciala muzik-vespero en la Germana Klubo, la 16-an de septembro, kiam 32 anoj kaj parencoj partoprenis kaj tre ĝuis ne nur la kutiman distraĵon, sed ankaŭ la provizitajn vinon kaj fromaĝon. —RR

Letero al la Redakcio

"Mi volas komplimenti vin pro via ĉiam interesa AUSTRALIAN ESPERANTIST"

Cathy Schulze (Ĉefredaktoro "ELNA NEWSLETTER")

EL LA FEDERACIOJ

● **VIKTORIO:** La jara Seminario okazis je sabato, 6-a de aŭgusto en la hejmo de f-ino Isabel Gale en Glen Waverley. Dudek ses Esperantistoj el ĉiuj Melburnaj Esperanto-grupoj partoprenis.

S-ino Fay Koppel, en 2 sesioj, uzante libron de Bertram Potts "La Nova Butikisto de Nukugaia", pritraktis gramatikajn malfacilaĵojn de Esperanto. En la sesio "Mallongaj prelegoj" partoprenis multaj ĉeestantoj. Elstaris interesaj prelegoj de s-ino Ruth Tumman pri "Antikva Romo" kaj de Mary Armour, kiu komencis lerni Esperanton antaŭ nur 4 monatoj, kaj rakontis pri sia laboro kiel "Trafika Inĝeniero". Membroj de la Oakleigh-grupo prezentis varian programon.

Vespere, preskaŭ ĉiu ĉeestanto partoprenis en serio da prelegoj pri "Mia unua fluga per aeroplano" aŭ pri "Kie mi estis inter 1940 kaj 1945".

F-ino Isabel Gale kaj la membroj de la Waverley-Grupo meritas la dankon pro la glata servo rilate la multajn refreŝigajn paŭzojn kaj la luksan vespermanĝon.

La 49-a Nov-Zelanda Esperanto-Kongreso okazos inter la 6-a kaj 10-a de januaro, 1984, en la "Epsom Girls' Grammar School Hostel" en Auckland. Aŭstraliaj Esperantistoj, kiuj hazarde vizitos Auckland je tiu tempo, estos bonvenaj gastoj kaj NE pagos kongreskotizon. Sed vi devos rezervi loĝadon sendante \$50 (N.Z.) deponon al la sekretariino **S-ino Rita Aagaard, 8 Springwood, Place, Balmoral, Auckland 3 N.Z.**

NEKROLOGO

Mortis en Melburno je 24-a de aŭgusto, 1983, s-ro Ištvan TOTH, fidela membro de A.E.A.

Li naskiĝis en Jugoslavio (6/10/1902) kaj eklernis Esperanton, kune kun sia edzino, en la jaro 1922. En la jugoslava urbo Subotica li instruis Esperanton dum multaj jaroj. Kun la helpo de s-ino A. Paling (Melbourne) kaj ges-roj J. Matasin (Sydney), ges-roj Toth enmigris

Aŭstralion en la jaro 1966. S-ro Toth paralizigis en junio 1975 kaj restis en radseĝo ĝis sia morto.

Sincerajn kondolencojn al lia edzino.

LA "A.E."**SUBTEN — FONDUSO****1982/83**

Antaŭe raportita	...	\$856.00
S-ro S. J. Ling, Warburton, Vik	1.50	
S-ino L. Fridenbergs, Melbourne	4.00	
S-ro Herbert Koppel, Melbourne	1.50	

\$863.00

24-a AŬSTRALIA**ESPERANTO KONGRESO****7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT**

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia Universitato, Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj ĉambroj en la Kolegio. Kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: \$25 Pensiuloj, Studentoj \$20.

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614**. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon, Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE". sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

6-a Listo de Aliĝintoj:

89. S-ro L. V. Scott, Manly
 90. S-ino Bessie Scott, Manly.
 91. S-ino N. Lyndon, Anglujo
 92. S-ro J. Pfeiffer, Melbourne
 Laŭŝtata distribuo: N.S.K. 34; Viktorio 20; Kvinlando 16; Okcidenta Aŭstralio 8; A.C.T. 6; Suda Aŭstralio 3; Japanio 2; Norda Teritorio 1; Tasmanio 1; Anglujo 1.

DRAMO-KONKURSO: Membroj de la Kanbera E-Klubo prezentos unuaktan teatraĵon "**Diplomatia Dilemo**". Reĝisoro estas Sam Ellyard. Dramo-grupoj en Brizbano, Manly, Perto kaj Sidnejo estas petataj sendi la titolon de sia dramo al Herbert Koppel, 41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073.

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

29. CLARENCE STROCHNETTER, O.A.M.

Disabled, yet very able.

Though, for many years, Clarence has been confined to a wheelchair, he has achieved much more than many of us who are "sound in wind and limb". He has been involved in community affairs from politics to sport and this involvement was recognised when, on Australia Day, 1979 he was awarded the Medal of the Order of Australia for "service to the community". He has campaigned for improved designs in architecture-designs which will give the disabled better access, especially to public buildings. He has fought for improved services that will permit the disabled to mix more satisfactorily with other people: for information that will make the disabled more aware of what aids and services are available to them. Clarrie is President of the Muscular Dystrophy Research Support Association of Tasmania, was a member of the International Year of the Disabled Persons and represented that body on the State Commonwealth Employment Promotion Committee for the Disabled. Other offices of this ilk are:- Vice-President of the Committee for Disabled in the North, Ass't Sec. and Bulletin Editor and State Representative on the Council of D.P.I.

What does he do in his spare time? Well, he exchanges tapes (instead of letters) and is a significant force in the Competitive Woodchopping movement. He had 22 years as Sec./Treas. of the Pyengana Sports Club, was Pres. of the Pyengana Chopping Club (17 years) and for 17 years has been Starter and Time Keeper for his division of the Axemen's Association. Music also occupies a great deal of his time — especially country music, for he plays guitar and sings, and at times, instead of singing, plays the mouth organ whilst playing guitar.

But what about his Esperanto activities? Clarence's Esperanto age is only about 10 although his Esperanto birth was preceded by an unusually long gestation period of 10 years. In the 1960's

an Esperanto news item in a Tasmanian newspaper fertilised his imagination and made him want to learn the language. A book shop in Hobart supplied "Teach Yourself Esperanto" by Creswell and Hartley. Alas, the book was carefully put away in a cupboard, where it stayed until 1973. He rediscovered it whilst looking for something else. This time, however, he "screwed his courage to the sticking place" and has never looked back.

Well, hardly ever! All went well until he reached lesson 4 or 5 when a couple of points bewildered him.

He knew no one who could give the help he needed (for he lived way out in the country) but in the back of the book was a Melbourne address for A.E.A., so he wrote to that address. Herbert Koppel has since remained a very special person in Clarence's heart, for he replied, explained, encouraged and "opened horizons to a new world".

He gave the addresses of several Esperantists in Tasmania and information about A.E.A. and correspondence courses. Now Clarence was not alone. He joined the A.E.A. and linked up with the correspondence courses. At this point John Moore entered his life, at first as a tutor and then as a firm friend.

A delightful surprise occurred when Clarence received his first "adresaró". Looking for other Tasmanians, he came upon the name of Mac Lefevre, whom he had known from childhood as a family and personal friend. He didn't have a clue that Mac was ever remotely interested in the language. At the same time as Clarence was "jumping up and down with excitement", Mac was apparently doing the same, having just read Clarence's name in the "adresaró". Now they are not just friends but Esperanto friends.

In 1976 "Clarrie" attended his first Esperanto Congress (in Melbourne) and made many new and valued friends. He

became a member of U.E.A.—of which he is now a vice-delegate—and became a tutor for A.E.A.

Though Clarence was suffering from muscular dystrophy, his brain and his spirit had by no means atrophied: in 1978 he gained the Norma Supera Diploma.

For some years a nurse named Barbara had looked after him with "tender loving care". In 1980 Clarence took Barbara unto him as wife, thereby, without losing a nurse, gaining a wife, a "ready made" family and grandchildren.

Belated Congratulations!

—ARTHUR COCKING.

RECENZOJ

LA TRANSDORSOJETO verkita de J. Novak, I Špička kaj V. Hník. 70 paĝoj, multaj ilustraĵoj, eld. de Ĉeĥa E-Asocio.

Ĉi tiu maldika libro estis aparte interesa al mi, ĉar mi dufoje luktis en la Oksforda judo-teamo kontraŭ Kembriĝo, kaj estis prezidanto de la klubo. Poste, pro akcidento dum judo-matĉo, mi iĝis paraplegiulo. La verkistoj estas du inĝenieroj kaj unu doktoro, ĉu kuracisto mi ne scias. Sendube la faka scio ebligas tre klaran priskribon de la bataĝo nomita "scoinage" en la japana lingvo. Abundas instruaj ilustraĵoj, kvankam en Fig. 4-e jetonto ŝajne havas tri kubutojn.

Elstare valora estas vortareto kaj listo de fakaj terminoj. Mi gratulas la verkistojn pri la adverbo, antaŭe nekonata al mi, "ruke". (vidu "PIV" "ruk")

—R. G. Robertson.

AKADEMIAJ STUDOJ 1983 estas redaktita far Rudiger Eicholz, kiu kompetente frontas sufiĉe grandan taskon. Li estas la komisionestro por la sekcio de la Akademio de Esperanto nomita la Centro por Teknikaj Vortaroj kaj Terminologio. Estas nenia indiko pri prezo, sed la adreso de Rudiger Eicholz estas R.R.1, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL, 1B0.

Ĉi tiu verko traktas la diversajn studojn de tiu Centro, el kiuj la duono de la membroj estas akademianoj. La studo

traktas la jenajn problemojn: Esperanta ortografio, la vorto "po", seksa diskriminado, geografiaj nomoj, matematikaj terminoj, kaj la ĝusta termino por la moderna tekniko, kiun ni aludas per la terminoj "komputero", "komputoro", "komputilo" kaj "komputro". Tre interesaj vidpunktoj estas lerte kaj klare prezentitaj.

La temo Esperanta Ortografio mal multe min interesas, ĉar mi opinias, ke post preskaŭ cent jaroj la pordo al tiu temo estas jam fermita. Tamen, ŝajnas, ke la nova prezidanto, D-ro Andre Albault, subtenas la enkondukon de la litero "w" por certaj esprimoj, kaj mi multe fidus lian kapablon.

La ideoj pri la necesaj novaj terminoj por indiki sekson povus esti necesaj en leĝaj dokumentoj, sed mal multe interesas la laikon. D-ro Albault tre kompetente prizorgas la tre gravan temon pri geografiaj nomoj, sed tiu estas kolosa tasko. Mi ne kompetentas analizi la laboron de O. Reiersol pri matematikaj temoj, do mi ne komentos.

Polemiko inter Rudiger Eicholz kaj alia membro pri la ĝusta termino por la nuna P.I.V.-a termino "komputero" estis tre vigla, sed ŝajnas al mi, ke ili strebas apliki terminon jam de longe uzitan en naciaj lingvoj por pli simplaj teknikoj, kiam ili devus trovi novan terminon; "komputi" estas vere sinonima kun "kalkuli", kaj nek "nombri" nek "mezuri" taŭgas por operacio, kiu estas multe pli komplika afero, kaj tiu nova operacio bezonas novan terminon. Eicholz sugestis novan terminon, sed evidente mankas al li sufiĉa subteno far la aliaj membroj. Tamen eĉ liaj oponentoj admiras lian entuziasmon kaj sindediĉon al la tasko.

La nova neologisma termino proponita far Eicholz estas "kompti" por signifi la modernan agon procedi informon. Ĝi ja estas konciza kaj ŝajne tre taŭga, sed mi kompreneble, ne pretendas kompetenton pri tio. Mi devas kontentigi min aprobi lian vorton, kaj admiri lian gravan laboron.

Bedaŭrinde pluraj paĝoj estas tiel malbone presitaj, ke mi ne povis deĉifri, ĉu vorto estas akuzativa aŭ plurala. La enhavo meritas multe pli bonan prezenton.

—KEN G. LINTON

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 210 (290)

MELBOURNE

Novembro, 1983

NATIONAL LANGUAGE POLICY

SENATE COMMITTEE COMPLETES INQUIRY

On 31 October, 1983 the Chairman of the Senate Standing Committee, Senator Mal Colston (ALP, Queensland) received the President of Australian Esperanto Association, Mr. R. L. Harry, AC, CBE., who presented a supplementary statement for the Committee's inquiry into "the development and implementation of a co-ordinated language policy for Australia."

After reviewing developments since the Association's submission of June, 1982, including the Universal Congresses of Antwerp and Budapest, and the great expansion of teaching of Esperanto in China, the statement referred to events in Australia, including the invitation by the Prime Minister to UEA to hold the Universal Congress in Australia in 1988, which UEA has accepted. Details were given of the establishment of the Working Group for Esperanto, by organisations with a total membership of about 80,000.

Attached to the submission was a Course Outline prepared by Mrs. Vera Payne of Perth for a course in 1984 at the Western Australian College of Advanced Education (Mount Lawley College) together with a resource list for primary and secondary schools compiled by Mrs. Shirley Gradussov.

The submission concluded with the following summary of the views of AEA:

The Association seeks approval and adoption of the following minimum program for the promotion of the International Language Esperanto:

- (1) Acceptance by the Australian Government of the principle of language equality in international relations and value of Esperanto as a neutral language in appropriate contexts, as well as in personal communication and as a preparation for the learning of other languages,
- (2) Indication by the Australian Government that it would welcome action by the State education authorities and private schools, and would itself participate through the educational authorities in Territories, to promote wider teaching of Esperanto,
- (3) Active co-operation by Australian educational authorities in steps to make Esperanto available in 1984-86 as an elective study in at least one College in each State and the A.C.T. and Northern Territory.

- (4) A modest grant (say \$20,000) to the Australian Esperanto Association to establish the stocks of books and other materials required for an initial 200 student-teachers, in accordance with the Model

- Curriculum, and
(5) Expanded teaching in schools as teachers become available.

RALPH HARRY, President,
Australian Esperanto Association.

AŬSTRALIA ESPERANTISTINO GAJNIS LA PREMION "JOHN BUCHANAN"

En la jaro 1930 mortis en Londono skota kuracisto D-ro John Buchanan. Li testamentis £4000 al la Universitato de Liverpool por starigi tie Esperantan lek-toran postenon.

Ĉiujare la Universitato de Liverpool aljuĝas premion de £100, por kiu povas kandidatiĝi matrikulita studento aŭ diplomo de universitato en la Brita Komunumo de Nacioj. Multaj konataj esperantistoj jam gajnis tiun premion, kiel ekzemple Marjorie Boulton en 1956 kaj William Auld en 1958. Ankaŭ D-ro C. J. Caldera el Perto gajnis la premion en

1949.

Ĉi-jare s-ino Ruth McGrath, la klera esperantistino de la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo, partoprenis kaj gajnis la konkurson. Ĉu estas hazardo, ke la denaska nomo de Ruth estis "Goodall", kaj vere "ĉiel-bona" ŝi estas? Si ne nur estas bonega en la kapo, sed havas ankaŭ same bonan koron. Ŝi donacis la sumon de £100 (\$160) por plibonigi la Esperanto-Bibliotekon en la Universitato Murdoch. Kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo, kiuj donacus \$160 por Esperanto-celoj? — H.K.

95-JARA JUBILEO

La unua Esperanto-Grupo en la mondo festos je 12-a de decembro, 1983, la 95-an datrevenon de ties fondiĝo.

En februaro, 1885, fondiĝis en Nuernberg, Germanujo, la "Mondlingva Klubo", kiu propagandis la artefaritan lingvon "Volapük" de Pastro Schleyer. En aŭgusto, 1888, Leopold Einstein ricevis la "Unuan libron" kaj la "Duan Libron" de D-ro Zamenhof. Li tuj konvinkis, ke Esperanto estas la vera solvo de la mondlingva problemo.

Sub la influo de Einstein la "Mondlingva Klubo" forlasis "Volapükon" kaj enkondukis Esperanton. Tiamaniere fondiĝis en Nuernberg la unua E-grupo en la mondo. Krome aperis en Nuernberg, la 1-an de septembro, 1889, la unua Esperanto-gazeto de la mondo, "LA ESPERANTISTO".

La nuna prezidanto, s-ino Ester Keil Grosser, kaj la membroj de la grupo, salutas la Esperantistojn tra la tuta mondo kaj ŝojus, se okaze de ties 95-jara jubileo multaj gesamideanoj skribus al la adre o:

E peranto-Grupo Nuernberg, e.V.
P'ockhe'merstr 11
D-8500 Nuernberg 10, Germanujo.

"MAFIA": LA KAŜITA ITALA REGISTARO

(De nia itala korespondanto Norberto Saletti)

En multaj mondpartoj, kien ajn iris italaj elmigrintoj, oni aŭdas (sed ĉiam flustre) ofte la vorton "Mafia" (aŭ "Maffia", laŭ la suditala prononco de tiu ĉi vorto): sed, fakte, pri kio temas?

Laŭ pluraj homoj, temas pri kaŝita registaro, kiu imponas sian volon al honestuloj; laŭ aliaj, temas pri organizo gangstera, kiu profitas el krimoj, drogo, ĉantaĝo, ktp; laŭ aliaj ankoraŭ, temas pri organizo, kiu donas ian kvazaŭleĝan ordon en kelkaj regionoj de Italio. Kiuj el tiuj ĉi homoj pravas?

La stranga, eĉ ŝoka respondo estas: "ĉiuj"! Por kompreni tiun ĉi diĝon, oni devas unue pripensi la historian devenon de "Mafia", kaj antaŭ tio, kompreni ke oni erare donas la nomon "Mafia" al ĉiuj (ĉefe sud-) italaj krim-organizoj; fakte, "Mafia" estas tipe sicilia organizo, kiu disvastigis siajn tentaklojn tra la mondo pere de la elmigrintoj: ekzistas aliaj du krimorganizoj, similaj al "Mafia", sed malpli tentaklaj: Temas pri "Camorra" en la regiono de Napolo, kaj Ndrangheta en Kalabrio. La esencaj trajtoj estas pli-malpli la

samaj, sed "Mafia" havas pli mondskalan karakteron.

Historie, "Mafia" naskiĝis ĉirkaŭ la mezo de la pasinta jarcento, dum la sendependec-militoj en la tiam neekzistanta Italio, kiel organizo protektanta la "Cafoni", malriĉajn, malklerajn kamparanojn kaj paŝtistojn, kontraŭ la subpremado de la nobeluloj, kaj ĉefe de la reĝa familio "Borboni" (la sama kiu nuntempe regas en Hispanio). "Mafia" tiam estis helporganizo: sed, iom post iom, ĝi fariĝis povorganizo, infektante ankaŭ la plej altajn ŝtatnivelojn. La financa povo kreskis rapide: unue per kontrolado de la merkatoj, tiel ke nur homoj kiuj respektis la leĝojn de "Mafia" povis vendi siajn varojn, kaj poste per kontrolado de la vendado de alkoholoj, de prostituado, de laborpostenoj, de laborkontraktoj, kaj lastatempe de drogoj. La merkato de ŝtelitaj artoj kaj de alispecaj ŝtelitaĵoj estas unu el la bazaj financfontoj por "Mafia". Kiel "Mafia" devigas homojn pagi fortajn sumojn por kio ajn? Respondu mem: kion VI farus se, post via rifuzo pagi, oni forbruligas VIAN bienon (kiu estas via SOLA vivtenfonto) aŭ/kaj oni murdas VIAN filon aŭ alia(j)n parenco(j)n, kaj se vi vidus, ke la polico neniel reagas? Kaj kial (vi povas demandi) polico ne reagas? Oni devas, por respondi, distingi inter la plej superaj gradoj kaj la normalaj policanoj: dume la unuaj foje komplikas kun "Mafia", kaj tial silentigas la duajn, ĉi-lastaj foje silentas por ke oni ne murdu ilin. Centoj da policanoj mortas ĉiujare, kune kun centoj da homoj, en la bataloj inter la diversaj "Familioj" de "Mafia" (temas pri veraj familioj, kiuj luktas unu kontraŭ la aliaj por havi pli da povo).

Kion diri pri la centra registaro? Ekster kia ajn politika konsidero, oni devas, bedaŭrinde, agnoski ke la ŝtato ne reagas kiel ĝi devus kaj povus al la agado de "Mafia"; onidiroj, foje pruvitaj, diras ke pluraj politikistoj ricevas ŝmirmonon el "Mafia", aŭ tiu lasta provizas voĉdonojn al ili, por ke ili poste rekomencu tion, faciligante subleĝajn aŭ kontraŭleĝajn agadojn. Oni ja povas diri, ke "Mafia" estas la dua, kaŝita, sed forta, registaro de Italio.

Sed, ĉu tio signifas, ke Italio ne plu posedas honestulojn? Tute ne, kompreneble: pluraj estas la homoj kiuj riskas sian vivon por malkovri la kaŝitajn homojn, kiuj regas super la registaro: plur-

ajn oni eltrovis, kaj la lastaj leĝoj pri la kontrolado de la financaj havaĵoj de suspektitoj (antaŭe bankaj kontoj estis absolute sekretaj) jam permesis trovi kaj enkarcerigi altnivelojn de "Mafia". Bedaŭrinde, homoj mortis pro tio: kiel ekzemplon mi citu nur generalon Dalla Chiesa, Prefekto de Palermo, kiun oni murdis pasintjare, kune kun la edzino, ĉar li tro eltrovis: li estis la homo kiu plurfoje haltigis la agadon de "Ruĝaj Brigadoj", konata terorista organizo. La vojo al liberiĝo estas ankoraŭ longa, sed nun pluraj homoj marŝas sur ĝi. Ni esperu en bona estonto, kaj kontribuigu al tio donante korektan informon al la cetera mondo.

Nu, mi volus skribi plu, sed la du homoj kun nigraj lipharoj kaj dutubaj fusiloj, kiujn mi havas malantaŭ la ŝultroj konsilas ĉesi skribi malverojn se mi ne volas, ke io malagrabla okazu al mi. Bone, jen ĉio, kion mi volis diri pri "Mafia": mi esperas, ke mi povos ion diri pri iu alia temo . . .

LA DOM - PURIGISTINO THE DAILY HELP

(Frapo ĉe pordo — Knock on door)

S-ino T: Jes?

Mrs. B: (somewhat breathless) Oh, Mrs. Trent?

S-ino T: Jes.

Mrs. B: I'm Mrs. Brown. You were advertising for a cleaning lady.

S-ino T: Ho jes: envenu mi petas, en la sidĉambron. Eble taso da teo plaĉos al vi.

Mrs. B: Oh yes, a cuppa tea would be nice — it's a long climb up that 'ill.

S-ino T: Jen estas via teo. Sukero?

Mrs. B: Yes please, two lumps. I find sugar gives me energy. (breathes heavily)

S-ino T.: Sed nuntempe vi aspektas iom senspira.

Mrs. B: Yes, I am a bit out of breath — but I'll be all right when I've sat a bit.

S-ino T: Eble vi ne estas sufiĉe forta por la domlaboro?

Mrs. B: Oh, don't worry, I'm really quite strong — it's just me bronchitis.

Now, what will you want me to do?

S-ino T: Nu, unue mi deziros, ke vi aranĝu la litojn.

Mrs. B: Make the beds? 'ow many beds?

S-ino T: Estas tri litoj — kial?

Mrs. B: Well, three beds will take me at least an hour.

S-ino T: Kion? Unu horon por aranĝi tri litojn?

Mrs. B: Well, all that bendin' and tuckin' in — it's me 'eart you know.

S-ino T: Ho, ĉu vi suferas pro malsana koro?

Mrs. B: Well, me 'eart's not all that bad, but you can't be too careful can you?

S-ino T: Um . . . Nu, se mi aranĝos la litojn, ĉu vi povos purigi la memblojn?

Mrs. B: Oh yes, if you make the beds, I can clean the furniture.

S-ino T: Kaj vi purigos la tapiŝon per polvosuĉilo?

Mrs. B: Yes, I'll clean the carpets — where I can get at 'em.

S-ino T: Sed mi ne intencas, ke vi movu pezajn meblojn.

Mrs. B: But I can't move any furniture, heavy or light. It's me back, yer know.

S-ino T: Via dorso? Vi havas malsanan dorson?

Mrs. B: Oh, it don't 'urt all the time, but since me operation—

S-ino T: (rapide) Jes, jes, mi komprenas. Diru al mi, ĉu vi certas, ke vi povos fari la laboron?

Mrs. B: Oh yes, I can do the work all right,

S-ino T: (dubeme) Ĉu? . . . Nu, kiam vi finos la litĉambrojn, eble vi povos purigi ĉi tiun ĉambron?

Mrs. B: Clean this room when I've finished the bedrooms? Yes, of course, but — it'd take me ages!

S-ino T: Sed — kial?

Mrs. B: Well, you've got lots of vases an' things in 'ere —

S-ino T: (rezigne) Nu, se mi purigos la vazojn kaj ornamadojn—

Mrs. B: Well yes, it would be better if you cleaned the ornaments. Just think! If I 'ad one of me giddy turns when I was 'andling one of them there vases!

S-ino T: Vi kapturigas?

Mrs. B: Yes, but don't worry. I don't get giddy turns very often, and a cuppa tea soon puts me right.

S-ino T: Nu, kompreneble mi donos al vi matenan teon.

Mrs. B: Oh yes, morning tea. Well, I like that about 'alf past ten . . . and two biscuits.

S-ino T: (ironie) Mi certigos, ke vi havos ilin . . . Nun, la kuirejo —

Mrs. B: Ah yes, the kitchen. What will you want me to do there?

S-ino T: Nu, unue mi volos, ke vi lavu

la pladojn.

Mrs. B: Wash the breakfast dishes?

With all that dried on egg and stuff? Oh, I couldn't do that.

S-ino T: (sarkasme) Pro via malsana dorso, mi supozas.

Mrs. B: It's nothin, to do with me bad back. Ain't you got a dishwasher?

S-ino T: Mi bedaŭras, ke ne.

Mrs. B: You ain't? Well, I've never worked anywhere where there ain't a dish washer. I've got a delicate skin, you know.

S-ino T: Sinojorino Brown, eble ĉi tiu laboro ne estas taŭga por vi.

Mrs. B: Too right this job don't suit me —no dish washer! — so I'll go — as soon as you give me me bus fare.

S-ino T: Volonte! Volonte! Jen ĝi estas!

Mrs. B: Ta!

S-ino T: FU!

—Verkis: Helen Stone, Manly.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **BRIZBANO:** La kutimaj klasoj daŭras ĉiun lundnokton en la klubejo, inkluzive de du grandaj klasoj por komencantoj, kiujn gvidas Trevor Steele kaj Ray Ross. 21 anoj de la Societo partoprenis la Konferencon de la Federacio dum la semajnfino 15-16-an de oktobro, kie ili prezentis dramon kaj kantojn. Margaret kaj Cliff Bailey montris lumbildojn pri aspektoj de la vizito al la Universala Kongreso en Budapeŝt.

—RAY ROSS

La Jarkunveno okazis je 31-a de oktobro kaj nova estraro por 1984 elektigis. Prez. Ray Ross; Vic-Prez: Tom O'Grady, Cliff Bailey; Sek: Cath Sullivan; Kasisto: Sybil Martin; Libro-Peranto: Lynne Farr; Biblioteko: Ruth Morrison, Annie Spencer; Redaktoroj "Babilado": Peggy Ross, Tom O'Grady; P.R.O.: Cliff Bailey; Komitatoj: Gilbert Shonhan, Decia Shonhan, M. Spork, J. Paroz, B. Hilsdon, L. Newman.

Kun bedaŭro ni raportas, ke Trevor Steele verŝajne translokiĝos en 1984.

—R.R.

● **ST. LUCIA:** Pro morto de Prezidanto Alan Mason, frue en septembro, ni okazigis jarkunvenon je 11-a de okt.

Jen la novelektitaj estraranoj: Prez: June Cullen; Vic-Prez: Annie Spencer; Sekretaro: Beryl Hilsdon (23 Loynes St., Wynnum, 4178); Kasisto: Ruth Philip; L. broperanto: W. Greenhalgh; Komitatanoj: Heather Jones, Bernice Patterson, Decia Shonhan, Mary Stevenson, Ruth Morrison.

● **SIDNEJO:** Ne raportis.

● **KANBERO:** Je 5-a de septembro, Brenda Birkett parolis pri sia dusemajna vizito en Havajo, kie ŝi vizitis kvar el la ok insuloj. Sur insulo Oahu ŝi renkontis Bonnie Chambers, la konatan Esperantiston kaj radio- amatoron.

S-ro Ralph Harry prelegis pri "Internaciaj Aferoj" dum la Jubilea Kongreso de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj. Li kompreneble menciis la neceson de Internacia Lingvo. Sidneja juĝisto K. Enderby akceptis inviton fariĝi patrono por la centjara Jubileo de Esperanto.

Niaj progresantoj nun legas "Kanakano el Kananam", sub la gvido de nia Prezidanto Ralph Harry.

● **MANLY:** La 15-an de oktobro membroj kunvenis por ĝuinda vespero en la hejmo de Les kaj Bess Scott. Les montris interesajn kaj sperte fotografitajn lumbildojn pri la Universala Kongreso en Budapeŝto kaj vidindaĵojn en Hungario kaj Aŭstrio.

Ni estis tre feliĉaj bonvenigi inter ni, Betty Cleminson kaj Kevin Smith. Betty ĵus hejmeniris post naŭsemajna restado en malsanulejo kaj Kevin post kvinmonata ferio en Francio.

—EUNICE GRAHAM.

● **MELBURNO:** Bonvena gasto okaze de nia kunveno de 10-a de oktobro estis S-ino Rita Aagaard el Auckland, Nov-Zelando. Ŝi rakontis pri sia vojaĝo al Brazilo por partopreni la Universalan Kongreson en Brasilia en 1981.

Jan Makowski, 24/10., parolis pri la malfaciloj rilate la kompiladon de fremdlingvaj vortaroj kaj klarigis pri la "Romaji"-lingva anstataŭaĵo por japanaj ideografoj, montrante dikan japanan-anglan vortaron.

Je 31/10 s-roj Zbigniew kaj Tadeusz Wybraniec, du polaj rifuĝintoj, parolis pri kelkaj spertoj en Pollando kaj Aŭstrio prelode al enmigrado al Aŭstralio.

Gratulon al Gerald kaj Ruth Tumman pro ankoraŭ unu arte aranĝita kaj informa stando pri Esperanto, kiu prezentiĝis en la kadro de pli granda, egale in-

forma ekspozicio pri UNO-Asocio inter 24-a kaj 28-a oktobro en "Royal Arcade", Melburno. Ges-roj Tumman ankaŭ deĵoris laŭvice por respondi al demandoj pri ambaŭ por-pacaj organizadoj.

● **ADELAJDO:** Je 17-a de oktobro Nell Hart legis tradukitan ŝercon kaj Jo Mountwinter prelegis pri "Pacifismo". Je 7-a de novembro S-ino Felby legis leteron de la Eastleigh E-Grupo (Anglujo), kun kiu ni ĝemeligiĝis. Sekvis vigla diskuto pri prepozicioj en Esperanto kaj angla. — R. FELBY

● **PERTO** 28/9 D-ro Einihovici legis interesajn el "Heroldo" kaj raportis pri bulgara kongreso. Kun bedaŭro ni aŭdis, ke nia sekretario Chris Dean suferis koratakon kaj estas en hospitalo.

Je 12/10 Jack Hawks, kiu ĵus revenis de longa vagado tra Aŭstralio raportis pri siaj spertoj. Li promesis montri dia-pozitivojn en venonta kunveno.

LA APUDMARA RENKONTIĜO EN MANLY

15-21 Jan., 1984

Pro nuligo de mendo nun haveblas unu du-lita ĉambro ĉe la ter-etaĝo en Manly "Peoples' Palace". La kosto por ĉiu persono estas \$11 ĉiunokte, inkl. de kuirita matenmanĝo. Mendo letere (kun poŝtmarko) al Box 415, P.O. Manly, 2095 aŭ telefonu Marjorie Duncan (02) 977-5163.

Vizitantoj: Tokio 2; Okc. Aŭstr. 7; Kvinsl. 6; AĈT 2; Vik. 1; NSK 9; Entute 27. — M.D.

EL LA FEDERACIO

● **KVINSLANDO:** La dua konferenco, 1983, okazis ĉe Beaudesert, la 15-16-an de oktobro. Ĉeestis 22 anoj, 21 el la Brizbana kaj "St. Lucia" Grupoj. Estis plezuro samtempe bonvenigi Joyce Turner, el Rockhampton, kiu kune kun Margaret kaj Cliff Bailey revenis antaŭ nelonge de la UEA-kongreso en Budapeŝto.

La loka gazeto antaŭe raportis pri la Konferenco, sed bedaŭrinde la loĝantaro ne tro interesiĝis pri la afero. Tamen anoj spertis tre interesan kaj fruktodonan semajnfino. Sabate, je la dua, okazis la Ĝenerala Kunveno, kie klubanoj raportis pri klubaferoj, aŭ rekte per parolo, aŭ nerekte per letero. La Kasista Raporto montris kontentigan staton. Aligintaj grupoj estas kvin kaj individuaj membroj 81.

La ĉefa ero dum la kunveno estis

diskuto pri la Korporaciigo de la Federacio, gvidita de Gilbert Shonham. Fine, la rezolucio estis adoptita unuanime, ke peto al la Fako de Justeco estu almetita pri Korporaciigo en 1984. La Grupo ĉe St. Lucia jam aranĝis venontan konferencon, en marto 1984; oni decidis, ke la Estraro aranĝu alian en septembro, ĉe Gattton, en la Volo Lockyear. Cliff Bailey raportis pri la Korespond-Kursoj por Skoltoj; ĉirkaŭ 20 ankoraŭ daŭras, dum kelkaj jam finis kaj aliĝis al la ALA Korespond-Kursoj. La Federacio aldonis \$100 al la Esperanto-doma Fonduso.

La Prezidanto Ray Ross raportis pri la sufiĉe kontentiga jaro 1983, kaj dankis al ĉiuj kiuj subtenis kaj kontribuis al la plensukcesa jaro. Dank' al donacoj faritaj de Margaret kaj Cliff Bailey, kaj Kristnaska Kuko donacia de Kay Anderson, plus enspezoj de la 'Alportu kaj Aĉetu' Budo, finance la semajnfino montris tre kontentigan rezulton. Specialajn dankojn oni ŝuldas al la Kas-ino Decia Shonhan kaj al la Kasistino, Nan McGuckin.

Dum la Jarkunveno oni elektis la esaron por 1984 jene: Prez: Ray Ross, Vic-Prez: Tom O'Grady; Sek-o; Decia Shonhan; Kas-o: Nan McGuckin; PRO: Peggy Ross.

Sabate, je la 7-a ptm., okazis la kutima vespermanĝo, kaj poste la distra programo per dramo, kantoj kaj lumbildoj. Dimanĉmatene anoj vizitis al Historia Muzeo de Beaudesert: unika Preĝejo, en Tamrookum, dediĉita al la memoro de D. M. Collins, kunfondinto de Nacia Park-Movado en Aŭstralio; al miriga Sport-feria Kunvenejo Kooralbyn. Post reveno al Beaudesert kaj lunĉo ĉiuj hejmeniris. —RAY ROSS

24- AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO

7-15 Jan., 1984 — Canberra, ACT

La kongreso okazos en "Bruce College", de la Aŭstralia Nacia (Universitato). Ĉiuj kongresanoj povos loĝi en komfortaj cambroj en la Kolegio, kosto por unulita ĉambro kaj ĉiuj manĝoj estos proks. \$27 tage. Dulita ĉambro kun manĝoj estos \$20 tage por unu persono.

Kongres-Kotizo: \$25 Pensiuloj, Studentoj \$20.

Sendu vian kongres-kotizon al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614**. Se vi deziras loĝi en la Kolegio, aldonu \$10 kiel deponon,

Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Congress" kaj aldonu 12 cendojn por bankkosto. Via nomo aperos en "AE", sed se vi deziras ricevi oficialan kvitancon, aldonu afrankitan koverton.

7-a Listo de Aliĝintoj:

- 93. S-ino Kay Anderson, Brizbano
- 94. S-ro Rober Springer, Bathurst, NSW
- 95. F-ino Lesley Casey, Bathurst
- 96. S-ino Una Casey, Bathurst
- 97. S-ino Berilo Loh, Manly
- 98. S-ino Edna Giles, Manly
- 99. S-ino Magda Rosza, Orange, NSW

Laŭstata distribuo: N.S.K. 40, Viktorio 20, Kvinlando 17, Okcidenta Aŭstralio 8, A.C.T. 6, Suda Aŭstralio 3, Japanio 2, Norda Teritorio 1, Tasmanio 1, Anglujo 1.

La Bankedo, kin okazos merkredon en la Kolegio mem, kosto \$10 por enloĝantoj kaj \$15 por aliaj.

DRAMO-KONKURSO: Membroj de la Esperanto-Ligo en Perto prezentos teatraĵon, "La edzino kaj ĉevalino". La Brizbana Esperanto-Societo ludos teatraĵon, "Kiu mortigis S-ron Rubekolo", verkitan de Gaye Phillips. La Dramo-grupo en Manly estas petata sendi la titolon de sia dramo al Herbert Koppel, 41 Byfield St, Reservoir, Vic, 3073

Jim DIMO organizas diskutadon pri Propagando, Varbado kaj Disvastigo de Esperanto. Por helpi lian pli efikan planadon, bonvole sendu viajn proponojn kaj spertojn baldaŭ al J. Dimo, 9 Rocky Gully Rd., Coominya, Q'ld., 4305.

NEKROLOGOJ

● **ILJA GRAHOVAC:** Mortis en Sidnejo je 27-a de aŭgusto, 1983, S-ano Ilja Grahovac, 72-jara., pro koratako. Li eklernis Esperanton en Beograd, Jugoslavio, de kie li elmigris en majo 1957. Li ekloĝis en Melburno kaj estis membro de la Melburna Esperanto-Societo. Li translokiĝis al Sidnejo en 1970 kaj partoprenis en la tiea movado. Kvankam lastatempe pensiulo, li ĉiam malavare subtenis nian movadon.

Al lia frato Nikola kaj ties familio, ni esprimas sincerajn kondolencojn.

● **ROBERT (BOB) REED**, bone konata al regulaj kongresanoj, mortis en Melburno je 11-a de oktobro, 1983, post subita malsaniĝo kaj urĝa operacio. Li lernis Esperanton en Bristol (Anglujo), de kie li migris al Aŭstralio. Li estis kun-

fondinto de la Oakleigh Esperanto-Grupo en 1965 kaj plurjara sekretario. Lastatempe li estis ankaŭ Vic-Prezidanto de la Esperanto-Federacio de Viktorio, kies komitat-kunsidon li prezidis nur 4 tagojn antaŭ sia morto.

Al lia edzino Eva kaj la familio ni esprimas plej korajn kondolencojn.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO
1982/83**

Antaŭe raportita	\$863
D-ro Kevin Smith, Manly	5
	\$868

The Australian Esperanto Association is an independent organization which does NOT receive any Government Subsidies or donations from any source whatsoever

Our strength comes from our faithful members only. Please support the "Australian Esperantist" Support Fund.

La Akademio de Esperanto elektis novan Estraron. Prezidanto: D-ro A. Albault, Francio; Vic-Prezidanto: D-ro P. Neergard, Danlando; Sekretario: D-ro W. Bormann, Germanio.

RECENZOJ

SUR LA BORDO. Traduko far Kenneth G. Linton de "On the Beach" (Nevil Shute), eld. Aŭstralia Esperanto-Asocio, Sidnejo, 1983. 254 p. \$10 en Aŭstralio.

Fine en Esperanto aperis la furora majstroverko de Nevil Shute (ŝut) pri la lastaj semajnoj de la homaro sur nia planedo detruata de atoma radiado.

Estas taŭge, ke ĝin tradukis Esperantisto en Melburno kie, en la libro, vivas kaj fine mortas la personoj rolantaj. Multaj Esperantistoj jam konatiĝis per la filmo kun Petro kaj Maria, Mojra kaj Dwight (dwaĵt), grupo kies psikologia evoluo fronte al certa morto estas juvelo de la tutmonda literaturo. Ken Linton senteme kaj ofte tradukis la nefacilan tekston, en kiu troviĝas multaj mararmejaj terminoj kaj iom da aŭstralia jargono. La traduko certe egalas plurajn tradukojn en naciaj lingvoj. Estas glosaro de vortoj ne troveblaj en Plena Vortaro.

Estas taŭge, ankaŭ, ke "Sur la Bordo" eliras al la mondo nun, en 1983, kiam la

homaro sentas sin minacata de nuklea detruo. Ĉiu mondĉivitano nepre devas legi aŭ relegi ĉi tiun profetan libron, por rememori tion, kio povus okazi en milito kun nukleaj armiloj, se la ŝtatoj ne akceptus pli limigitan suverenecon kaj transdonus al internacia komunumo sufiĉe da potenco por subteni internacian juron. Mi substrekas tiun rilaton inter la plago de Hiroŝima kaj la malarmado en mia enkonduko al la libro.

"Sur la Bordo" estas la unua libro en Esperanto tute verkita, tradukita, presita kaj eldonita en Aŭstralio. Grava faktoro en la eldono estis la sindonema laboro de Tom Elliott de Sidnejo, kiu dum multaj jaroj kompetente prizorgis la Libroservon de A.E.A. Tom mem enigis la tutan tekston kaj ĉiujn korektojn en la komputilon kaj instrukciis ĝin pri la provaj kaj finaj tajpadoj. La preslieroj ne estas tiel elegantaj kiel ni dezirus, kaj ni devis akcepti tildojn anstataŭ brevoj, kaj manskribitajn cirkumfleksojn sur la majuskloj. Sed per tio la Asocio ŝparis la koston de komposto, kaj tial povas vendi multe pli malkare.

La eldonon ankaŭ faciligis la financaj rimedoj de la Fonduso Matasin, stariĝita dank'al heredaĵo de la familio de John Matasin. Aliaj membroj de A.E.A. helpis per mondonacoj kaj seninterezaĵaj pruntoj. La Fonduso estas tute senprofiita kaj la enspezoj el vendado de "Sur la Bordo" ebligas eldonon de aliaj originalaj kaj tradukitaj libroj, inkluzive la Aŭstralian Antologion.

La Asocio dankas al A. P. Watt Ltd. de Londono, kiuj kontraŭ modesta honorario permesis, kiel perantoj de la heredantoj de Shute (Nevil S. Norway), eldonon de la Esperanta traduko. Ni dankas ankaŭ al Faber kaj Faber Ltd., kiuj permesis senpage preson de la versoj de T. S. Eliot kun mia traduko, kontrolita de Marjorie Boulton. Ties finaj vortoj: "Ne kun Eksplozo sed kun Plor-eto" (Not with a Bang but a Whimper) aperas sur la okul frapanta kovrilo, deŝegnita de Melburna artisto.

Kiel Prezidanto de A.E.A. mi fieras, ke ni povis eldoni ĉi tiun gravan romanon. Mi esperas, ke ĝi estos legata ĉie en la mondo, ĉar ĝia temo certe estas kaj aktuala kaj urga.

—RALPH HARRY.

KANTO DE JUNECO, verkita de Yang Mo, Esperantigita de Yang Yongsen, eldonejo E.P.Ĉ., \$3.60 plus afranko, ĉe AEA Libro-Servo.

Legante la unuajn ĉapitrojn oni emas supozii, ke la historio estas ferakonto pri belega virgulino kaj malica duonpatrino. Sursceniĝas malbona bienulo, do, jam melodramo. En la okcidenta literaturo oni ne altetaksas tiajn, sed feliĉe, post kiam la heroino renkontas helpeman studenton sur la strando, la roluloj iĝas pli realaj, vivantaj homoj anstataŭ kvazaŭaj kartonaj eltondaĵoj. La duonpatrino komencas mildiĝi, kvankam nur por persvadi la virgulinon edziniĝi kun riĉa potenculo. La malbonulo iĝas edukisto kaj filantropo, bakalaŭro kaj rektoro de universitato. La heroino fuĝas el marborda vilaĝo post la japana invado de la norda-orientaj provincoj en 1931, kaj atingas Pekinon, kie ŝi "edziniĝas" kun la helpema studento.

La paro partoprenas la studentan vivon, similan al tiu de studentoj en ĉiuj landoj. En amikaj rondoj foje troviĝas marksistoj, ankoraŭ ne maioistoj, kaj komunisto donas al ŝi verkojn de Tolstoj, Gorki, Marx, Engels kaj Mao Zedong. Mi ne klarigos la tutan intrigon, tio ne estas la devo de la recenzisto; mi aldonas nur, ke la heroino partoprenas la agadon de la komunisto partio kaj kune kun aliaj aktivuloj estas persekutata de la "Kuomintang". La rakonto estas facile legebla, kaj la stilo sufiĉe flua, la lingvo preskaŭ senerara, kvankam la tradukinto

tro amas kelkajn kliŝaĵojn, ekz-e ĉiu rideto estas "amara", neniu "rigardas" ion ajn, sed ĉiam "najlas la rigardon", la maficuloj daŭre "karesas la lipharojn", ktp.

Kelkaj strangaĵoj sendube devenas de la malsimileco inter kulturoj: ĉiu ino estas "eta", sed ĉiu viro estas "maljuna", eĉ dudekjaruloj. La esprimo "unuspire" kredeble signifas "rapide" en iu ĉina dialekto. La vorton "braŭningo" mi ne trovis en vortaroj, kredeble temas pri pafilo "Browning". Ĉu "internacia vorto"?

La verkistino komentas, ke viro "portis ledajn ŝuojn", kvazaŭ signifon, ke li estas "malbonulo". Foje "parolis viro kiu havis longajn harojn de dekadencisto" (pli bone "dekadenculo")

Mapo komence de la libro tre utilas; nemalhavebla estas "Listo de la personaro", kie oni trovas "Wang", "Xu", kaj "Li", ĉiun kvarfoje. Mi konsentas, ke en nia lando oni trovas sufiĉe da "Smith", "Brown", kaj "Jones", sed ĉu angla verkisto aŭdacus skribi rakonton pri po kvar personoj nomitaj "Smith", "Brown", kaj "Jones", kiuj ne estis parencaj?

Mi ne legis la rakonton "unuspire", sed dum du tagnoktoj mi ĝuis travivaĵon en la mondo de la ĉinaj studentoj.

—R. G. ROBERTSON.

FAREWELL TO WHO'S WHO

Nothing lasts forever! I must end this series.

Writing them has been a delight, especially since, in so many instances, I haven't written them at all, but have merely sent in, with very few amendments, what the biographees have written for me. What interesting talented characters we have in the Esperanto movement!

I take this occasion to thank all those who have allowed themselves to be used as "literary sacrifices". You've been so gracious in sharing your secrets with me, even giving your ages, which, please note, I have NOT published.

My thanks also to those who have so kindly encouraged me so much so often.

Everybody is a somebody. I would have liked to have included YOU, but I know that you know that I couldn't include all those worthy of mention.

Next issue will contain the final re-

port. At the Editor's insistence it will be about me. At my insistence, it will be written by me.

—ARTHUR COCKING

EL POPOLA ĈINIO

Rabatoj por frua abono:

La 1984-a abonvarba kampanjo de "El Popola Ĉinio" jam komenciĝas. Ek da la 1-a de nov. 1983 ĝis 29-a de feb., 1984, vi povas profiti 20%-an rabaton el la abontarifo.

Ne perdu la ŝancon kaj abonu kaj varbe abonigu parencojn kaj amikojn. Se vi unufoje sukcesos varbi 4 abonantojn vi ricevos ĉinstilan memorajon kiel donacon.

Abontarifo: 1 jaro \$7.00 rabatita prezo \$5.60 2 jaroj \$11.00 rabatita prezo \$8.80; 3 jaroj \$15.00 rabatita prezo \$12.00.

Abonu ĉe K. G. Linton, 4/2 Lyons St. Glenhnutly, Vic 3163.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: R. L. HARRY, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T. 2603
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2514
Kasisto: S-ro S. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614.
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 211 (291)

MELBOURNE

Decembro, 1983

ESPERANTO AS INTRODUCTION TO LANGUAGE STUDY

Statement by Chairman of Senate Committee

At the Annual Dinner of the Modern Language Teachers' Association of the A.C.T., on 17 November, the Chairman of the Senate Committee on Education and the Arts, Senator Mal Colston of Queensland, the guest speaker, said that the claims of Esperanto had often been overlooked. Referring to the Committee's inquiry into 'the development and implementation of a coordinated language policy for Australia, he said it had been submitted that Esperanto was an excellent introduction to the study of modern languages. Because of its regular gram-

mar, without exceptions, and its phonetic pronunciation, children were able to learn quickly and thus gain a sense of achievement. He felt that Esperanto was certainly worth considering.

The President of the Australian Esperanto Association, Mr. Ralph Harry, who is a member of the Modern Language Teachers' Association was seated at the "head table" and had the opportunity to thank Senator Colston and to discuss with him the other aspects of Esperanto which the A.E.A. would like mentioned in the Committee's Report.

24-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

Inter la 7-a kaj 15-a de januaro, 1984 okazos en nia ĉef-urbo Kanbero la **24-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso** kaj, se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tion **TUJ** sendante vian kongreskotizon de \$25 (Pensiuloj) Studentoj nur \$20) al **S-ino M. Ellyard, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT, 2614.** Aldonu \$10 por via hotel-ĉambro. (Skribu ĉekon por "Australian Esperanto Association").

Tiu estos la tria aŭstralia kongreso organizita en Kanbero. La 10-a kongreso okazis en 1956 kaj la 15-a en 1966.

Multaj kongresanoj ankoraŭ ne rezervis sidlokojn por la ekskursoj. Vi devas **TUJ** indiki al S-ino Ellyard al kiuj ekskursoj vi aliĝos, ankaŭ ĉu vi intencos partopreni la bankedon. Ĝi kostos \$10 por tiuj, kiuj loĝos en la kolegio.

aliaj pagos \$15.

Ni deziras al vi agrablan kaj glatan vojaĝon al nia kongreso.

8-a Listo de Aliĝintoj

100. S-ro Carson Thomas, Toowoomba
101. S-ino Mary Miller, Melbourne
102. S-ro W. Vathis, Spokane, USA
103. S-ino K. Gassner, Sidnejo

Laŭŝtata Distribuo: N.S.K. 41; Viktorio 21; Kvinlando 18; Okcidenta Aŭstralio 8; A.C.T. 6; Suda Aŭstralio 3; Japanio 2; Norda Teritorio 1; Tasmanio 1; Aljujo 1; Usono 1.

DRAMO-KONKURSO: Jen ĉiuj partoprenantoj en la konkurso:

Kanbero: "Diplomatia Dilemo"; **Brizbano:** "Kiu mortigis S-ron Rubekolo"; **Perto:** "La edzino kaj ĉevalino"; **Wesley Centro, Sidnejo:** "Jonĉjo ne forlasu min." La nuna tenanto de la A.E.A. Dramo-Sildo estas la Kanbera Esperanto-Klubo.

KANT-KONKURSO: Por la unua fojo okazos kant-konkurso por la trofeo "Fritz Mueller-Sorau". Anoncis sin ĝis nun tri grupoj: Brizbano, Manly kaj la Waverley-Grupo el Melbourne.

TRANSPORTO: Kiam vi alvenos en la urbcentro de Kanbero, prenu aŭtobuson 300 (al la Hospitalo). Ĝi foriras de la urbcentro kaj la unua haltejo estas ĉe "Canberra Club", kontraŭ la nova finstacio por turistaj aŭtobusoj; ĝi preterpasas nian kongresejon Bruce Hall de la Aŭstralia Nacia Universitato

APUDMARA RENKONTIĜO EN MANLY

15-21 Jan., 1984

La urbestro kaj la konsilantaro de Manly aprobis Civitan Akcepton je ĵaŭdo, la 19-a de jan., 1984. Kvindek esperantistoj estas invititaj al la Urbdomo.

KOMISIITO POR LA LERNEJOJ

En 1982 A.E.A. komisiis S-ron S. J. (Jock) Campbell de Dorrigo, NSK., kunordigi agadon en Aŭstralio rilate lernejojn. Li faris utilan pioniran laboron, sed bedaŭrinde je 24-a de junio, 1983, li subite mortis. (Vidu nekrologon en nia julia-aŭgusta numero, paĝo 186).

A.E.A. nun serĉas kompetentulon por daŭrigi la laboron sur la kampo de edukado en la venontaj jaroj. Ni esperas, ke ni povos elekti novan Komisiiton en

la Ĝenerala Kunveno de la 24-a Aŭstralia Kongreso. Tiu komisiito prefere estu instruisto aŭ eksinstruisto, kiu kapablas intertrakti kun registraj kaj lernejoj-aj instancoj kaj kiu povus plenumi la jenajn taskojn:

- Registri la nunan instruadon en lernejoj aŭ al lernejoj ekster la lernejoj;
- Registri la instruistojn, kiuj kapablas kaj pretas instrui kaj iliajn profesiajn kvalifikojn kaj spertojn;
- Registri kaj klasifi materialon, lernolibrojn, kasedojn, sondaĵojn kaj diskojn, inkluzive komputildiskojn, filmojn ktp. haveblajn en Aŭstralio kaj taŭgajn por instruado en ĉi tiu lando;
- Konsili AEA kaj aliajn E-organizaĵojn en Aŭstralio pri instrumentodoj kaj prepari laŭbezone proponojn kaj planojn por instruado (1) de instruistoj (2) de lernantoj en primaraj lernejoj kaj gimnazioj (3) en universitatoj;
- Kunlabori kun la Aŭstralia Federacio de Asocioj de Instruistoj de modernaj lingvoj, kaj kunordigi rilatojn inter tiuj asocioj kaj la E-organizaĵoj.

Se estas pli ol unu volontulo, le Estaro rekomendus la starigon de komitato, sed la unua bezono estas Komisiito.

Ralph Harry, Prezidanto.

ĈU VI DEZIRAS HELPI

Aŭstraliaj Esperanto-Kongresoj jam fariĝis tiel ampleksaj, ke unu sola raportisto tute ne kapablas registri kaj priskribi ĉiun kongreseventon kaj prelegon. Ni devas, do, trovi solvon al tiu problemo.

Kiu kongresano ŝatus helpi? Ni bezonas **raportistojn**, kiuj estas pretaj kroniki 2 aŭ 3 kongresaraĝojn en telegram-stilo. **Prelegontojn** ni petas doni al la Redaktoro aŭ resuman enhavon aŭ kapojn de la prelego, **Estos de fakkunsidoj** bonvolu transdoni raporteton pri viaj decidoj.

Ni serĉas ankaŭ **fotografiston**, kiu estas preta fari 3-4 blanke-nigrajn fotografaĵojn poŝtkart-formatajn, kaj transdoni ilin proksimume je la **13-a de januaro** al la Redaktoro Tiujn fotografaĵojn ni uzos por 'Australian Esperantist' kaj por raporto al "Heroldo de Esperanto".

Se vi deziras helpi, bonvole kontaktu min en la kongresejo je la **7-a de januaro**.

—Herbert Koppel.

D-ro Arthur Baur en Svisa Radio Internacia

LA MERKATO DE ORO

Mi traktas hodiaŭ temon, kiun mi ĝis nun neniam tuŝis, nome la oron. Tiu valora flava metalo efektive koncernas Svislandon ne ĉar Svislando estas aparte riĉa en ĝi, kiel iuj eble supozus, sed ĉar la financa metropolo de Svislando, Zuerich, estas internacia centro de la ora merkato.

La komerco de oro estas unu el la servoj. kiujn Svislando plenumas en la internacia reto de ekonomiaj rilatoj, samkiel asekuroj, transportoj kaj la perado de kapitaloj. Zuerich, Londono, Nov-Jorko, Hongkongo, Singapuro kaj Tokio estas la ĉefaj centroj de la komerco pri oro. Zuerich inter ili estas la plej grava primara merkato, tio signifas, ke ĉi tie okazas la plej multa komerco kun la ora metalo mem, dum aliaj centroj pli okupiĝas pri bursaj negocoj. En Zuerich, respektive tra Zuerich, Suda Afriko, la ĉefa produktanto de oro vendas pli ol la duonon de sia elminigita oro.

Same Sovetunio uzas la Zuerichan merkaton por sia or-eksporto kaj egale aliaj orproduktantaj landoj. La tri plej grandaj svisaj bankoj kuniĝis por krei "pullon", t.e. ili komune aĉetas la oron, sed vendas sendepende unu de la alia. Tiu Zuericha ora "pullo", laŭ la angla vorto "pool", estas grava elemento en la internacia komerco. Ne estas hazardo, ke ĵus aperis en Zuerich, eldonita de la banko "Credit Suisse", dika manlibro pri la rolo kaj borsa funkciado de la oro, el kiu mi ĉerpis kelkajn el miaj informoj.

Estas superflue paroli pri la rolo de oro por juveloj kaj ornamaĵoj, ĉar ĉiu konas kaj ŝatas tion. En antikvaj tempoj la oro ankaŭ estis grava en religiaj kultoj. Krom tio la homoj ĉiam ŝatis la oron kiel nedetruoblan rezervon de sia havaĵo, neinflueblan de inflacio kaj facile porteblan. Pro la sama kaŭzo, jam delonge la oro estis uzata por stampi monerojn, kaj antaŭ cent jaroj kaj eĉ pli longe ĝis la unua mondmilito oni portis orajn monerojn en sia poŝo, kiuj havis la valoron de la cifero stampita sur ili. La bankbiletoj estis komence nenio alia ol kvitanco aŭ ĉeko, per kiu oni en ĉiu banko povis postuli la saman valoron en

oraj moneroj. Tiu sistemo disfalis post la mondmilito kaj la bankoj, respektive la centra nacia banko, kiu en nuna tempo sola rajtas eldoni bankbiletojn, ne plu eldonis orajn monerojn kontraŭ la bankbiletoj. Tamen la ŝtataj leĝoj postulis, ke la centra banko havu stokon de oro en laŭlande ŝanĝiĝanta proporcio kun la eldonitaj bankbiletoj.

Kiam la oraj moneroj ne plu estis uzataj kiel kontanta mono ili ne perdis sian valoron, kontraŭe ilia valoro multe altiĝis kaj korespondas nun al la efektiva pezo de oro, kiun ili entenas. Krom tio ili havas numismatan valoron kaj por belaj raraj pecoj la kolektantoj pagas eĉ multe pli ol nur la valoron de oro. La diferencon inter la valoro de la oro entenita en la monero kaj la efektiva pezo, je kiu ĝi estas vendata kaj aĉetata, oni nomas aĝion. La plej konataj oraj moneroj sur la merkato estas ekzemple la svisa "Vrenerli", monero de 20 frankoj, kiun oni hodiaŭ vendas je prezo de 148 frankoj, la aĝio estas 18%, do la valoro de la entenita oro estas 122 frankoj. La franca "Napoleon" kostas 160 frankojn, la aĝio estas 29%, la angla "Sovereign" kostas 177 frankojn, la aĝio estas 13%, la usona "Double Eagle" kostas 788 fr., la aĝio estas 22%.

La observo, ke multaj oraj moneroj vendiĝas tiel bone kondukis multajn ŝtatojn al la ideo restampi la samajn monerojn por profiti de la aĉetemo de la kolektantoj. Tiujn restampitajn malnovajn monerojn oni nomas "bullion coins" tio signifas brikajn monerojn, ĉar oni restampas ilin el la brikoj de oro kaj ili ne valoras multe pli ol la pura oro pro tio, ke la kolektantoj ne interesiĝas pri novaj moneroj kaj ne estas pretaj pagi la altan aĝion. Kiam la aĝio ne plu kovras la kostojn de la stampado, la koncernaj ŝtatoj ĉesigas la eldonadon de "bullion coins" Do kiam oni volas aĉeti oran moneron oni bone atentu, ĉu tio estas aŭtentika, aŭ moderna restampo. An tate aĉeti "bullion coins" la privateco pli bone aĉetu orajn brikojn.

En nombro de landoj ĉiu ajn povas aĉeti oron, en aliaj la komerco de oro

ne estas libera kaj ekzistas multaj preskriboj pri importo kaj eksporto de oro. La absoluta libereco en la komerco de oro estiĝu unu el la kaŭzoj pro kiuj Zuerich evoluis en la lastaj jardekoj kiel centro por la monda merkato, vera turn-plato por oro. Tra Zuerich pasas ĉiujare oro en la valoro inter 80 kaj 100 miliardoj da frankoj. La prezo de la oro varias ĉiutage kaj dependas de la borsoj en London kaj Zuerich Lastjare ĝi estis meze 23 mil frankoj por unu kilogramo. En la svisaj bankoj eblas aĉeti brikojn en diversaj pezoj inter unu kilogramo kaj kvin gramoj, aŭ havi ilin laŭ la angla pezo, la unco: unu unco estas ĉ. 30 gramoj.

Tio tamen ne estas la sola maniero aĉeti oron. Oni povas aĉeti posedon je oro, kiun oni neniam vidas, ĉar ĝi restas kusanta en la banko. Homoj faras tion por eviti la inflacion, sed se la valoro de la oro malpliĝas, ili tamen perdas. Krom tio kompreneble la financistoj ankoraŭ alimaniere komercas kaj spekulacias pri oro. Ili povas aĉeti aŭ vendi oron je termino, aŭ ili povas havigi al si opciojn por aĉeti oron. Laŭ la variigo de la ora prezo en la borso ili povas per tio profiti multe aŭ perdi, estas spekulacio same kiel per akcioj. Sed jen fako pri kiu mi ne estas taŭga instruisto.

AFTER THE ESPERANTO COURSE

RECRUITMENT AND SOCIAL INTEGRATION OF ESPERANTISTS

Bernard Golden

In some countries it is customary to mark the end of a course of instruction in Esperanto by an examination. These examinations are arranged by the national Esperanto organization or by an official examining board under the auspices of local or national educational authorities. The value of these examinations is doubtful. First, there is no standardization among different countries so that the terms "elementary", "advanced" and "teaching proficiency" are nebulous. Even more criticizable is the practice of emphasizing the acquisition of certificates or diplomas rather than knowledge of Esperanto. Sometimes competitions are organized, ostensibly to stimulate interest in language-learning among elementary and secondary school pupils. The winners receive certificates and other prizes; the losers get nothing for their efforts. Thus there is no longer any reason for them to continue to learn Esperanto. The goal of teaching Esperanto to children should not be to prepare them for contests, but rather to educate them for broader and more intense international understanding, the attainment of which is facilitated by the use of Esperanto. Even if they should never use the International Language in a practical manner, the attitudes acquired while learning it may nevertheless persist.

Another aim of teaching Esperanto to children should be to prepare them for future participation in the movement. It is not enough to teach only the language; the youngsters must be familiarized at the same time with the history and ideology of the Esperanto movement. Furthermore, there should be a well-planned method of gradual introduction into the Esperanto movement from the first course in the elementary school to advanced instruction in the secondary school leading to membership in the youth movement, then in the adult group, and finally in national and international organizations. Only in this way will young learners not be lost and the local club will be assured of receiving regularly its much needed "new blood".

Every Esperanto group is faced with a variety of internal problems which it must solve in order to maintain its existence. Even after these problems are settled, there is still the risk that the group will remain an insignificant isolated sect existing merely for the satisfaction of its members. The only way to avoid such stagnation is to draw aside the Green Curtain which separates the Esperanto movement from the rest of society. Instead of vainly waiting for the public to come to Esperanto, it is necessary to take Esperanto to those

who are in need of it. In the case of a relatively small local club with meager financial resources, perhaps the best way for it to make itself known is by cooperating with another more widely known organization whose principles and aims coincide with those of the Esperanto movement, for example an organization dedicated to the improvement of international relations.

In this connection it would be appropriate to refer to the Christmas message of the President of AEA in the December 1980 issue of "A.E." The two decisions of Mr. Ralph Harry on page 326 should be underlined, reread and implemented. They present concrete proposals, on one hand for expanding recruitment, and on the other hand for reducing the number of ex-Esperantists. Both activities are necessary in order to insure the survival and progress of Esperanto organizations on all levels.

POR REKTA KONTAKTO OKCIDENTA-ORIENTA

Dum kulture tre interesa vojaĝo laŭ "Silka Vojo" tra Centra Azio, junion, 1983, kelktage mi restis en urbo Taŝkento. Tie mi rilatis kun kelkaj tre simpatiaj anoj de grupo esperantista, kiu havas 40 membrojn.

En Parko de l'bluaj kupoloj sidante sur la karakterizaj "terlitoj", ni ripetite trinkis teon kaj vikle ŝerce babiladis. Eĉ sufiĉis tempo por revizii manuskriptojn, kiujn aktivuloj pretigas pri fama, antikva matematikisto uzbeka krom pri modernaj noveloj. Por esti plejeble korektaj, ili ĉiam petas al multaj personoj ree ojn pri siaj laboroj. Ankoraŭfoje pruviĝis, ke kiam homoj rekte ekkonas unu la alian, ili sentas sin kvazaŭ amikoj de multaj jaroj.

La grupanoj aktivas en la kadro de Uzbeka Societo por amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando, i.a. pri oficiala tradukado de artikoloj el la plurlingva revuo de tiu societo "Soviet Uzbekistan". Ĉiunumere enmetiĝas 4 paĝoj kun tiaj Esperanto-tradukaĵoj, cetere mendebla laŭ la suba adreso.

Laste, en oktobro, mi ricevis la jenan alvokon: "Ĉu vi informos unu klubon en via urbo pri ebla interkorespondado, kunlaboro? Ni povus korespondi indi-

vidue aŭ kolektive. Tio proksimigos, amikigos esperantistojn de niaj landoj. Ekzemple ni legas en nia gazetaro pri pacnarŝoj en via lando, kaj ni ŝatus ricevi pli detalajn rakontojn pri tio, gazetajn eltranĉaĵojn, fotojn k.s. Akceptu niajn salutojn: **Eŭgeno Perevertajlo, Uzbeka Esperanto-Komisiono, ul. Afunbabajeva 1, 700.000, TAŝKENT, Uzbekistan, USSR.**"

Mi sugestas, ke individuaj membroj kaj studgrupoj pozitive rilatos al tiu ĉi spontana alvoko por kontakto okcidenta-orienta.

—Poŭl Thorsen, Kopenhago.



● **PERTO:** Je 14-a de decembro la membroj de nia Ligo vizitos la loĝant-ojn en "Esperanto Way" en Balga kaj disdonos florojn al ili. Per tio ni deziras atentigi la loĝantojn en la strato pri Esperanto kaj pri la naskiĝtago de D-ro Zamenhof.

Je 26/10 S-ino McGrath legis artikolon el 'Esperanto'. Kelkaj anoj parolis pri siaj hobiaj kaj Jack Hawks montris diapozitivajn faritajn dum sia vojaĝo tra la orienta parto de Aŭstralio.

Je 9/11 D-ro Einihovici legis ei "Monato" kaj poste Jack Hawks montris pliajn lumbildojn faritajn dum sia vojaĝo en orienta Aŭstralio.

● **MELBURNO:** Je 14-a de novembro S-ro Harry Beechey rakontis pri Frederick Mathias Alexander, aŭstraliano, kiu fariĝis mondfama, kvankam ankoraŭ ne sufiĉe konata en la propra lando, pro sia metodo kuraci multajn malsanojn per korekto de misuzado kaj misformiĝoj de diversaj korpopartoj.

Ĉe la amuzvespero de 28-a de novembro, S-ro S. Kanaĉki montris diapozitiv-ojn kaj parolis pri la "Gigantaj Lumbriktoj" de Gippsland kaj la vizito de Prof. Stop-Bowitz el Oslo.

Jan Makowski, 5/12, prelegis pri la religioj de Japanio. Li rakontis pri la du ĉefaj religioj Budhismo kaj Sintoismo. La lasta ĉesis esti la oficiale nacia post la 2-a mondmilito. Li skizis la historion de ambaŭ

S-ro Jacques Pfeiffer, francdevena emigrinto, kontaktis la etnikan radiostacion, 3EA, francan sekcion, kaj estis intervjuita pri D-ro Zamenhof, la historio de Esperanto kaj ĝeneralaj aferoj de la Esperanto-movado. Oni finis la 15-minutan intervjuon per Esperanto-kanto. Tiu registrita intervjuo estis disaŭdigata je 4-a de novembro. Rezulte de tiu disaŭdigo, juna emigrinto el la insuloj 'Seychelles' aliĝis al la Melburna E-Societo.

● **MANLY:** En la hejmo de Marjorie Duncan okazis, 26/11, aferkunveno por plani agadon en 1984. Ni starigos novan kurson por komencantoj en Manly Eduka Centro. Nia membro, Rita Dunbar, organizos ekspozicion en la Urba Biblioteko, jan. 2-21. Dum nia "Renkontiĝo" jan. 15-21 ni bonvenigos 28 vizitantojn. (Jus aliĝis S-ro W. Vathis el Washington, USA) —M. Duncan.

● **SIDNEJO:** En la "Wesley"-Centro nun kunvenas kvar klasoj. Silvia Burkitt instruas komencantojn per "The Esperanto Teacher". Robi Robertson gvidas progresantojn per "A Practical Course in Esperanto" kaj Marjorie Duncan pri zorgas la altgradulojn per "Paŝoj al Plena Posedo".

● **NEWCASTLE, NSK.:** Grupeto kunvenas ĉiuvendrede laŭvice en la hejmoj de membroj.

● **TOOWOOMBA:** Jim kaj Jennifer DIMO, kiuj ĵus aĉetis farmbieneton en Kvinslando, vizitis nian urbon. Je 22-a de novembro aperis en loka gazeto 'Chronicle' proks. 10-cm-longa artikolo. La sekvontan tagon la vizitantoj parolis al nia grupo. Je 24-a nov. Jim parolis dum 15 minutoj en radio-stacio 4 WK Sammatene Jim ankaŭ parolis ĉe Radio 4 DDB dum 10 minutoj. Redaktoro de loka gazeto intervjuis s-ron Dimo kaj poste publikigis lu-kolumnan artikolon.

EL LA FEDERACIOJ

● **VIKTORIO:** Tre sukcesan ekskurson faris la Federacio je 19-a de novembro, 1983 Dek sep membroj kaj amikoj de la Oakleigh, Waverley kaj Melburna grupoj partoprenis boatekskurson per M.V. "Blackbird" sur la rivero "Marybyrnong". Post semajno de senĉesa plu-

vado ni povis ĝui sunbrilan veteron kaj ĉiuj ŝatis la informriĉan komenton de "Kapitano" Peter Somerville.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1982/83

Antaŭe raportita	\$868
S-ro E. Szobolotzky	6

\$874

14-jara knabino deziras korespondi tutmonde. Kol. poŝtmarkojn, bildkartojn pri fremdaj landoj kaj bestoj. Interesiĝas pri filmoj, aktorj. **Katrin Blanke, DDR 1054 Berlin, Rosenthaler Str. 2**

Nur nun ni eksciis ke **GEORGE COOPER** mortis en Hobarto, la 14-an de feb., 1981. Li estis aktiva en la iama Hobarta E-Societo kaj estis membro de la Kvakera Esperantista Societo.

RECENZOJ

ESPERANTO EN LA MODERNA VIVO Eld. de Esperanto Press, Bailieboro, Ont., Canada KOL 1BO, Prezo \$30.00 (Can.), plus afranko.

En nia gazeto de nov, 1982, aperis kelkaj detaloj pri **ESPERANTO LINGVO INTERNACIA**, impona kaj utila kolekto da informo kaj artikoloj ĉiaspecaj pri kaj en Esperanto, kompilita de Ruediger kaj Vilma Eichholz. Jam antaŭ ol tiu anonco, aperis en aŭg., 1982, ties dua eldono, kiu nur poste atingis nian redakcion.

La iom ŝanĝita titolo ŝajnas pli konvena al la celo de la verko. Eĉ pli bele bindita kaj multe pli ampleksa, ne nur laŭ ĝenerala enhavo, sed ankaŭ pro aldonitaj indeksoj de (1) personoj, kaj (2) landoj kaj temoj, ĉi tiu luksa kaj vere kolosa kolekto konsistigas konsultilon nemalhaveblan egale por klubaj bibliotekoj kaj por individuaj Esperantistoj, kiuj emas propagandi kaj disvastigi la lingvon, kiel ankaŭ por neesperantistoj serĉantaj informon, ĉu pri la lingvo

**Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1983 venas al vi pro
la malavaraj donacoj de 28 esperantistoj kaj
Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la
"Subten-Fonduso" de nia gazeto.**

mem, ĉu pri ĝia historio kaj antaŭ kaj post ĝia naskigo, ĉu pri ties nuna pozicio en la mondo

Plejparte en la angla lingvo, sed parte ankaŭ en Esperanto, la enhavo inkludas studojn verkitajn de esperantistaj gravuloj, kiel ankaŭ de mondfamaj eminentuloj, kiuj interesiĝis pri Esperanto, kaj ĉi ties celo kaj atingoj. Paralelaj tradukoj utilas por interesatoj.

Mendu ĉe Esperanto Press, Bailieboro, Ont., Canada, KOL IBO, aŭ de A.E.A. Libro-Servo. —FAY KOPPEL.

MATENAJ FLOROJ KOLEKTITAJ EN VESPERO: de Lusin (1881-1936); eld. de la Popola Literatura Eldonejo, Beijing.

Lusin estis ĉina verkisto, kiu subtenis Esperanton, kvankam li mem ne estis esperantisto. Li spertis varian sorton

dum la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj en Ĉinio.

Ĉi tiu kolekto de dek eseoj, kies metafora titolo estas tamen memklariga, estas tre bildige verkita per simpla, facilflua lingvaĵo. Kelkaj el la eseoj priskribas la infanaĝon kaj familian vivon de la verkisto, kiel ankaŭ liajn spertojn kiel studento en Japanio kaj post reiro al Ĉinio Aliaj kolorplene kaj detale pritraktas malnovajn festajn tradiciojn kaj lutimejn.

Akre sentiĝas la ĝena influo sur la verkiston de kelkaj tiuj tradicioj, kiel ankaŭ de diversaj ĉinaj verkoj. Sentiĝas krome liaj duboj pri iom strangaj kuracmetodoj priskribitaj.

Interesaj rakontoj pri ekzotika kulturo, facile legeblaj. Piednotoj klarigas multajn aludojn. Mendu pere de A.E.A. Libro-Servo, P.O. Box 230, Matraville, NSW, 2036. —FAY KOPPEL

WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

No. 30 — ARTHUR COCKING

The Stopgap

The able writer of "News Digest" in the "Australian Esperantist" was not able to continue. The Editor asked Arthur (an unknown) to fill the gap. The source of "News Digest" ceased. Another gap, so he began this series "Who's Who". There were plenty of interesting, capable speakers at Australian Congresses, but he felt there was a place for the learned, less serious talks, so he introduced such tongue-in-cheek topics as "Pity the Fat Man. Perhaps it's not his Fault" and "How to be Happy, though Married".

For many years both in and outside of the Esperanto movement, he has been called upon to stop other gaps because of a lack of other people "ready, able and willing" to accept office

or responsibility. So, since the age of 20, he has been undertaking tasks (President here, Treasurer there, compere, teacher etc.) through dearth of other starters. An "Ask Arthur, He'll do it" situation!

By contrast, there was certainly no gap in Arthur's family. His father, an intelligent, unschooled labourer whose mother was completely illiterate, had already begotten 6 sons and a daughter by the time his youngest and puniest child made his advent. (Incidentally, a member of Arthur's staff once made the comment about a problem family, "You know the type. No money, no brains and they breed like rabbits". The reply was, "Yes, I know the type. That's the sort of family I belong to.") Arthur's family was big and it had no money. But it

was certainly rich in all the things that matter — in love, in unselfishness, in music and especially in books and more books.

After primary school, Arthur enrolled in a Junior Tech., where he learned, among other things, woodwork, metalwork, tinsmithing and blacksmithing. A square peg, when he would probably have fitted better into a four-language course! However, he's glad that he did the "wrong" course for he has often used technical skills (he built his own garage) and he was lucky enough to "catch up" on languages when, after the Intermediate Certificate, he entered a High School "through the back door".

He matriculated (thanks to the five-year French course which he started 3 years late) and he would dearly have loved to have gone to the University. With a father and 3 brothers out of work, this was only a deferred hope; but he was granted a Teachers' College Scholarship and was duly trained as a primary school teacher. Then for 4 years he was in charge of one-teacher schools (6 classes in the same room). For him, the life was not pleasant (though the "kids" were) and he was not a good teacher. No water, no electricity, no social life and the local hobbies seemed to be fanatical drinking and furious driving, too remote even for a battery wireless. He now detests "God's wide, open spaces" and thinks that if he's more than 10 kms from the sea he's too far inland.

Transferred at last, Arthur enrolled at Sydney University in the Faculty of Economics. Why Economics? Well, Science was his first love but he couldn't do his B.Sc. at night. He was already an expert on poverty, so the B.Ec. was an acceptable second choice. At the end of the first year he married. Poor little wife, with a husband teaching all day, at the Uni. 5 nights per week and doing "assignments" at weekends. Yet the marriage not only survived but proved to be ecstatically happy and Arthur proved that he was not neglecting his "homework" for, by the time they went along to collect his first "bachelor's" degree, they had 2 lovely girls. They had two others — while he did the B.A. at night.

Now, back to stopping gaps. There were problem classes in the school. Being young and strong, Arthur volunteered to try to cope with them. A most rewarding experience! He found that he was a good teacher for bad boys and ever since has taken the biggest, toughest, classes.

The rest of his career? Three years in a tough Junior Tech. (The "boys" now invite him to a happy reunion each year) An assistant in country High Schools, Subject Master and, in due course, Deputy Headmaster in a Selective High School where the boys had a higher intelligence rating than he did. Meanwhile, 3 years as Principal of an Evening College. Finally when the (daytime) Headmaster collapsed a week before Speech Night, he was called upon to fill this gap and act as Headmaster.

On becoming Headmaster in his own right he was delighted to have "Robbie" Robertson as Guest Speaker for another Speech Night.

Some foibles? (Arthur's not Robbie's). He's a fervid teetotaler, a rabid anti-smoker and he's rudely intolerent of non-listeners. Travels? Most of the world. Greatest thrill? Seeing his first baby for the first time. Ambitions? To learn to dance. Hobby? Partsinging. Greatest triumph? Forgiving the lady who told him he was a boring public speaker. Heart's desire? To see Esperanto spread because it has been made and kept so simple that any fool can learn it in 6 months.

NE TRO MALNOVAJ: Akra seniluziigo por la arkeologoj, kiuj fosadas en la zono de la imperiestraj Forumoj en Romo. Anstataŭ la esperataj restaĵoj el la romia aŭ mezepoka tempo, el la grundo reaparis nur la restaĵoj, tamen bone konservitaj, de la domaĵoj siatempe malkonstruitaj (en 1931-32) fare de Mussolini, por estigi la paradon aleon "de la Imperio".

Laŭ pli optimisma interpreto, tamen, la afero estas esperiga, ĉar probable, sub la fundamentoj de tiuj domaĵoj, oni povos retrovi la pli malnovajn restaĵojn, laŭ diversaj stratumoj.

(De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma).
